



# GENERALITAT DE CATALUNYA

PRESIDÈNCIA

COMISSARIAT DE PROPAGANDA

Avinguda 14 d'Abril, 442 bis

BARCELONA

Telefon 82215

## COMUNICAT DE PREMSA

ESPERANTO-ELDONO

Nº 5.

Barcelona, 31. Jan. 1937.

### EN LA MADRIDA FRONTO

#### INTERVJUO KUN LISTER, KOMANDANTO DE LA UNUA BRIGADO

Ni estas en plena laboro de armeoformado. Seninterrompe oni kreas brigadojn. Nun ekzistas jam tiaj akirintaj pro la kuraĝo de siaj elementoj aŭ pro la superaj kondiĉoj de siaj ĉefoj, specialan famon: inter ili distingiĝas la Brigado Lister. Tiel, do, dum nia restado ĉe Madrido ni klopodis paroli kun Lister, homo el la popolo, kiu pro siaj meritoj akiris kategorion de granda strategiisto kaj de popola heroo.

Ni estas en la Komandantejo. Ni alvenis al la rendevuo, kaj dum ni atendas, ni povas rimarki, ke on la vizaĝo de ĉiuj milicianoj brilas eksterordinara ĝojo. La antaŭan tagon la Brigado Lister sukcesis fari gravan antaŭeniron.

La medio instigas do ankoraŭ pli nian intereson por konatiĝi kun la komandanto. Ni sentas la sensacion, ke ni troviĝos antaŭ homo, kiu krom la granda rolo, kiun li ludas dum la milito, li estas destinita esti elemento de eksterordinara graveco, kiam tomos pri la firmigo de la triumfo.

Fine ni premas la manon de Lister. Li estas homo konscia, senigita je falsa modesteco, nearoganta.

Juna, forta, vira, li estas vestita per eleganteco, duone militista, duone laborista, sed tre personeca. Ĉi tiu kondiĉo elmontriĝas en lia tuta kondutmaniero.

Ni montras al li nian kondiĉon de ĵurnalistoj, kaj koncize li diras al ni: Mi respondos al viaj demandoj.

Interesas al ni altgrade la Brigado. Kial ĝi estas nomata miksitaj?

Ĉar ĝi estas formita el milicianoj kaj militistoj.

Ĉu nune ĝi estas tute militistigita?

La Brigado estas formita plejparte el elementoj de la 5<sup>a</sup> Regimento.

Niaj kamaradoj ricevas krom la militistan ankaŭ kulturalan edukon.

Ĉi estas tute militistigita. Ĉi komencis organiziĝi la 15an de Oktobro, kaj la 26an de la sama monato ĝi estis jam tute formita, kun siaj elektitaj inter la milicianoj mem, komandantoj kaj kelkaj profesiaj ĉefoj. La moralo estas konstante pli alta kaj ĝia organizo pli perfekta.

Kiel vi realigas tiun laboron de militista kaj kultura eduko?

Ni havas en la tranĉeoj mem tridek lernejojn, kie oni instruas ĉiutage tri lecionojn: Unu por analfabetoj, alian de militista preparo por kaporaloj kaj serĝentoj kaj alian de militista preparo por oficiroj.

Ni havas propran radiostacion por dissendi ekster la tranĉeojn per potencaj laŭtiloj.

Kiel funkcias la sanigista servo?

Admirinde; ĉiu bataljono havas sian kaj ekzistas plie ĝenerala servo.

Kiel vi solvas la problemon de la disciplino?



/Nº5/

La zorgoj faritaj sur tiu ĉi punkto estas moralaj, malofte ni estas devigataj alispecajn rimedojn.

La plej akra puno estas la elpelo el la Brigado.

Kiam ni demandis lin en kiu bataloj partoprenis la Brigado, Lister ridetas kiel surprizita de nia demando kaj fine respondas al ni: jen en Sesoña, Valdenoro kaj Villaverde, ni partoprenis nombrajn batalojn. Dum kvindek tagoj la Brigado purigis de malamiko la tutan Bajo Villaverde.

Ĉu vi volas diri al ni la vian opinion pri la irado de operacioj? Plene kontentiga. Ĉiutage la fortoj akiras pli grandan disciplinon, kaj kio antaŭe nur estis grupoj kaj bataljonoj ne milicianoj, tio estas nun armeo militista kaj disciplina, kun sola komando kaj tre bona ekipita.

Interesas al mi scii ion pri via persono. Komendanto Lister hezitas dum momento, kaj diras al ni:

Mi naskiĝis en Galicio. Mia metio estas ŝtonministo. Kiel membro de la Komunista Partio ni partoprenis en la atako kontraŭ la kazerno de la Montaña. La 27an de julio ni estis ĉe Guadarrama-montaro, kiel miliciano. Dek tagojn poste ni faris min oficiro, poste leŭtano, kapitano, kaj poste ĉefkomandanto de la 5a Regimento de la Unua Brigado.

Antaŭ ol adiaŭi lin ni riskas la lastan demandon. Kaj post la milito, kion vi pensas fari, - Tion, kion la Partio ordonos. Sed ni aldonas, kaj via persona gusto, kiu estas? Kun la sama diligenteco li respondas al ni: Mi dezirus la eblon studi tion, kion mi praktike travivis.

Tiu respondo fermigas nin en nia kredo, ke ĉi tiu decida lukto produktos multajn ĉefojn de similaĵ ecoj, kiuj estos la kunligo de la morala kaj materiala venko de la proletaro super la internacia faŝismo.

### LA VATIKANO KAJ LA HISPANAJ RIBELINTOJ.

Pri la sintenado de Vatikano pri la ribeligo kontraŭ laŭleĝa hispana registaro, montras la artikolo de "Osservatore Romano", la oficiala organo de Vatikano. La artikolo laŭvorte estas:

"La situacio en hispanujo rilate al la antaŭ nelonga ribeligo devas, kiel sekvas, esti kondamnita; la hispana registaro plenumas ne nur la pravon, sed ankaŭ la devon, kiam ĝi postulas, ke la leĝo en ĉiu rilato estu respektata. La nacio havas la kunrajton en la defendo de sia Registaro. Kiam ĝi sian devon, la ribelintojn plej severe puni, malfruigos, tiam la respondeco pro la daŭra sangoverŝado falos sur la Registaron.

Tiu estas la vera kaj la prava instruo, kiun la tradicio de katolika eklezio en ĝiaj rilatoj al laŭleĝaj registaroj postulas. La pravo de laŭleĝa Registaro, al subpremo de ĉiuj ribeligoj, estas fiksa sendubo kaj ĉiuj katolikoj devas obei kaj subteni sian Registaron en la batalo kontraŭ ĉiu ribeligo".

Ni kredis, ke tiu artikolo difinas la bazan sintenadon de Vatikano. Tamen ni devas rimarki, ke tiu supren citita artikolo el "Osservatore Romano" ne hodiaŭ, sed la 27an de Oktobro 1934 aperis. Nome tiam tio koncernis la ribeligon de malriĉaj laboristoj el Asturio kaj la Registaro konsistis el sinjoroj kiuj speciale anstataŭis la interesojn de reganta klaso. Ĝi estis la Registaro Lerroux - Gil Robles, kiu kun la plej impertinentaj kaj barbaraj venĝoj traktis la Asturianajn laboristojn. La brutaj rimedoj de tiu Registaro elvokis tiam la indignon de la tuta mondo, - tial la klarigartikolo de "Osservatore Romano". Sed hodiaŭ estas por Vatikano subite ĉio alia. Hodiaŭ ĝi silentas, ĝis kiam ĝi ne povas malkaŝe alpreni ian sintenadon kontraŭ la laŭleĝa Hispana Registaro. Ĉar hodiaŭ la ribelintoj ne estas la malriĉaj laboristoj, sed la faŝistaj oficiroj kaj aristokratoj. La anstataŭant-



toj de Vatikano benas hodiaŭ la mohemetanajn kaj idolanajn dungitojn farante de ili la glorajn defendantojn de Krista religio. Episkopoj kaj ĉefepiskopoj partoprenas en diversaj komitatoj de nacia "Junta" kaj centoj da pastroj kun pafiloj armitaj tiras al mortigado de siaj fratoj.

Ankaŭ la hispanaj okazintaĵoj denove montris, ke la Vatikano la eklezio kaj la tuta pastraro estas ĉiam en la flanko de tiuj troveblaj, kiuj la popolon subpremas kaj de ĝia sango vivas. La doktrino de katolocismo estas de hodiaŭ al morgaŭ aplikebla je la interesoj de la riĉuloj kaj posedanta klaso. Kia bata pruvo por la klara, prava kaj eterne egala instruo de katolika eklezio.

### ILJA ERENBURG PRI LA FASISTA INTERVENO

La urbo estas kvieta kaj brila. La vendistoj de ĵurnaloj kaj kravatoj krias en la "Puerta del Sol" (Ĉefa placo en Madrido). En la kafejo "La Granja" la pasiaj politikemuloj diskutadas de mateno ĝis vespero. Ili trinkas malrapide kafon kun lakto. La urbo transformiĝis en fronton. La milito punas ĝin; la milito fariĝis kutimo; la morto estas detako.

En la stratoj, la eksplodo de la haŭbizkugloj, pafkrakoj alportataj de la vento. Domoj en ruinoj. La fenestroj malformitaj al speco de nigra fosaĵo. Apude, alia domo ankoraŭ vivanta, kaj stare homo, ĉe ĝia fenestro, bantumas al si trankvile la kravaton. Estas malvarme, longe kaj kruele malvarme.

En la kaftrinkejoj, sen hejtado kaj kun fumo, la madridanoj pasigas la tempon ridante. Ili ne forgesis, ke ridi estas plezuro. Iuj infanoj regule vendas la ĵurnalojn. Lastatempe aperas nur dupaĝo. Mankas papero. La poetoj eldonis broŝurojn kun revoluciaj kantaĵoj. La versojoj estis verkitaĵaj, skribitaĵaj kaj presitaĵaj je du kilometroj de la tranĉeoj.

En la luksaj restoracioj, bruado de milicanoj. La restoraciestro blanke estita, servas, laŭ sia malnova stilo, supon el lontoj. Kelkafoje, anstataŭ lontoj, estas kikerroj aŭ rizo.

Ne estas vitroj en la balkonoj. Mi vidas knavinon aĉetantan flakonon da parfumo. La "Underwood"oj faras mitralan bruon en la domanguloj de tiuj madridaj katatomboj.

Senteble la stratoj iĝas dezertaj: la nokto. La urbo havas aspekton de kamparo. De tempo al tempo oni aŭdas proksime la ekbruegon de kanonpafado. Subite la lanternoj de aŭtomobilo eligas el la nokto kolonon kiĉel fonton, arbon. La urbo estas nevidebla. Oni sentas ĝin en ĝia grandiozeco, en ĝiaj perspektivoj, en ĝiaj kripligitaj palacoj.

Maljunulino krias. Ŝi vendas loteribiletajn. Mi perdiĝis. Mi iras du, tri stratojn kaj aŭdas proksime mitralilon.

En Madrido centoj da domoj estis detruitaj. Ĉiutage la bomboj kaj la haŭbizkugloj trapasas la konstruaĵojn. Mi vidis sur la strato homon kun sia viŝtuko. Ankaŭ li havis kombilon. Eble estas la nuraj objektoj, kiujn bombo respektis.

Nebula tago Decembra. Mi trairis la stratojn de la laborista kvartalo "Tetuán". Domoj malgrandaj, nigraj kaj malvarmaj. Razisto pretas razi soldaton. Infanoj, multaj infanoj. Tiuj infanoj el Madrido, brilaj kaj nehontemaj. Mi transiris la straton Rafael Salillas. La antaŭan tagon la germanaj aviadistoj estis bombardintaj tien. Ne ekzistas la domoj, nek la strato. Ruinoj, pecoj el legomoj, bruligitaj lignaĵoj. Ankoraŭ oni estas eltirantaj la kadavrojn. Torditan maljunulinon kaj knabinton sen kruroj. La rigardo senesprima. Rompita pupo. Post mi, juna virino ploras. Subite ŝi ĉesas plori.



ĝeni. Ŝia rigardo ŝtoniĝas. Ŝi restas sen voĉo, sen gestoj, kun etenditaj brakoj. Ŝi estas la patrino de la kripligita knabino. Laboristo alproksimiĝas al ŝi. La virino volas kunpreni la ruinojn de la infano. Ŝia doloro estas tiel granda, ke kostas al ni laboron ŝin disigi de ŝi. Oni diras al mi, ke jam estas eltiritaj tridek kadavroj, kaj oni serĉas ankoraŭ. Restis malkovrita sentegmenta ĉambro. Sendifekta restis la kudromŝino. Maljunulo eltiras pene portreton el la rubo. Sur brankardo oni portas kadavron de grava virino. Ŝi havas monstran ventron, terure kovritan de malumaj truoj.

Kion diri? Ĉu ripeti ĉiam, ke la faŝistoj estas kruelaj rabobestoj? Ke la homoj ne povas vivi sur la tero kun ili? Ke la batalo de la "Casa de Campo" estas la komenco de batalo longa kaj malespera, en kiu vivo luktas kontraŭ morto? La tuta mondo tion scias. Tion scias la kadukaj humanistoj de Okcidento kaj la gloroj pioniroj. Tion scias ĉiu ŝtono el Madrido. Ĉiu paco el ĝiaj ruinoj, ĉiu loko, kiu saviĝis el la detruo.

Mi forlasas "Tetuan" kaj daŭrigas sur mia vojo. Tie ĉi komenciĝas la tranĉoj. La laboristoj el Madrido kontraŭpelas la atakojn de la malniko. Ili ne ripozis ekde hieraŭ, nek ripozos morgaŭ.

-----

INTERVJUO KUN LA FRANCA VERKISTINO, ANDRÉE VIOLIS

La ĵurnalistino Andrée Violis estas bone konata kaj estanta en la internaciaj rondoj, ne nur pro ŝia konstanta kunlaboro en la ĵurnalo "Petit Parisien", sed ankaŭ pro ŝia literatura verkaĉo, produkto el ŝiaj vojaĝoj al Ruslando, Ĥinujo, Japanlando, Hinduĉinujo, k. t. p. Verkistino de malofta sentemo, ŝi dediĉis sian agerecon al la studo de la problemoj el la socia vivo, speciale en la landoj, kie estas disfalantaj la malnovaj modeloj de vivo kaj kie oni batalas por atingi pli bonan mondon. Pro tio estas kompreneble, ke nia batalo allogis Andrée Violis ĝis tia grado, ke la nuna estas jam la tria vojaĝo, kiun ŝi faras al nia lando, de post la 19<sup>a</sup> de Julio por studi la vivon en la frontoj kaj la konstruan laboron en la ariergardo.

Andrée Violis montriĝis surprizita, kiam ni petis de ŝi tiun intervjuon. Kun granda modesteco ŝi diris al ni, ke ŝiaj opinioj ne povas havi intereson. Nur pro nia insisto, ŝi decidiĝas komuniki al ni la impreson, kiun faris al ŝi Barcelono post kelkaj monatoj de foresto.

"Mi rimarkas, ke ĉio multe ŝanĝiĝis en Barcelono ekde Julio. Tiam la popolo vivadis kun febro. Estis emocie por mi vidi ĉi tiun admirindan landon en ĝia milita kaj revolucia fervoro defendantan kun tiom da kuraĝo kaj entuziasmo sian liberecon. Ĝi estis la aŭtentika spektaklo de armita popolo.

Hodiaŭ mi vidas la alian aspekton de Barcelono. Ĝia decida volo gajni la militon prenis pripenseman formon bazitan sur la realeco, kiun la vivo postulas.

Impresis min la facilco, per kiu la popolo alprenis la novajn elaperintaj el la situacio. La bezono de organizo kaj fera disciplino kaj la formado de armeo, malgraŭ ke tiu ideo estas plene kontraŭa al la pacifistaj sentoj de tiu ĉi popolo.

Mi admiras la konstruan laboron, kiun tiuj homoj efektiviĝadas. La organizon de la helpo al la rifuĝintoj, efektivigitan kun tiom da rapideco kaj energio. Por konacii pri ĝi, sufiĉas viziti la belegajn instalaĵojn de la Stadio, Pedralbes, k. a.

En la industria aspekto, la laboro ne estas malpli admirinda. La granda kapableco de la laboristoj evidentiĝas tie ĉi en ĉiu momento. Unu el la okazoj, en kiu ĝi definitive evidentiĝis, mi povis konstati en la laborejoj de "General Motors", kie mi povis admiri la kreon de nova kaj moderna tipo de ŝarĝveturilo posedanta ĉiujn ecojn necesajn por la milito kaj la paca industrio.



En tiu ĉi kataluna popolo kunfandiĝas la sudaj kvalitoj kun la nordaj: la entuziasmo kaj la praktika senco".

Ĉu vi havis okazon paroli kun la Prezidanto de la Generalregistaro de Katalunujo?

"Efektive, mi havis la grandan plezuron revidi la Prezidanton, tiun grandan batalanton, kiun mi konis en la unuaj tagoj de la enlanda milito. Mi komas lian vivon de senlaca pioniro de la libereco. Mi vidis lin nun en la intimoco, pozante antaŭ skulptisto. Ĉi tiu ĉirkonstanco donis al mi la ŝancon libere observi liajn plej karakterizajn trajtojn. Lian energian frunteton, lian penetreman rigardon, kiu samtempe montras ameman simpation; ili perfekte akordiĝas kun la karakterecoj de lia antaŭulo Francisko macià, kun kiu li ŝajnas konservi kontakton trans la tombo.

"KIA FIERECO POR POPOLO POSEDI HOMOJN KIEL TIUJN!"

Ĉu vi restos longan tempon inter ni ?

"Mi devas daŭrigi mian vojaĝon ĝis Madrido, kie mi travivis la tri monatojn plej emociajn el mia vivo, kiel rigardantino de la giganta lukto de tiu heroo ĉefurbo kontraŭ la internacia faŝismo."

Ĉu vi kredas, ke Barcelono povos travivi iam la saman tragedian situacion, kiel la ĉefurbo de la Respubliko ?

"Mi ne kredas nek akceptas tion. Mi estas konvinkita, ke se la malamikoj intencus ataki Barcelonon el la maro, - kiel tiom foje oni diris, - la popolo scius heroe defendi la ĉefurbon de Katalunujo."

Kia estas via opinio pri la internaciaj intencoj rilate al Hispanujo?

"Mia opinio estas, ke malgraŭ ke komence Hispanujo vekis la simpation kaj la kompaton de la bonvolaj homoj, nun oni reagis antaŭ la realeco de la faktoj, kiuj devigas en la tuta mondo respekti la nuran leĝan Registaron, tiun de la Hispana Respubliko."

-----

R I M A R K O J

Al ĉiuj, kiuj sendis al ni gazetojn, leterojn, eltranĉaĵojn, k.t.p., ni tre dankas.

-----

Ĉiuj estas petataj sendi al ni adresojn de journaloj, kiuj estas pretaj represi niajn oficialajn sciigojn.

-----

La Esperantistojn ni petas diskonigi niajn bultenojn kaj ilian enhavon aperigi nacilingve en sia nacilingva journalaro, sendante al ni ekzempleron.

-----

En multaj urboj ekzistas komitatoj por helpo al la Hispana Respubliko; al ĉiuj Esperantistoj ni petas subteni tiujn komitatojn. En la lokoj, kie similaj komitatoj ne ekzistas ankoraŭ, oni estas petata starigi ilin.

-----

Ĉiujn korespondaĵojn bonvolu sendi al: Comissariat de Propaganda, 14 d'April, 442 bis, BARCELONA, Hispanujo. (ESPERANTO-FAKO)





# GENERALITAT DE CATALUNYA

PRESIDÈNCIA

COMISSARIAT DE PROPAGANDA

Avinguda 14 d'Abril, 442 bis

BARCELONA

Telefon 82215

## COMUNICAT DE PREMSA

-----  
ESPERANTO-ELDONO

Nº 6.

Barcelono, 7. Febr. 1937.  
-----

### GRANDAJ FIGUROJ EL LA MILITO

#### La Generalo MIAJA

La ĵurnalo "La Publicitat" desegnis per grandaj trajtoj la figuron de la kuraĝa defendanto de Madrido.

"En ĉiuj historiaj movadoj de la homaro kaj de la popoloj, ni vidas la aperon de figuroj restintaj ĝis tiam en la ombro. La enlanda milito hispana ne estas escepto al tiu ĉi regulo. Amaso da homoj ignoritaj esti ĝis hodiaŭ popularaj en Hispanujo kaj en eksterlando. Pro la bataloj farataj, pro la koncentriĝo de fremdaj faŝistaj trupoj ĉirkaŭ Madrido, pro la graveco de la nuna lukta ludo, al kies sorto estas ligita tiu de la revolucio, la tuta mondo havas la rigardon fiksita sur la ĉefurbo de la Respubliko.

En Madrido, inter tiom da kuraĝuloj kaj da herooj, kiu meritas plej multe la respekton kaj admiron, tiu estas Generalo Miaja.

Kiu estas Generalo Miaja? Kiu estas tiu, kiu kondukis, kiel granda kaj lojala oficiro, kiel vora civitano, por defendi kaj savi la Respublikon?

Kiam eksplodis la ribelo, Generalo Miaja troviĝis ripoze en sia medio. Kiel homo de ideoj, li estis ĝis tiam nekonata. Tio estis normala; la Respubliko malpermesis, ke ĝiaj soldatoj okupigu pri politiko. Ĝi revokis lin, kaj Generalo Miaja plenumis lojale siajn devojn de civitano kaj de soldato.

Estis la 19an de Julio, je la tria matene, kiam Generalo Miaja estis urĝe vokita de Martínez Barrio, Prezidanto de la Parlamento, kiu estis ricevinta de la ŝtata ĉefo la mision formi la novan ministraron. Horon pli malfruc la Generalo prenis posedon de la Milita Ministrejo. Kelkajn horojn pli malfruc, je la 11<sup>a</sup> matene, formiĝis la nova ministraro - la ministraro Giral - kaj Miaja forlasis la Militan Ministrejon.

Ĉar lia familio estis falinta en la povon de la ribelintoj, malbon-dirantoj dubis pri lia lojaleco. Tiuj estas ĝusto, kiuj nun sentas por li veran respektigon.

Dum kelka tempo Generalo Miaja falis, por tiel diri, en forgeson, ĝis la antaŭeniro de la ribelintoj tra Andaluzio. La Kastila ebenaĵo estis defendita de la montoj, kies Despeñaperros-intermontoj estis gardataj de ministroj deciditaj morti antaŭ ol malantaŭeniri.

Sed estis necese oviti la kolizion en tiu loko portante la militon



al malamika teritorio. Ne ekzistis regula respublika armeo, kaj la popoloj trupoj ĵus komencis batali. La malamika armeo estis bone disciplinita, bone komandita, bone provizita de militmaterialo. Estis necese ĝin haltigi kaj ĉe se oble ĝin devigi malantaŭeniri. La afero postulis grandajn homamasojn kaj cerbon por komandi: tiu ĉefo estis Generalo Miaja.

La defendanto de Madrido estas homo de trankvila kaj serena mieno, tre afabla kun siaj kunparolantoj kaj sesdekjara proksimumo.

Tuj li kunigas siajn trupojn, kiuj estis infanteriaj kaj maraj soldatoj, kelkaj dogangardistoj, policanoj, ĝendarmoj, milicianoj plejparte armitaj per ĉaspaŝiloj; kelkaj kanonoj kaj dek du mitraliloj. Lia batalantaro ne supernombriĝis tri mil homojn, sen aviadistoj. Estis tamen kun tio, ke li entreprenis sian marŝon tra la provinco Jaén (legu Haen') kaj pelis la ribelintojn ĝis je dek du kilometroj de Kordova!

Pli malfrue, dank' al lerta taktiko, li kaŭzis nombrajn punojn al la malamiko; maltimaj atakoj, realigitaj ĉiam sen grandaj perdoj...

Subite oni vokas lin el la Militministrojo. Kial? Neniu scias tion.

Iom poste, Miaja estis elektita komandanto de la tria arma divizio. Restarigante kun la tuta necesa zorgo la ordon kaj la disciplinon, li pruvis, ke li estas inda je la konfido, per kiu oni lin honoris.

Generalo Miaja estis en Valencio, kiam unu el liaj filoj, aviadista leŭtenanto, falante en la sektoro de la rivero Tajo (legu Taño) en la ribelintajn vicojn, post epika batalo, estis kruele buĉita de la krimistoj de Franco (legu Franko), ne sen antaŭa faligo de kelkaj el ili, antaŭ ol fali li mem.

En tiu ĉagrena cirkonstanco, Generalo Miaja estis vokita de la Registaro, por ke li sin metu sub la ordonojn de la Militministrojo. Dum unu monato, ĝis kiam la Registaro translokiĝas al Valencio, oni scias nenion pri Generalo Miaja. Estas de post tiu momento, ke la figuro de la granda soldato prenas eksterordinaran reliefon: oni konfidas al li la Prezidentecon de la Defenda Konsilantaro de Madrido. Ankoraŭ ne pasis tri monatoj... Tamen ili estos sufiĉaj al la defendanto de Madrido, por aliformigi la malferritan, sendefendan urbon, en fortikan, nealmiliteblan lokon.

Elektinte kelkajn bonajn kunlaborantojn, Generalo Miaja sciis bone hardi ĉiujn trupojn de la ĉefurbo. Li redonis la esperon al la madridanoj, montrante al ili, ke la defendantoj de la Respubliko estas kapablaj je ĉiuj oferoj por savi la trezoron, kiun la nacio konfidis al ili. Lia neper-turbecbla trankvileco faris la plej bonan impreson sur la respublikanajn batalantojn, kiuj havas pli ol iam la konvinkon, ke kun Miaja ili ne povas esti venkitaj. Ili estas certaj pri la estonteco. Ili scias, ke la venko estos longa kaj malfacila, sed ili ne dubas pri ĝi. Ili obeas kun disciplino, sen hezito, je ĉiu ordono de la supera ĉefo de la defendo.

Estas dank' al tiu disciplinita armeo, ke la defendanto de Madrido povis meti ekster batalo grandnombrajn ribelulojn.

Kaj por rekompenci lin pri lia arda respublikaneco, la Ĝeneralregistaro de Katalunujo, povis fari post laborplenaj klopodoj kaj sen lia scio, interŝanĝon de kaptitoj, pro kiu estis liberigitaj kvin membroj el lia familio konservitaj de la ribelintoj en Molilla de post la komenco de la malmikeco.



Generalo Miaja staras nun inter la herooj konataj kaj nekonataj. La cent mil homoj, kiuj respondecas pri la defendo de Madrido, havas je li grandan ĉefon, kaj ili scias tion. Miaja defendas la Respublikon sen zorgo pri sia vivo. Vera respublikano, homo!

-----

### LA KAPTITOJ DE "CERRO ROJO."

En la lastaj tranĉeoj de faŝistoj ĉe "Ruĝa Monto" leviĝis la manoj: "Fratoj, ne pafu! Kaj la frontkomunikoj sciigis pri la batalo ĉe "Ruĝa Monto", kiu antaŭe nomiĝis "Anĝelmonto", ke la soldatoj de la unua miksi-ta Brigado faris pli ol cent kaptitojn.

Pli ol cent kaptitojn... ili ne aspektas, kiel soldatoj, sed kiel hordo da almozuloj, kiuj jam de antaŭ longe ne kontaktiĝis kun iu homa estaĵo. Duonnudaj, nigriĝintaj, malpuraj kaj malsategaj. En iliaj vizaĝoj staras skribitaj la mizero, la sklaveco kaj teroro. Tiuj estis la soldatoj de Franco...

Kvazaŭ ĉiuj dormas. La soldatoj de la Popolarmeo donis al ili manĝaĵojn, kiujn ĉiuj rapidege formangis.

"Kion vi tie mangis?"

"Kelkajn sardinojn kaj iom da kolbaso..."

Ili estas knaboj de 20 kaj 22 jaroj. El Galicia kaj León, sed la plejmultaj devenas el la mizeraj vilaĝoj de provinco Cáceres. Malmulte ili scias pri la vivo kaj batalo por la vivo. Sed en tiuj malmultaj monatoj da batalo, la pistoloj de la faŝistoj sur iliaj dorsoj, komprenigis al ili, ke ilia loko estas ĉe ni.

Malrapide ili alkitiniĝas al la nova ĉirkaŭaĵo. Ili flikas siajn ĉifonajn vestaĵojn, kaj kunligas siajn plandumojn per ŝnuroj. Tiu estas la postrestaĵo el unu kompanio de la infanteria regimento 27....

Tiuj kamparanoj el la provinco Cáceres, el Galicia, la soldatoj el León, ĉiuj tiuj knaboj el la 27<sup>a</sup> regimento montras la saman aspekton, kiel la unua, kiu el la faŝista infero forkuris: la aspekton de pafmortigoj, torturoj kaj krimoj.

Balbutante komencas Anĝel Leo Manzano, el Malpartida: "Ĉe ni ili pafmortigis ĉiujn membrojn de la "Popoldomo". Kaj Ricardo Bruno Cano murmure diras: "Ĉiu scias en Valencia de Alcántara, ke la socialistaj deputitoj Felipe Granados Valdivia, Gabriel Dionisio, Anada Vera, estis pafmortigitaj.

Alia: "Kion mi en Cáceres vidis, oni ne povas ripeti. Estas miloj, miloj!! Nokte ili prenis ilin. La lumo en la vilaĝoj estis estingita. En ŝarĝaŭtomobiloj ili estis sur la kampon prenitaj. En la domoj ni aŭdis la salvojn. Sed la virinoj ne ploris ĝis la tagiĝo..." Tiel rakontas la kaptitoj, komunikoj, nomoj de mortpafitoj, de siaj propraj konatoj!

"Oni diris al ni", kaptitoj sekvis la rakonton, "ke ni devas batali kontraŭ la komunistoj, kiuj ribelis. Ni devas defendi la Respublikon, sed oni ĵurigis nin ĉe la monarĥia flago, kaj ĉe la defiladoj estis ludata la malnova "reĝa marŝo".

"Ĉu tio oni traktis nin, kiel hundojn. La oficiroj gardis nin. Konstantaj minacoj. La plej malgranda eraro estis tre severe punita.



Arta 6/

"ki baldaŭ komprenis, ke ĉio estas trompo. Oni garantiis al ni, ke fremdlegionanoj kaj Marokanoj, kiuj ĉiam antaŭ ni batalis, sidas jam en Madrido. Ni devas preni nur kelkajn urbkvartalojn en kiujn la ruĝuloj sin enmetis".

"Denove ili diris al ni", ie iu alia kaptito, "ni batalas nur kontraŭ la rusojn kaj francojn, kiuj Madridon defendas. Komunistoj, socialistoj kaj respublikanoj jam ĉiuj falis, la ĉefurbo estas nur en la manoj de Rusaj kolonistoj".

"Kaj pro tio" interparolis unu juna Franco - soldato, ni tre ĝojis ridante en viaj tranĉeoj la hispanan lingvon".

Poste vizitis "Pasionaria" la kaptitojn. Kiam ŝi alvenis, levigis ĉiuj kaptitoj, "Pasionaria" parolis al ili kiel al la fratinoj, kiuj estis de militistaro, ke la eklezio kaj granda burĝaro ekspluatitaj kaj trompita.

"Ni scias, ke vi timas, ĉar niĉj malamiko prezentas nin kiel barbarojn kaj mortigistojn. Sed ne timu. Via vivo estas same sankta kiel nia. Estu kvietaj kaj vidu la diferencon inter ni kaj ili. Se ni estus la kaptitoj, tiam ili nin certe tuj mortpafus. Sed vi, kiuj venis kovrita kun mizerio, vi estos baldaŭ liberaj kaj denove ŝanĝos vin en homojn. Ni estimas ne nur vian vivon: ni atentigas ankaŭ, ke estu al vi agrable kaj bone".

La kaptitoj interrompas la "Pasionario'n" kaj hurais la Respublikon, la "Pasionario'n" kaj generalon Miaĵo'n.

"Vi komencas la novan vivon" sekvas "Pasionaria" sian parolon. Nun vi komprenas la diferencon de armeo el kiu ni venas kaj tiu de via. Vi estas laboristoj; Vi estas viktimoj de "Junker" kaj kelkaj militistoj, kiuj rompis sian ĵuron. Ili diris al vi, ke ni ruĝuloj estas murdistoj. Sed vi vidas, ke ĝi estas malvero. Ci vi estas filoj de la popolo. Via vivo estas defendata. Oni donas al vi vestaĵojn kaj manĝaĵojn. Tiu estas la Respubliko kiu oni volis priinsulti kiel ruĝa, estanta en la realeco nenio alia ol unu efektiva demokrata Respubliko, estanta la apogo de ĉiuj civilizaj popoloj.

#### ĈIUJ ESPERANTISTOJ EN CORDOBA MORTPAFITAJ.

Faŝisto Franco imitante siajn majstrojn Hitler kaj Salazar komencas nun persekuti ankaŭ la esperantistojn.

En Cordoba Franco ordonis la fusiladon de ĉiuj esperantistoj, motivante sian decidon, ke esperantistoj kiel amantoj de paco kaj adeptoj de internacia lingvo formas la danĝeron por la hispana popolo.

Per tiu ago barbara, Franco denove montris al la mondo la veran aspekton de faŝista kulturo.

#### LA FESTOTAGO EN VITORIA

La pastro Luĭs RamÍrez, el Vitoria priskribis en sia komuniko la Dimanĉmeson, kiel ĝi estas celebrata ĉiusemajne de faŝistoj en la Nordhispana provincurbo Vitoria.

En Vitoria estas ĉiuj virinoj, kiuj estas konsiderataj kiel maldekstranaj, en la malliberejo. Certe ĉiuj, se ili ne estas mortpafitaj, al ĉiuj estas la kapo ĝiskalve razita; nur postrestis unu malgranda harligo, al kiu estis kunligita unu rubando en la koloro monarĥiana.

Dimanĉe estas tiuj virinoj en kolonoj el la malliberejo eksteren lasitaj, kaj inter spaliroj de Falangistoj, Reketanoj kaj Karlistoj (-faŝistoj) kondukataj al la preĝejo. Tiu procesio tra la ĉefstratoj de la urbo apartenas al la plej ĝentilaj horoj. La malliberuloj devis de tempo al tempo levi la manon kaj vokii: "Arriba España!" (Supren Hispanujo!),



/Nº 6./

Malsupren kun Ruslando! k.t.p.. La faŝistoj ridas kaj la faŝista loĝantaro ridas kaj kondukas la procesion al la preĝejo, por aŭdi la sanktan meson. Tiel aŭdas la katolikoj el Vitoria la Dimanĉmeson. En la returna vojo de preĝejo al malliberejo la sama spektaklo estas ripetata.

Elirante el la preĝejo la venkintoj surmetis sur iliaj manoj la pezajn katenojn. La malkonkintoj estas ĉiuj ne nur virinoj, sed ankaŭ patrinoj. Inter ili timeme marŝas ankaŭ kelkaj iliaj infanoj. La infanoj kies patroj unue estis mortpafitaj kaj nun ili vidas siajn patrinojn en tiu procesio.... Infanoj kun malkvietaj mensoj kaj patrinoj kun disŝiritaj koroj.

El la balkonoj el la fenestroj en la stratoj ridas la "piuloj". Tiu tragedia festo de kruuleco kaj sovaĝeco estas simila al tiuj de la inkvizicio, kaj ĝi estas de la piuloj el Vitoria nomata "la sankta Ofero de la Meso el Vitoria".

### "NOVA IBERIA" EN ESPERANTO

"NOVA IBERIA" la oficiala organo de Generalitat de Catalunya aperos ek de nun ankaŭ en la lingvo Esperanto. "NOVA IBERIA" estas presata sur lunksa papero en tri aŭ kvar koloroj. La enhavon prizorgas la plej eminentaj katalunaj verkistoj, pentristoj, muzikistoj, artistoj, diplomatoj, teknikistoj, ĵurnalistoj k.t.p.. "NOVA IBERIA" prezentas la vivon de nova Katalunujo, el vidpunkto ekonomia, scienca kaj politika. "NOVA IBERIA" estas nun la plej altuala gazeto en la mondo. "NOVA IBERIA" aperas ĉiu monate kaj kostas tri pesetojn.

Oni povas aĉeti "NOVAN IBERION", sendante al la redakcio tri pesetojn (ne stampitajn), aŭ alian monon en la valoro de tri hispanaj pesetoj. Ankaŭ la internaciaj respondkuponoj de poŝto estas akceptataj. La adreso estas; Komisarejo de Propagando de Generalitat de Catalunya, Avinĝuda 14 d'Abril, 442 bis, (ESPERANTO - FAKO), Barcelona.

### LA GERMANAJ OFICIROJ EN LA RIBELA ARMEO.

Du milicanoj, kiuj sukcesis forkari el faŝista malliberejo, sciigas, ke inter faŝistoj kaj simplaj soldatoj regas granda malkontenteco, pro la malsamaj traktadoj de ambaŭ partoj.

La faŝistoj manĝas pli bone kaj ricevas tri pesetojn tage, kiam la soldatoj devas kontentigi kun terpomoj kaj kvindek centimoj. Ĉiuj teknikaj kaj komandaj postenoj estas de germanaj oficiroj okupitaj. La hispanaj oficiroj estas uzataj en interlando kiel rekrutoficiroj.

### Rimarkoj

Al ĉiuj, kiuj sendis al ni gazetojn, leterojn, eltranĉaĵojn ktp., ni tro dankas.

Ĉiuj estas petataj sendi al ni adresojn de ĵurnaloj, kiuj estas pretaĵniajn oficialajn sciigojn represi.

La esperantistojn ni petas diskonigi niajn bultenojn kaj ilian enhavon aperigi en sia nacilingva gazetaro, sendante al ni la ekzempleron.

Ĉiujn korespondaĵojn bonvolu sendi al; Commissariat de Propaganda, 14 d'Abril, 442 bis, Barcelona, Hispanujo. (ESPERANTO - FAKO).





# GENERALITAT DE CATALUNYA

PRESIDÈNCIA

COMISSARIAT DE PROPAGANDA

Avinguda 14 d'Abril, 442 bis

BARCELONA

Telèfon 82215

## COMUNICAT DE PREMSA

ESPERANTO - ELDONO

Nº. 13.

Barcelono, 10/IV/1937.

### NI NE TROIGU LA ANGLAN TIMON



Anglujo, eks-reĝino de la maroj kun krono de vera mara potenco, ŝajnas esti perdinta ankaŭ la kompason kaj la ŝipvojaĝkarton. Hodiaŭ ni vidas la anglan politikon, restanta inter la rifoj, videblaj ĉe alta aŭ malalta marmovo, loko kien ĝin surmetis ĝiaj pekoj, el kiuj la plej grava estis la ebligado de la itala ago kontraŭ Abisenujo.

La konduto de la brita registaro en tiu okazo, diferencigas per tranĉvundo la hodiaŭan Anglujon, el la glora pasinteco, ne nur laŭ la historio, sed ankaŭ per vivantaj kaj latentaj ligiloj. Baldwin ne sciis paroli kiel Cronwell, nek Pitt, nek Palmerston, nek Disraeli, kaj en tiu tago Anglujo ne estis plu tia lando, kia ĝi estis por la mondo antaŭe kaj ĉie.

La angla popolo kortuŝita pro pacamo, nutrita per la senarmigo, senkulpigis sian registaron, sed kiam la ang-

loj kun velka rideto malgajsece diris al fremdulo: "Ho vel ni ne estas jam tiel fortaj, kiel oni kredis", - tiam ili estis kantantaj la funebran ceremonion al la por ĉiam malaperigita unua monda potenco.

La potenco de la malhumila Anglujo, ne nur estis bazita sur ĝiaj kroz-kaj kirasŝipoj, kiuj antaŭ nelonge ĉie estis rigardataj pli respektite ol time; ĝi estis ankaŭ bazita sur ĝia prunteco, sur ĝia kredo, kiu, merititan aŭ nemerititan, havigis al ĝi la reprezentadon de la morda honesteco. Anglujo, ĉemetita en malordaj okazigitaj de malpuregaj



politikuloj, kies laboro estis tutprepari tiun grandegan karnavalan pastecon Hoare - Laval, ridigis la tutan mondon unue, kaj poste ĝin indignigis, nepre devis fini dirante en la Komuna Ĉambro per buŝo de Lord Crambrone aŭ de alia Lordo el tiuj ĝin regantaj: "Jes, sinjoroj deputitoj, ni scias, ke la germanoj fortikigas la Gibraltaran markolon, sendube por nin forpeli el la kruta ŝtonego, sed konsideru, ke nun estas ekstreme nenormala situacio."

Dum la bonegaj anglaj epokoj, la registaro ne estus permesinta la lokadon ĉe Ceuta, de la unua baterio, nek ke oni ĝin demandu en la Parla-mento pri la laboroj de la Hitler'aj inĝenieroj en ambaŭ marbordoj. Tiam la germana "Fuehrer" estus ricevinta lakonan komunikacion pli-malpli tiel tekstantan: "Tuj ĉesigu la militan aktivecon en Hispanujo kaj en la Hispana Maroko; alie ni iros ĝin haltigi, kaj antaŭzorge ni subakvigos ĉiujn viajn militŝipojn."

Oni belrakontis sufiĉe pri la angla timo. Forportitaj de la fluo, ni falis ankaŭ en troigojn de la timigo dirita, koncerne la anglan politikon. Estas timigo en Francujo, speciale en la Popola Franca Fronto, antaŭ ĉio pro la necerteco de la interligo kun la Brita Unuiĝo, akceptante, ke la angla popola opinio, kiu estas profunde malkvieta pro la nunaj momentoj, kredas sincere, ke nesingarda paŝo farita de ĝia registaro, povus okazigi teruregan militon, kies eliro estus tre malklarega al la Brita Imperio.

Sed la Baldwinaj "tories" ne estas timantaj, kvankam ili ŝajnigas, ke ili timon sentas, por teni la publikan opinionon timanta. La maltrankvilaĵoj de la "tories", se ili sentas ilin, ne havas rilaton kun tiuj de la aliaj angloj; ili ne timas pri la sorto de Anglujo, sed pri tiu de la monda kapitalismo, el kiu ili estas unu el la plej elstarantaj branĉoj, eble la ĉefa el ĉiuj.

La tragedio de la angla kapitalistaro enhavas du kaŭzojn: Unu el ili estas okaza, provizora; ĝi estas pro senhaveco de la direktantaj kapoj, malbonaĵo aliparte tre disvastigita inter la konservativaj klasoj en ĉiuj landoj, kaj la dua kaŭzo estas la sincereco de la brita patriotismo, nemiksebla kun egoista sento de klaso. Estas tre malfacile enfiltrigi al la brita popolo la revolucieman senton.

Anglujo estas falanta en malpurajn akvojn de kapitulacanta politiko, kiu havas nenion komunan kun la tradicia politiko angla.

Iun tagon la brita popolo diros al la registaro de la maljuna "tory": "Ni lasu flanken la faŝismon kaj la revolucion; ni zorgu nur pri la ĉefaj interesoj de Anglujo. Restu ni fidelaj al la Nelsona devizo, la plej grava, kiam la patrujo estas en danĝero." Sed ĉu tiam la Baldwinaj registaro povos pruvi, ke ĝi ĉiam plenumis sian devon?

### LA REGISTARKRIZO EN KATALUNUJO.

La krizo de la Kataluna Registaro, kiu pro la graveco por trovi la solvon nekutime longe daŭris, montras la stabilecon, kiu regas en nia lando. Spite la militon kaj la socialan revolucion, spite kelkajn akrajn kontraŭojn sur la ideologia tereno, ne okazis dum la tuta krizo ia plej malgranda akcidento. Tion oni povas nur de unu bazo konkludi: Super ĉiuj diversaj konceptoj de la kontraŭfaŝistaj organizoj, staras la konscienco kaj la forta volo por komuna detruo de racia kaj eksterlanda faŝismo. De la esperoj, kiujn nia malamiko ĉe la okazo de tiu krizo havis, estas denove nuligitaj.



MANOVROJ DE LA POPOLA ARMEO EN KATALUNUJO.

La hispana popolo estas eksterordinare kontraŭmilitista. Ĝia milittekniko estas pro tiu kaŭzo tre malantaŭ restinta. Krom tio venas la fakto, ke iaj psikologiaj faktoroj, la rilato inter la tempo kaj la materialo, kiujn oni opinias havi superflue, subtenas la modernan armeon. La vico de konfliktoj, la vico de etapoj sur ĉiuj terenoj devas esti trakurintaj, antaŭ ol eblos, konstrui la militkapablan armeon kaj la produktiokapablan militindustrion. Ankaŭ la ekzercigo de individuaj soldatoj estas jam hodiaŭ kun pli granda zorgo entreprenata kaj plue la antaŭmilitista edukado de junularo estiĝis grava instrumento por la venko super la faŝismo.

Ne nur la analfabetismo estas kontraŭbatalata, ne nur estas al la juna soldato de la Popolarmeo instruita la uzado de diversaj armiloj, sed ankaŭ la taktikaj kaj strategiaj konoj. Ekonomio de la fortoj, atakgvitado ktp., estas donata al la estonta soldato de Popolarmeo.

En la lastaj tagoj okazis en Katalunujo la unuaj manovroj de la kuraĝaj viroj el la Popola armeo, kiuj estis organizitaj de la Kataluna Komitato por Popolarmeo. Ili estas la komenco de la serio de manovroj, kiuj regule en la tuta Katalunujo okazos.

Unu el tiuj manovroj okazis en la proksimo de Elonas, kie estis similita la albordego de faŝistaj trupoj el la maro je la distanco de proksimume 15 km. kie ankaŭ estis disvolvita la batalo. Kelkaj motorigitaj brigadoj estis en la batalon ĵetitaj por la faŝistajn albordegitrupojn reĵeti al la maron.

Aliaj manovroj havis la taskon defendi la vilaĝojn. Ĉiuj tiuj ekzercoj montras la valoron de nia juna Popolarmeo, la zorgema instruado de niaj trupoj kaj oficiroj, kiuj grandparte devenas el la labora popolo kiuj al la Respubliko fidelaj restintaj oficiroj plej bone kunlaboras.

LA RELIGIA KULTO EN BASKOLANDO.

La Baskaj katolikoj, kiuj ne fortikigis sin kun la armilo en la mano malantaŭ la muroj de la temploj, kie ili adoras sian Dion kaj kiuj tuj komence de la militeksplozostariĝis je defendo de la Respubliko por kontraŭagi la uniformitajn kontraŭulojn kaj la komercistojn en pastra vesto, solonigis kiel kutime la evangelan okazintaĵon pri la morto de Kristo.

.....  
Estas du aspektoj de la problemo: la ekzisto de kontraŭfaŝista katolikamaso lojale staranta ĉe la vicoj de la Respubliko; la alia, la politiko sekvanta koncerne la Eklezion kaj la necesaj malpermesoj altrudataj al ĝiaj aktivecoj ekster la sferoj de puraj religiaj sentoj.

La plej granda parto el la hispana episkoparo kondukis sin kiel ribeluloj al la leĝa registaro kaj la perfiduloj de la popolaj sentoj. Al tiuj ĉi ribeluloj kaj perfiduloj estas necese trakti kiel tiajn, ilin. La kulpulo devas esti punata, sed tio, ke la reala politiko deflankigu la kunhelpon de la Dikredantoj, kies lojaleco estas respublikane pruvita, kaj ne akceptu ilian kunlaboradon necesan en la giganta tasko por rekonstrui liberan kaj prosperan Hispanujon neanta al ili la spiritan plezuron de ilia kulto.

U. S. S. R., solvis la religian problemon per perfekta revolucia indeco. En ĝi ekzistas preĝejoj kaj praktikantoj de ĉiuj kultoj, kiuj ne sentas sin malliberaj pri la ekzercado de sia religio, ĉar ne estas same malpermesi ĝian registaran intervenon kaj la monopolon de la ekonomio kaj la instruado, ol bari iliajn dialogojn kun la Dioj, limigita al ilia funkcio de animpastroj.

Estas vero, ke la hispana Eklezio fariĝis kulpa pri teruraj krimoj kontraŭ la popolo. Ĝiaj episkopoj kaj ĝia cetera pastraro sindonos al la perfida celo kaj verŝis kontraŭfaŝistan sangon. Tiuj ĉi krimoj devas esti punataj.



Nº. 13.

Sed koncernante la punon, kompreneble, ne devos kuniri la kulpuloj kun la senkulpuloj.

(el "Trebball"-organo de PSUC.).

### KIEL STARAS LA AKCIOJ DE LA RIBELULOJ.

La akcioj de hispanaj ribeluloj en la lasta tempo falis. Kaj se ni parolas pri la akcioj, do ni pensas nur bilde. Fako estas, ke la industripaperoj de ribelintoj en la eksterlandaj borsoj forte falis.

Tiu simptono havas sian signifon. La borsobarometro montras malbonan veron por la ribelintoj.....

Se ni ĝis nun ne multe interesiĝis pri la notoj de la borsoj - la lastaj raportoj el Parizo permesas al ni tamen ion aŭdeti.

Dum la lasta Vendredo oni povas en la Pariza borskomuniko legi; "Postagemeze venis forta refalo de ĉiuj industriaj kaj minejaj valoroj de hispanaj ribelintoj." Kelkaj notoj de la plej gravaj paperoj konfirmas la veron de tiu opinio.

La "Montlaborakcioj" el Rivotinto fermis matene je 2,970, la malfermita kaj post ĝi sekva tago kun 2,910 estis ĉe la fino notitaj je 2,725. La refalo konsistis do dum unu tago de 245 frankoj.

"Peñarroya" -akcioj malfermis je la sama tago kun 445 kaj fermis ĝis al 1370. "Ĉe tiu okazo ĝi rilatas fortan refalon, almenaŭ ke ĝi antaŭ dek tagoj estis signita", skribas la Pariza gazeto". En politikaj kaj la financaj rondoj tiu refalo postlasis grandan impreson".

Fakte, tio koncernas la refalon en la ekonomia fronto.

Ne nur la refalo de la industrivaloroj de la ribelintoj ĉe la eksterlandaj borsoj, ankaŭ la vico de aliaj simptomoj, permesas supozi, ke eksterlando pli kaj pli konvinkiĝas, ke Franco ne povas venki tiun militon. Per taŭga propagando, per pli ol malpli puraj rimedoj kaj per subteno de iaj interesiĝintaj rondoj, la ribeluloj sukcesis en eksterlando ekveki la kredon, ke ili gajnos la militon. Kaj eĉ baldaŭ venki. Sed spite tion montriĝis jam tre klare, ke ne ekzistaj la argumento por rapida venko de faŝismo. Kaj hodiaŭ pli kaj pli oni rimarkas la konvinkon, ke Franco, nek hodiaŭ, nek morgaŭ, nek - iam povos venke fini sian aventuron. La lastaj sukcesoj de la Popolarmeo, kiu konstante estiĝas pli potenca armilo de la Respubliko kaj ankaŭ ne malpli al tiu konvinko, alportas la konstante plibonigita organizo en internlando.

Pro tio ne estas mirinde, ke la borsoj komencis la retiron sur la ekonomia fronto. Ne nio estas tiom influa kiel la kapitalo, ne nio montras pli bone la situacion kiel la barometro de la borso. Ĉiuj kapitalistaj politikistoj kaj registaroj, kiuj por la ludkartoj de la ribelintoj vetludis, montriĝis jam seniluzigitaj. Por ili kaj por iliaj adorantoj komencis jam la horo de retiro kaj malvenko.

### LA HIDRARGO DE ALMADEN.

Ĉiuj militoj havas ekonomiajn celojn, la tuta mondo scias tion, kaj ne estas malpli interesa vidi kiom da fojoj la minaj riĉaĵoj de Hispanujo devis esti defendataj kontraŭ la fremdaj envioj.

Pri tio koncernata Almaden, kies la hidrargaj minaĵoj ŝajnas esti konitaj de la Roma antikveco, la historio estas riĉa je faktoj kaj okazaĵoj.



Nr. 13.

Tiu metalo estis ankaŭ tre bone konata en tiuj lokoj, en Sisapon - kies ruinoj kuŝas je ĉirkaŭ 10 km. de Almaden -, kie troviĝis kelkaj minoj. La Kartaganoj ekspluatis tiujn tavolojn. La skribaĵoj de Teofrasto, 332j. a. j. K., kaj tiuj de Vitruvo, pravas, ke tiuj tavoloj estis bone konataj, ĉar oni eltiris el ili produktojn destinitajn al la pentroarto kaj senditajn al Grekujo kaj al Romo.

Sub la Araba regado tiuj minoj estis ekspluataj kiel atestas la maŭra kronikisto Rasis; moderna kronikisto, la historisto Lafuente, diras, ke en la palaco de la Kalifoj de Medina Zahara, ekzistas merkuro devenanta de Almaden. La ĉeesto de araboj en la Almaden a regiono estas ankoraŭ videbla pro certaj terminoj enkondukitaj en la lingvaĵon.

Konkerante la vilaĝojn en la regiono, en 1151, Alfonso VII alprenis Almadenon, kiun li cedis al la templanoj. Sed ĉi tiuj, konstante ĝenataj per la enkuroj de la araboj, cedis la tutan teretoron de Kalatrava, - inkluzive de la Almadenaj minoj - al Sanĉo III<sup>a</sup>.

En 1168, alia reĝo, Alfonso VIII<sup>a</sup>, konsentis la Almadenajn minojn al alia ordeno, al tiu de Kalatrava - kiu tiam ekposedis ilin.

La famaj minoj ŝanĝiĝis ofte je manoj, ĝis 1492, post kiu dato ili estiĝis la heredaĵo de la katolikaj reĝoj. Dum tiu tempo ili estas la akiraĵo de la diversaj koncesiistoj: Ordeno de Kalatrava, Italoj, Genovanoj, k. a....

En 1525 oni registras okazintaĵojn ion gravan en la historio de la "profitemeco".

La imperiestro Karolo I cedas al entreprenantoj, por 200,000 dukatoj, diversajn privilegiojn, inter aliaj tiun de la Almadenaj minoj, kiujn la diritaj entreprenantoj ekspluatis je granda produktado de 1525 ĝis 1545. Tiuj ĉi sukcesas dum tiu tempo aprobigi kontrakton, kiu plilongigas ilian privilegion je unu jarcento, kompanse de ĉiu jara livero je 4,500 centfuntoj da mineralo. Post 1645, la minoj reŝanĝas je posedantoj.

De post tiu dato komenciĝas ankaŭ la Kalveria suferado de la teknikistoj, kiel de tiu Juan Bustamante, kiu proponis enkonduki procedojn de la moderna ekspluatado, kaj kiu fiaskis pro la nescio de siaj samtempuloj. La eksperementisto finiĝis en la malriĉeco, sed la negocistoj fine sciis klare vidi kaj ekspluatis liajn laborojn.

En 1775 granda brulado prirabis la minojn. En la sama tempo oni konstruis du fornojn pli, portante la tuton ĝis 16, kies plejmulto ekzistas ankoraŭ nun.

En 1776 germanaj teknikistoj prenis la direktadon en la minoj, sed ili malzorgis ilin ĝis tioma grado, ke en 1791 la direktado estis redonita al teknikistoj hispanaj.

En 1800 oni instalas tie la vapormaŝinon, kio pligrandigis la produktadon.

En 1810 la franca invado igis la ekspluatadon malfacila, kvankam ĉi tiu estis farita je ilia profito. Generalo Viktor okupis je tiu jaro Almadenon komandante 36,000 homojn, kaj tie li restis ĝis 1812.

En 1836 la "Karlistaj" militoj venis malaranĝi la regionon. La partianoj de Don Karlos sieĝis Almadenon kaj kaŭzis grandajn rabaĵojn en la ĉirkaŭaĵo, ĉefe de la ministroj. En 1838 la Karlistoj prenis la vilaĝon kaj formis milicojn por la defendo de la minoj.

En 1840 la laboro reorganiziĝis sub diversaj direktadoj, sed en 1874 okazis ribeloj pro la enkonduko de la maŝinismo kaj unu direktoro estis mortigita.

La malamo al la maŝinismo rapide malaperis. En 1918 oni enkondukis Dieselmotorojn, kaj en 1922 komenciĝis la elektrigo kaj la konstruado de novaj fornoj por anstataŭigi la malnovajn.

Tia estas, mallonga, la historio de peco da tero, kiu denove estas por niaj malamikoj objekto de ambicio de la nuna milito.



LA AKCIOJ DE FRANCO MALVALORIĜAS.

Lastatempe oni registris okazintaĵojn klare starantajn en la pasivo de la eks - generalo.

Francujo havis sian periodon de la Dupes, sed la ribelinta ĉefo ankaŭ havis sian semajnon de la komplotoj. Certe baldaŭ kaj senkompata punado povis remeti por kelka tempo la aferon en ordo, sed ĉi tiuj aferoj estas kiel la fulmotondroj: ili lasas la postsignojn.....

La ribelula kampo konis ankoraŭfoje la malvenkon: al tiu de Guadalajara aldoniĝis tiu de Pozoblanco. Anstataŭ preni de ni la Almaden an hidrargon, estas ni, kontraŭe, prenontaj la mineraĵon de Peñarroya. En la borso, tiu renverso sur la militista tereno sentigos sin - renverso, kiu nur povos haltigi la ribelulan atakon sur la Baska fronto, kiu sin montras per pli da masakro de senkulpuloj, kiel tiu de Durango, - per progresoj sur la tereno, kiuj estus kompensitaj, aliflanke, per la antaŭeniro de la Santardaranoj sur Burgos on.

Tiuj malsukcesoj kreas malagrablaĵojn en la komandantaro. Orgaz dimisias deklarante, ke li ne volas plu batali kun la Italoj.

Sur la internacia plano la aferoj de la ribeluloj ne funkcias multe pli bone. La germana ĵurnalaro akceptis kun kontentiga malestimo la malvenkon de Italoj, konkludante pri la milita malsupereco de tiuj ĉi lastaj. La repaciĝo Hitler - Ludendorf estas por ni de la plej altaj graveco, tial ke ĝi fariĝis sur la jenaj kvar punktoj: 1) La batalo kontraŭ la germana katolikismo (ĉu la revivigo de la "Kulturkampf")?, 2) Rifuziĝo je la Itala alianco; 3) Forlaso de la interveno en Hispanujo, kiun la direktantoj de la "Reichswehr" konsideras kiel danĝeran aventuron; 4) Forlaso de la politiko de la "malgrandaj konkeroj" kaj koncentriĝo de ĉiuj klopodoj por preparo al la tutgranda milito tia, kiam pripledis ĉiam Ludendorf.

Tiuj kvar punktoj, malgraŭ la krima karaktero de la lasta, estas faktoroj - eble provizore - klare je nia fervoro. La dua punkto interesas nin speciale, ĉar kion povas Mussolini sen Hitler? kaj se la "Duce" sin retiras el nia batalo, kion povas Franco sen li?

Sur la maro la ŝiparo "frankista" montriĝas milite manka, kaj politike, kaduka. Ĝi sin konsideras nekapabla haltigi la operaciojn de nia ŝiparo, kiam tiu ĉi prenas la iniciaton agi. Tial estis bombarditaj militaj laboroj en Motril, Malaga, Mallorca, Mellila. La flosantaj kanonŝipoj de la ribelinta ĉefo ŝajne ne estas tre spertaj en diplomataj aferoj, kiel atestis ilia duonultimato al Anglujo. Se ne estas, ke la internaciaj provokistoj disponus pri la helpo de la Italaj kaj Germanaj ŝiparoj, oni ne komprenas kiel la Burgosa Komitato povus puni sur la maro la "Home Fleet" on!

La definitiva retirado de Germanujo el Hispanujo dependas eble nur de la likvido de la ŝuldoj kontraktitaj de Franco al ĝi.... Sed tiu ebla sinretiro ne ŝajnas, ke ĝi kuraĝiĝis la "Duce" on, se oni kredas la parolojn de Dino Alfieri - la Propoganda Ministro -, laŭ kiuj ĉi tiu deklaris al la internacia ĵurnalaro, ke Italujo ne sendos pli da soldatoj al Hispanujo.

Ekzistas aliaj indikoj, kiel la prezaltiĝo de la peseto - kiu estas pli ol sentebla - montrataj, ke la kaŭzo de la hispana faŝismo estas rimarkinde kompromitita - por ne diri plie. La proksimaj semajnoj estos sendube decidaj por la rezultoj de nia batalo; post la malvaloriĝo de la ribelulaj akcioj, ni atendu vidi bankroton!

A T E N T O I

Pro diversaj malfervoraj ĉirkonstancoj ne estis por ni eble efektevigi la promesitan eldonon en Esperanto de gazeto "NOVA IBERIA". Al ĉiuj, kiuj sendis al ni la monon aŭ la respondkuponojn ni resendos. Nuntempe oni povas aĉeti "NOVA IBERIA" nur en la lingvoj: Hispana, Kataluna, Franca kaj Angla.



LA ANTAŬMILITISTA EKZERCARMEO DE KATALUNA JUNULARO.

## KATALUNA JUNULARO



La juna Popolarmeo de hispana popolo prenas grandiozaj instruitaj rezervoj. Tiuj rezervoj kreitaj en rapideco, kiujn la milito postulas ne povas esti la sola tasko de la armeo mem, des pli ke la konstruo de armeo postulas ilian tutan energion por tiu celo, ĉar mankis preskaŭ ĉio. De la starigo de la kazernoj ĝis la instrokadroj de la militlernejoj. La Junulara Fronto kun granda entuziasmo disponigis sin al la Registaro, por sin tiucele kontribui, ke la rezervoj por la armeo de la Respubliko estu kreataj.

Dank al la iniciato de Kataluna Junularo, kiu kun la helpo de la Registaro de Generalitat kaj Komitato por la Regula Popolarmeo, en la tuta Katalunujo estis aranĝitaj antaŭmilitistaj ekzercarmeoj, kie la Junularo en la relative malmulte da tempo ricevas la militistan instruon, per kio estas kreataj nekalkuleblaj rezervaj trupoj.

La malfermo de la unua instruokampo en Pins de Valles apud Barcelono, ŝanĝis en vera festo de Kataluna Junularo.

Je la sesa horo matene marŝis el ĉiuj partoj de Barcelono la junularaj formacioj sub la gvidado de oficiroj de la Popolarmeo kaj lernantoj de la militistaj lernejoj al la kampo. La kampo de Pins de Valles kuŝas tre bele. Ĝi troviĝas en ebenaĵo ĉirkaŭita per arbaraj montoj. Sovaĝaj rokoj, grandaj arbaroj, kiuj rompas malgrandaj lumetoj, faras de la

kampo la idealan manovrolokon. En la mezo de grandioza kampo estis starigita la tentaro, kie la Junularkolonoj partoprenantaj la militistan ekzecon povu tien pasigi la noktojn.

Kelkaj grupoj de la estontaj soldatoj marŝas kun surŝultritaj ŝoveliloj. La suboficiroj prenas la ŝovelilojn kaj tuj komenciĝas la lerta konstruo de tranĉeoj. Intertempe oni preparas la kuirveturilojn, la sanitarservon kaj aliajn teknikajn servojn. Je la 8,45, post la matenmanĝo - komencis la efektivaj manovromovadoj. Ĝep aŭ ok grupoj olupis la ĉirkaŭkuŝantan monteton. Rapide ili malaperis antaŭ niaj okuloj. Depost proksimume unu horo ili kaŝitaj sub la ŝirmo de kreskantaj en proksimeco plantoj prenis siajn poziciojn. Specialaj trupoj aranĝis la komandan postenon, aranĝis la telegraf - kaj telefon - liniojn. Al pli proksimaj montetoj estis maŝinpafil - nestoj kuŝigitaj. Je la fiksita tempo komencis la milito. La pafado de maŝinpafiloj kaj krakoj de fusiloj ebligis al ni malkovri la apartegitajn kolonojn, kiuj estis ĉirkaŭe sur la montetoj enterigitaj. Kelkaj miloj da junuloj partoprenis en la manovroj, inter aliaj, tiaj kies ekzercado ĵus komencis, servis kiel help - aŭ rezerv - trupoj.

Tiu ne koncernas, ĉu tiuj manovroj laŭ milita vidpunkto plene kaj ekzakte estis kondukita. La plej grava afero estas la serioza kaj la samtempe gaja volo de la Junularo, rapide lerni la uzadon de armiloj kaj la arton de la milito, por liberigi sian popolon, sian patrujon el subaĉetitaj trupoj de la internacia faŝismo. La diligenteo, per kio la junaj viroj sekvas la instrukciojn de la



Nº. 13.

ekzercado, montras ke tiu Junularo estas preta, ĉion fordoni por libereco de sia popolo kaj la sendependeco de sia lando.

La amasekzercado de Junularo en tiuj kampoj havas eksterordinaran utilon, ke ĉi tie ne rezultas ia sanginstruo, la instruo teoria, sed la estontaj soldatoj jam - ĝis kiam sur la manovroj-kampo estas eble - la praktiko de la milito povas esti al ili akirebla. Per tio gajnas tiuj libervolaj - rezervoj de Junularo iun sperton, kiun la milicanoĵoj dum la unuaj semajnoj de la milito per multaj oferoj devis akiri.

La spirito, kiu enspiras tiun Junularon, estis per vortoj de la prezidento de Generalitat plej bone esprimita, kiu inter la entuzjasmo de dek mil junaj ĉeestantoj, per la alparolo malfermis oficiale la kampon, kie li inter aliaj diris: "Ĉiam ni devas pensi, kio estas la fundamento de nia venko: disciplino en la fronto, unuekomando, organizado de la milito, disciplino kaj ordo en internlando. Pli kaj pli estiĝas tiuj devizoj la komuna bono por nia popolo. En la sama amaso kreskas nia forto kaj potenco. Estus krimo, se niaj Junularoj estus en tiuj historiaj kaj gravaj horoj, kiujn ni travivas, preterlasus kaj forĉus sin al amizaĵoj, dum ni konstruas novan patrujon. Ni ĉiuj devas ĉiutage krei novajn gigantajn penojn. Ĉar kontraŭ ni staras la malamiko, kiu volas ni detruigi; ĉar ni estas en milito kaj tiu milito estis elvokita de la malamikoj de nia popolo kaj nia libereco; kaj en tiu milito estas la libereco kaj la honoro de nia popolo, en ludo, same kiel la civilizo de la tuta homaro".

.....

La ekzercado de Kataluna Junularo en Pins del Vallès, estas la unua el la serio da 20 kampoj, kiuj nuntempe ekstarigas. En tiuj ĉi la Kataluna Junularo lernas defendi sian popolon kaj sian estontecon.

.....

Post ses tagoj de la malfermo de la unua antaŭmilitista ekzercado de Kataluna Junularo en Pins del Vallès, estis jam la dua kampo en Viladecans malfermita, kiu ankaŭ jam estas plena je libervoluloj.

#### ALVOKO DE LA LIBERECANA JUNULARO

La proksima Unua de Majo devas esti elokventa demonstracio de la solidereco de la internacia proletaro, per la decidiga helpo al la hispanaj kontraŭfaŝistaj batalantoj. Kapitalismo, sekvante la montritan postmilitan direkton, uzas solide kunordigitajn movadojn por malfortigi la moralon kaj revoluciajn fortojn de la laboristoj, kiel solan rimedon por forigi la barojn, kiuj fatale starigas al ĝi dum la daŭro de la historio.

La grandega kaj heroa agado de la batalantoj ĉe la frontoj de la Sudo, de la Nordo, de la Centro kaj de Aragono, batalantoj por dispremi la grandegan malamikon de la proletaro, ne estis ankoraŭ komprenita kun la amplekso kaj transira graveco, kiun ĝi meritas. La erara kaj hipokrita sinteno de la reĝimoj pseŭdoliberalaj kaj aliflanke, la malkuraĝeco de iliaj reprezentaj homoj, intencis okazigi nian malvenkon, kiel formulon por eviti imperialistan militon, kiu nur povas malsukcesi, se ni venkas la invadantojn de Hispanujo.

Du popoloj donas al ni la ateston de sia materia kaj morala simpatio por la libereca afero, U.S.S.R. kaj Meksikio. Eĉsepte tiujn, ekzistas landoj, eĉ latinaj, kie nia propagando estas barita pro la kolektiva memblindigo de grandaj rondoj da homoj nekapablaj kompreni la gravecon de nia batalo.

Ni deziras, ke la Unua de Majo ne fariĝu unu aldona festo. Ĉi devas esti la tago montranta en la mondokazantaĵoj lumeron, kiu rompos la mallumon en kiu restas niaj fratoj el Italujo, Germanujo, Portugalujo, ktp., kaj samtempe, kiu plifortigos la solidarecon kun ni, la homoj, kiuj de Hispanujo volas starigi civilizon kaj novan mondon.



No. 15.

Tiacele ni adresas nian alvokon al la junularaj kontraŭfaŝistaj organiz-  
aĵoj kaj al la kulturaj kaj sportaj asocioj de Katalunujo, ĉefe el Barcelono,  
por ke nia ideo estu tuj kunordigita kaj rapide per ĉiuj lingvoj kaj tra la  
landlimoj alvenu ĉe la tutmondan laboristaron la impresoj de milonoj da hispa-  
naj laboristoj, arde dezirantaj la necesan materialan solidarecon por akiri la  
necesaĵajn militajn ilojn, iniciatante tiamaniere pli akriĝitan etapon de la es-  
tanta kontraŭfaŝista lukto.

La graveco de la nunaj momentoj postulas tiun klopodon. Estas la antifaŝ-  
istaj Junularoj, kiuj apartigante la ideologiajn faktorojn devas kunigi siajn  
energiojn por ke la Unua de Majo estu impona demonstracio je la internacia rek-  
ta agado de la produktantoj, kiu montru al la hombuĉistoj kaj al la malamiko-  
j de la Libereco, ke kontraŭ ili, unuigitaj per komunaj vivligiloj, miliono-  
j da ekspluatatoj leviĝas, klarvideble pruvantaj per sia kunhelpo al nia lukto, ke  
faŝismo estos enterigita en la tranĉeoj fositaj sur nia lando.

Tiu ĉi Unua de Majo devas esti la senmorta tago de la kontraŭfaŝista His-  
panujo. Dum la lojalaj urboj kaj vilaĝoj surportas la barbaran atakon de la  
faŝistaj aviadiloj kaj miloj al niaj fratoj estas subpremataj en lokoj, kie  
faŝismo regas, ĉiuj liberaj homoj el la mondo sen-celdistingo, devas sin do-  
ni por plifortigi tiun daton montrante al la kapitalismo, ke ĝiaj intencoj,  
kvankam estas la plej sovaĝbestaj, fiaskas kiam ekzistas popoloj, kiuj scias  
plenumi sian devon per maksimuma liberiga penado.

Ni deziras solenigi tiun tagon per la intensiveco, kiun ĝi meritas, per  
efika nacia kaj internacia propagando alsendente al niaj fratoj en Eŭropo,  
Ameriko, k. t. p. la senton, ke ni konfidas al ilia helpo kaj ke kontraŭ ni-  
aj jarcentaj kontraŭuloj, kaj kiuj helpas iliajn imperialistajn planojn, sta-  
riĝos potenca universala movado de la tutmonda proletaro por la helpo al la  
kontraŭfaŝista Hispanujo.

#### LA ORGANIZO DE LA UNUAVICBRIGADOJ EN LA KATALUNA MILITINDUSTRIO.


La Unuiginta Socialista Junularo de Katalunujo decidis la organizon de  
la Unuavibrigadoj, la organizon konsente kun embau grandaj Sindikatoj kaj  
fabrikaj komitatoj, por la plialtigo de produktado en ĉiuj milit- kaj milit-  
veraj uzinoj. Kiel speciala tasko de tiuj Unuavibrigadoj estas substrekita;  
la intensivigo de la produktado kaj la starigo de la nova produktadplano. La  
evito de la materialmalboniĝo kaj speciala flego por maŝinoj kaj maninstrum-  
entoj; la aŭtoritatpligrandigo por majstroj kaj rajtigitoj, kiuj persone plej  
multe devas esti interesitaj por la produktadpligrandigo; la envoko de inge-  
nieroj, teknikistoj kaj diplomitaj laboristoj pro sekvado de teknikaj post-  
kursoj; la instruigo de inaj laboristoj, por ke ili povu anstataŭi la virojn  
en la okazo de la ĝenerala mobilizo kaj ke la produktado ne suferu pro tio;  
la aranĝo de bibliotekoj, kiuj ne estos magazenoj, sed veraj kulturaj lokoj.

#### LA POLITIKAJ CELOJ DE LA FAŜISTA OFENSIVO AL BILBAO.

La granda ofensivo afektivigata de la faŝistoj tra Baskolando, spegulas pli  
pri politikaj kaj ekonomiaj motivoj, ol vere pri militistaj necesoj. Jen unu  
el tiuj motivoj.

Post la malvenko de generalo Franco kaj liaj italaj kunhelpantoj ĉe Gua-





dalajara, estas neduble, ke la publika opinio de la plejmulto dalandoj, speciale en Granda Britujo, fariĝis skeptika koncerne rapidan kaj decidigan venkon de la hispanaj ribeluloj. Ĉi tiu skeptikismo pli klare elmontriĝis dum la ĵusa malpliialtigo okazinta al la financaj valoroj de la faŝistoj en la Borsoj de Parizo kaj Londono. Krome, kelkaj financaj grupoj apogintaj Franco'n subite retiris sian apogon. Tiel estiĝis la neceso, per ia ajn rimedo, kaj kiel eble plej baldaŭ, plialtigi la militistan bonfamon de la ribelintoj antaŭ la eksterlandaj okuloj.

La fiasko de Guadalajara havis alian konsekvencon; estiĝis neinterkonsento inter generalo Von Faupel, germana ambasadoro en Burgos, kaj generalo Franco. La reprezentanto de la "Fuehrer", interkon-

sente kun generalo Mola, elmontris sian malkontentecon pri la ofensivo de Guadalajara kaj tamen, li opiniis pli saĝa ĝeneralan ofensivon, tiun de la fronto de Aragono, ĉar la okazintaĵoj pravigis tiun ĉi opinion, la militista bonfamo de Mola automate plialtiĝis. Pro tio generalo Mola persone gvidas la operaciojn en Basklando. Por efektiviĝi tiun ofensivon la faŝistoj uzas grandegan teknikan milit-ilaron. Escepte de kelkaj italaĵ ĉasaviadiloj, oni povas certigi, ke la tuta militmaterialo de la ribeluloj en la Baska lando estas el germana deveno.

Jes, ekonomie parolante, oni povas difini la malsukcesintajn faŝistajn operaciojn de la sektoro de Pozoblanco, same la batalon por la konkero de la hidrargaj minoj de Almaden kaj la karbominoj de Puertollano, ankaŭ ni povas diri, ke la batalo de la Baska fronto celas la konkeron de la ferminoj kaj la peza baska industrio.

Krom tio, ĉefe, la ribelantaj hispanaj "naciistoj" intencas perforte silentigi la baskajn katolikojn, ankaŭ naciistoj, proklamantaj la plenan liberon, kiuj dekomence starigis sin, lojale kaj senhezite, de la flanko de la leĝa Hispana Registaro. La ribelintoj estas priokupitaj antaŭ la ekzistado de tiu-ĉi katolika popolo, tute batalanta kontraŭ ili, kio vekigis grandegan impreson en la katolikaj internaciaj rondoĵoj.

#### A T E N T O I

Al ĉiuj ricevintoj de nia Comunicat de Prensa, ni petas afable sciigi al ni, ĉu nia bulteno bonorde trafas ilin, male ni kredos, ke niaj presediĝoj perdiĝas. Samtempe oni povas sendi al ni; rimarkojn, sugestojn, kaj opiniojn rilate la Oficialan Propogandon en Esperanto de la Kataluna Registaro. Ni insiste petas al ĉiuj traduki kaj publikigi nian oficialan "Comunicat de Prensa". Ĉion sendu al Comissariaat de Propaganda (Esperanto Fako), 14 d'Ab-ril 442, Barcelona.





# GENERALITAT DE CATALUNYA

PRESIDÈNCIA

COMISSARIAT DE PROPAGANDA

Avinguda 14 d'Abril, 442 bis : BARCELONA : Telèfon 82215

## COMUNICAT DE PREMSA

ESPERANTO ELDONO.

Nº. 14.

Barcelona, 17/IV, 1937.





UNUA DE MAJO 1937 KAJ HISPANUJO.

Kvindek jaroj sinsekve la tutmonda proletaro festis la unuan de Majo. La duonan jarcenton la subpremita laborista klaso esprimis en tiu tago sian liberecan volon, sian unuecon kaj potencon. Dum kvindek jaroj, la tago de la Unua de Majo estis la simbolo de la solidareco, frateco kaj unueco por la tutmonda proletaro, en tiu tago malaperis la malnaturaj limoj inter la landoj, inter la kontinentoj. La homoj de la laboro, laboristoj kaj kamparanoj kun malsamaj lingvoj, pro sorto dismetitaj en diversaj landoj etendis reciproke al si la manon por festi la tagon de la laboro.

En Hispanujo, por la laborema popolo, la Unua de Majo estis ĉiam festo kaj samtempe protesto kontraŭ la reakcia subpremo. Hodiaŭ ĝi havas la alian karakteron. Oni ankoraŭ ne decidis, ĉu en tiu tago la laboristaro elmarĉos sole ne sur la stratoj demonstrante por siaj devizoj kaj unueco kontraŭfaŝista, aŭ ĉu ili restos en fabrikoj kaj en tranĉejoj. Verŝajne la Unua de Majo 1937 estos la tago de venko kaj laboro. En tiu tago oni eble laboros kun pli da streĉeco kaj insistu, ĉiu minuto por la milito. La venko dependas de pli granda produktado kaj la laboristoj laborante en tiu tago sciis kaj komprenis la neceson. Tamen, en eksterlando oni supozas, ke la Respublikana Hispanujo estos la punkto sur kiu la tutmonda laboristaro turnos sian atenton. Jam el diversaj landoj alvenis multaj solidarecmanifestoj por la batalanta Hispana Respubliko okaze de la Unua de Majo, kie oni promesas pasigi tiun laboristan feston en la spirito de solidareco kun la heroa Hispana Popolo batalanta por sia libereco kaj paco de la cetera Eŭropo. Certe oni ne forgesos pri la malfeliĉaj hispanaj respublikanoj en la parto okupita de Franco. Tien la respublikanoj en silento solenas la Unuan de Majo kaj ni kun doloraj sentoj en la koro estos ĉe niaj fratoj. Por ili estu la Unua de Majo la tago de liberigo el jugo de la internacia faŝismo, kiu okupis ilian teron kaj mortigante iliajn idojn. Por ni estu la Unua de Majo 1937, la tago de venko super la faŝismo kaj barbereco, por Nova Hispanujo, por Demokrata - Popolfronta - Patrujo. Jen estas la ĉefaj devizoj de la Unua de Majo 1937.

Por efektevigi konsekvence la venkon kaj montri la konscion de Katalunujo pri tiu deziro la Socialista Sindikato (U. G. T.) kaj la Unuiĝinta Socialista Partio Kataluna (P. S. U. C.) prezentis 10 punktojn, nomitajn; "Plano de Venko". La "Plano de Venko", kiu ĉirkaŭprenas la tutan politikan kaj ekonomian liniojn de tiuj du gravaj Katalunaj korpoj estis kreita antaŭ la datreveno de la Respubliko la 11an de Aprilo pasintan kaj kompreneble antaŭ la Unua de Majo. Ĝi estis ĉere kreita por organizi la finan venkon super la faŝismo kaj instali la nerompeblan unuecon por la politikaj partioj de Katalunujo. La aktualeco de la "Plano de Venko" staras sendube en la mezo de la tuta politika opinio kaj pro tio ĝiaj 10 punktoj estiĝas la devizoj por la Unua de Majo.

Jen sekvas la 10 punktoj de la "Plano de Venko".

1). Rapida kreo de regula Popolarmeo en Katalunujo kiel parto de la Popola Armeo de la Respubliko, kiel ĉefa kondiĉo por la venko super la faŝismo kiel fidela vartisto de revoluciaj akiraĵoj kaj liberecoj por Hispanujo kaj Katalunujo post la venko. La armeo starigita, starigita la ŭ la ĝeneralaj deklaroj de militarto kun kun la malkonekto de ĉiuj propraj trupformacioj de Sindikatoj kaj partioj. - Kreado de la sekurecistemo, starigo de subpartoj kaj organizaĵoj por la speciala trupformacio pro tiu celo. - Rapida edukado por la teknikaj kaj politikaj gvidantoj, per elkonstruo de militlernejoj kaj kreo de la centralernejo por la militkomisaroj. Oni devas tion sekvi konsekvence, soldatoj kaj suboficiroj, kiuj jam donis la pruvojn de ilia kapablo en la batalo kaj ilia fideleco por la kontraŭfaŝista afero, ilin fervorigi kaj instali je ordonpostenoj kun pli da respondeco. - La purigado en la ordonpostenoj, en la armeo kaj ĝenerale en Katalunujo. - La forigo de ĉiuj faŝistaj elementoj, kiuj enŝovis sin, la forigo de la indiferentuloj aŭ tiuj, kiuj nenion sentas por la afero de la popolo kaj anstataŭi ilin per memstaraj personoj kiuj laŭ vidpunkto de fideleco jam estas elpruvitaj.

2). Tuja kreado de sufiĉaj rezervoj por la regula Popolarmeo en Katalunujo.



Nº. 14.

7. La tuta starigo de kvin novaj divizioj per la mobilizintoj el la jaroj; '36 - '35 - '34 - '33 - '32 kiel la unua rezervo por nia armeo. - Kiel dua rezervo por nia Popolarmeo: La organizado de la antaŭmilitista edukado de la civila loĝantaro kaj nia tuta militkapabla Junularo. - La organizo de la rezervo, kiu en la defendo kontraŭaera, en la defendo kontraŭ la gasoj, kaj en la defendo de marbordoj estos specialigitaj, kaj la kreado de ĉiuj necesaj specialigitaj trupoj.

3). La kreado de la potenca militindustrio, se la tuta Katalunujo en unu granda, sola fabriko por la rekonstruo por la militmaterialoj estos ŝanĝota; ellaboro de la komuna plano por la egaligo de la tuta industrio, pro la bezonoj de la milito kaj la neceso armigo. - Prizorgi la municion kaj ekipaĵon por la fronto en Aragono kaj aliaj frontoj de la Respubliko. - La naciigo de la militindustrio kaj militistigo de la transportado. - En daŭro de maksimume tri monatoj povas la minimuma kvanto de 100,000 virinoj anstataŭi la mobilizitajn virojn en la industrio, en la transportado kaj en la publikaj servoj. - La organizo de la batalo kontraŭ la sabotantoj. - Kreo de la konsilantaro por la militindustrio, kaj la tuta agado por la militindustrio laŭ la sekurecplano kaj kun la konsento de la respublikana Registaro, organizi, kunigi kaj disvolvi ĝin.

4). Ekonomia politiko de la milito. Egaligo kaj la disvastigo de industrio laŭ la necesoj de la milito. Metia reinstruado de la laboristoj kaj - inoj. La kunigo de ĉiuj industrioj kaj entreprenoj, la utiligo kaj la distribuado de krudaj materialoj laŭ la neceso de la militindustrio. - La severa ekonomio - ordo sub la retiro, eĉ de la plej necesaj aĵoj, por ĉion koncentrigi al la milito.

5). La prava politiko sur la kampo. Certeco pri la libereco por la kamparanoj, kiuj individue aŭ kolektive laŭ propra volo perlaboras la teron. - Per kreditoj kaj aliaj rimedoj devas naskiĝi la plej utila kaj militnecesaj agrikultura produktado. - Kiu por la aĉetado kaj vendado povas esti regulata, se oni subtenos korporaciojn kaj organizojn la eksteran komercon, laŭ bazo de interkonsento inter la Registaro de Generalitat kaj Respubliko.

6). Certeco kaj la revolucia, kontraŭfaŝista ordo. Rapida starigo de la unueca "Certeckorpuso" (polico) por la interna ordo, laŭ la antaŭa, senpartia kaj objektiva purigado de diversaj dekretoj, kiujn la antaŭa Kataluna Registaro forlasis. - Sistimata kaj senpardona batalo kontraŭ la "Quinta Colono" (Kvina Kolono - tiel estas nomita la ŝpionorganizo de la faŝistoj) - Batalo kontraŭ ĉiuj faŝistaj elementoj kaj sinsekve la la obligacia purigado de ĉiuj kontraŭfaŝistaj organizaĵoj kaj partioj. - Energia kaj rapida subpremo de la nekontrolitaj elementoj kaj grupoj.

7). Senpardona batalo kontraŭ la spekulantoj, interkomercistoj kaj tiuj homoj, kiuj el la oferoj kiujn la milito kaŭzis al la popolo, tiras profitojn. - La plena respektado de rajtoj kaj interesoj de la mezklaso, kiu estas inklina partopreni honeste al la komuna streĉeco kaj ofero. - Kreo de eksterordinaraj popoljuĝejoj, kiuj laŭ ekzempla maniero punos la krimajn misuzoj de militprofituloj, kiuj riĉiĝis sin je la malriĉeco de la popolo.

8). La kunigo de ĉiuj armiloj en la manoj de la Registaro, por ke ili povu esti uzataj por la neceso de la milito.

9). La kreado de la militmaterialo, la taŭga sintenado en internlando. - Realigo ekzakte ekonomian politikon por eviti ĉiujn superfluaĵojn elspezojn kaj forigi la burokratismon en ĉiuj publikaj oficejoj, entreprenoj kaj oficoj en la tuta lando. - La prava dispartigo de ĉiuj oferoj kaj ĝenaĵoj de la milito laŭ ekonomiaj eblecoj de diversaj tavoloj de loĝantaro. - Klopodo por la impostkaj bank - politiko, tiel kiel ĝin postulas la milito.

10). La tuta aktiveco kaj ĉiu agado devas subordigi la plej altan celon, la venkon kontraŭ la faŝismo. Intima kunlaboro kun la Registaro de la Respubliko ĉe la fronto kaj en la ariergardo kaj kun plena konvinko, ke la liberecoj de Katalunujo estas atingitaj kaj firmigitaj, se ni kuniĝintaj kun la Hispana popolo scios batali kontraŭ la komuna hispana kaj internacia faŝismo.

Por unu Registaro, kiu efektevigas la Planon de Venko.

La horo de Katalunujo jam venis. De Aragon - fronto povas la faŝistaj trupoj,



Nº. 14.

kiuj okupis la hispanan teron ricevi la lastan baton. Ĉiuj energioj de Katalunujo devas esti mobilizataj, por ke tiu celo povu esti efektivegata.

Ĉiuj Katalunoj povas unuiĝi kaj labori sub la gvidado de la Registaro, kiun Katalunujo bezonas kaj havos, mallongigi la daŭron de tiu sanga milito, kiun la internacia faŝismo al ni deklaris.

La Unuiĝinta Socialista Partio Kataluna kaj la Ĝenerala Sindikato (U.G.T.) postulas en konscio de ilia respondeco, ke ekestu la Registaro, en kiu ĉiuj kontraŭfaŝistaj - proletaj - demokrataj fortoj partoprenu, kiuj estos pretaj kun ĉiuj rimedoj eviti, ke Katalunujo prenu en danĝeron la venkon de la tuta Hispanujo. La Registaro, kiu estas inklina en decida maniero rompi kun la danĝera agadmaniero kaj akcepti dekretojn kaj plenumi ilin. La Registaro, kiu decideme iras antaŭen kaj per fera volo venkas ĉiujn malfacilaĵojn kaj kontraŭstarojn, kiu feveras la realigon de la granda "Plano de Venko".

La Unuiĝinta Socialista Partio Kataluna kaj la Socialista Sindikato (U.G.T.) turnas sian vokon al ĉiuj Katalunoj, al ĉiuj laboristoj, kamparanoj, soldatoj, oficiroj, aviadistoj, maristoj kaj al ĉiuj armitaj fortoj, al ĉiuj laborantoj en katalunujounuigi en unu potenca bloko, kiu donos al ni la rapidan kaj plenan realigon de Plano de Venko.

#### ĈIUJ PROLETOJ EN LA MONDO, KUNE KUN NI.

La ĉiujara rememorigo pri la Unua de Majo, motivo por ke la tuta proletaro manifestu sian potencon antaŭ la internacia faŝismo, devas transformiĝi tiun ĉi jaron al solidareca provo por la Iberiaj laboristoj.

Ĉar, se la tuta produktanta mondo honore rememorigas tiujn kvar martirojn, kiuj stoke sciis oferi siajn vivojn por pli bona homaro, kial ne fari admiran kaj dankan tributon por la miloj da popularaj aŭ ne konataj herooj falintaj por la plej justa afero? Kaj ankoraŭ pli: Kial ne efike helpi, morale kaj materie tiujn, kiuj estas plenumantaj abnegacie la historian taskon renversi la jarcentajn malamikojn de la proletaro?

Sentime erari, ni povas certigi, ke la internacia laboristaro scios respondi al tiu iniciativo, kaj ke la laboristojaj organizaĵoj el ĉiuj landoj pronos sur sin tiun iniciativon propogandante kaj envojigante ĝin sur la terenon de la pozitivaj realecoj.

Do, estas necese, ne perdi la tempon. Ĉiuj kontraŭfaŝistaj organizaĵoj el tutmondo devas fari la aktivan propogandon, kiu malkvietigu ĉiujn kontinentojn, kiu grupigu en sama sincera sinteno kaj decida ĉiujn bonvolajn homojn. Ĉiujn laboristojn el la mondo! Ne devas resti urbo nek vilaĝo sen esti trafita de nia peto!

Kvankam la tuta universo vibru por ni, profunde sentu nian lukton kaj sindoneme kaj malavare kuraĝigu nin, ĝi nur estas plenumanta sian devon. Antaŭ la sovaĝa antaŭen-irado de faŝismo, kiu ĉie lasas la nigran postsignon de la barbareco, la liberaj homoj havas jam montritan sian devon; Lukti senripoze kaj sen rimarki oferojn, ĝis la atingo de triumfo de la progresigaj kaj liberigaj fortoj.

Hodiaŭ estas Hispanujo la ĉefa scenejo de la invadanta eksperienco; morgaŭ, povos esti Francujo, Usono, Anglujo, aŭ Skandinavjo. Tio ne gravas; faŝismo antaŭ ol morti malespere moviĝas kun la intenco dispecigi la publikajn liberojn kaj ekstermi la homajn rajtojn, Tuj komencante tiranion kaj krualecan epokon kiu permesos ĝian ekzistadon. La proletaro de Italujo kaj Germanujo ĝemas jam subpremata de la monstro. El nia energio dependas, ke la minaco ne etendiĝu, kaj ke ni laborigu ankoraŭ niajn klasfratojn hodiaŭ suferantaj ĝin.



Nº. 14.

Ke la proksima Unua de Majo lasu neforgeseblan memoron en la daŭro de la socia luktado. Ni faru el tiu ĉi festo, tiun de la internacia kontraŭfaŝismo. Laboristoj el la tuta mondo, vi devas decidi !

(el la manifesto de la Anarĥista Junularo okaze de la Unua de Majo).

### LA JUNULARKONGRESO EN MADRIDO.

#### LA PAROLADO DE GENERALO MIAJA.

En la granda, kun ruĝa tuko ornamita salono de Atineo, en Madrido okazis dutaga plej grava kongreso de Madrida Junularo, kie estis pritraktita la unuigo de ĉiuj Junularaj organizaĵoj. Tiu kongreso, kiu okazis en atmosfero de entuziasmo, kunigis ĉiuj delegitoj en unu Popola Fronto. Ĉi-tie oni povis vidi ĉiujn Junularajn gvidantojn kaj tendencojn de hispana Junularo frate kunligitajn; Unuiginta Socialista Junularo, la Junularo de Respublikana Unio, el la dekstra flanko de Junularfronto, plie la delegitoj de en Popolfronto aliĝinta Katolika Junularorganizo, ĉe ĉiuj regis unuanimeco pri la demando, kiu staras en la unua vico de ĉiuj intereso de hispana Junularo, pri la demando de ilia kunigo. La signifo de tiu-ĉi kongreso, kiu dum du monetoj de intensa laboro estis preparita, estis ankoraŭ plifortigita pro la ĉeesto de kelkaj anoj de Anarĥista Junularo, kiuj en sia propra nomo partoprenis la Kongreson, por esprimi sian deziron, vidi unuigitan la Hispanan Junularon.

En la unua kunsidtago esploris Felipe Argonada, la ĝeneralsekretario de Unuiginta Socialista Junularo en Madrido, la fundamentajn taskojn, kiuj devas esti realigitaj, se oni volas akiri la unuecon. Kaj jam en tiu unua tago de kunsido tiu el soldatoj - kaj fabrikdeligitoj konsistanta kunveno esprimis sin por rektaj celoj, montrante la malfacilaĵojn kiuj estas ankoraŭ por venki, sed sur la vojo, kiu devas esti malfermita. La parolado de generalo Miaja, kiu salutis la hispanan Junularon, montrigis tuj la aktualajn demandojn en la justa lumo.

Enkondukante sin, demandis Miaja, kio postrestus de Madrido sen tiu flama entuziasma Junularo, kiu en momento, kiam ĝi renkontis la malamikon antaŭ la pordojn de urbo, la urbon defendis. Li laŭdis pro tio la Junularon ne nur pro ĝia rolo, kiun ĝi por la defendo ankoraŭ ludos, sed ankaŭ deziris, por pli da politika respondeco. Se oni pensas pri la decida rolo en Madrida epoko pri la Madrida Junularo kaj pri la rolo, kiun ĝi ludos en estonteco en tiu sendependecbatalo, tiam ricevas la vortoj de Miaja la puran signifon, kiun sekve oni povas kunmeti. La heroo hispana Junularo, savis Madridon kaj la tuta mondo laŭdas ĝin pro tio, sed pli certa rimedo por ili estas, venki la militon, por sin tute unuigi sub la sama flago.

Tiuj ambaŭ punktoj retrovis sian apogon en la paroladoj de diversaj parolintojn, sed speciale en la alparolo de la sekretario de Madrido.

Ili koncernis la precizan klarigon de la solvontaj problemoj, por ke tiu heroeo kaj tiuj kvalitoj, amplekse kaj gvidate, donu la venkon al hispana popolo. Tiel estis la demandoj pri unueco ĉiam montrita al la fincelo, la venko.

La unua demando estis la starigo kaj la disvolvo de la Popolarmeo. La esploro de tiu punkto povas koncize esti montrata. La nacia respublikana armeo, kiu defendas la landon, ne estas plu la sama, kiu antaŭ la 18<sup>a</sup> de Julio 1936. Ĝi estas la armeo de la popolo, komanditaj de oficiroj el la popolo. La proletaro kaj la mezklaso, kiuj per tiu estas kunfermitaj, batalas por la samaj celoj, la Junularo, kiu ĝin anstataŭas per granda parto, devas efektivegi ĝian unuecon. Ĝi faros tion per devizoj, kiuj de diversaj grupoj estos akceptitaj, tio signifas laŭ devizo por defendi la demokratian Respublikon, kiu post la ribelo naskiĝis. Ĉar la efektivego de tiu armeo estas efektive la defendo kaj konkero de ĉiuj demokrataj liberecoj en antaŭeniĝinta senco. Tiu estas tre konata devizo, pri kiu oni tuj post la ribelo konsentis. La parolintoj vidis en



Nº. 14.

la kunigo de Junularo, kiel ĝi estos en la armeo endukita, la plej sekura rimedo por plena unyigo de proletaro en industria kaj politika tereno. La sama unueco devas ankaŭ ekesti por la kreo de la pli forta kaj plimultnombraj rezervo-

voj. La dua punkto estis la plifortigo de batalo kontraŭ la malamikoj de la unueco, ĉien kie li aperas, tio estas en la armeo, en la politika kaj sindikata vivo. La malboniĝita kaj krima agado de Trookismo en la armeo kaj kontraŭ la Popola Fronto devas esti signita kaj de la ceteraj deligitoj kondamnita.

Trie estu renovita la konfeso pri fidelo al la Registaro de la Popola Fronto kaj eĉ per la voĉado de la tuta kunveno. Pri tiuj demandoj okazis dum la kongreso multaj diskutoj.

Kio estas la konkretaj decidoj en la kongreso? Ĉar la hispana Junularo bezonas urĝe la efektevigon de la unueco, pli ol devizoj kaj instigoj. Se eĉ tiuj proponoj, kiuj estis prezentitaj en la kongreso de Anarĥista Junularo, ne ĉiam unuanime estis akceptite, tiam minimume montris eĉ tiu konkludo fakto, ke la Junularo de Madrid estas volema, venki ĉiujn kontraŭstarojn, kiujn ĝi renkontos sur la vojo por unueco. Jam montriĝis sin la unuaj signoj de unueco. Ĉe la fino de la kongreso kuniĝis la Junularo de Maldekstraj Respublikanoj kun la Junularo de la Respublikana Unio en unu organizo - tamen nur buŝe - realigita ligo inter la Unuiĝinta Socialista Junularo kaj la Anarĥistaj Junularorganizajoj estas la ekzemplo por la novaj interparoloj.

Sur la tereno de produktado, tiu kongreso entuziasmigis la laborantan Junularon por la plifortigo de militindustrio. Tiu kunigo de Junularo trovas en la brigadoj de armeo kaj en fabrikoj fortan influon. La kongreso estis tre grava paŝo por la unueco de hispana Junularo, kaj ekzemplo por eksterlando por por sekvi tiun Popolfrontan unuecon kontraŭ la faŝismo, por la demokratio kaj paco!

#### TRAFA DECIDO DE LA SINDIKATORGANIZAJOJ DE KATALUNUJO.

La Lokaj Sindikataj Federacioj de Barcelona C.N.T. kaj U.G.T. decidis, ke siaj anoj donacu la salajron de la tago 14<sup>a</sup> de Aprilo. Datreveno de la Respublikstariĝo en Hispanujo. Do, en tiu-ĉi jaro la feston de la proklamo oni solenigis, laborante ĉe la ariergardo kaj batalante ĉe la tranĉeoj de la fronto. Tiel okazis la datrevenfestoj anstataŭ, kiel en antaŭaj jaroj, per paradoj kaj ĉiaspecaj festoj.

La du sindikataj federacioj elektis por tiucelan komitaton, kiu prizorgos la bonan plenumon de tiu unuanima dispozo. Tiu-ĉi Komitato, kiam estos kolektinta tiun ĉies unutagan salajron, donos la tutan monsumon al la Prezidanto de Katalunujo, Ludoviko Companys, por ke ĝi estu plene destinota al la hospitaloj.

#### LA KRIMOJ DE FAŜISMO.

Ĉiutonaĵoj voĉoj ploris-ploras ankoraŭ - la mortigon de Frederiko Garcia Lorca, juna kaj granda poeto de la renaskiĝanta Hispanujo; neatendite, kaŝita, subita, kaniĝinta mortigo, kiu tre ege suferigis nin pro la ne ripareblaj kaj ne meritaj doloroj de li travivitaj... Kaj, ankoraŭ sonanta la eĥo de tiu plorado, nun, alifoje, ĉiutonaĵoj voĉoj-



Nº. 14.

Universitatoj de Eŭropo kaj Ameriko, Korporacioj de Azio kaj Oceanio, profesoroj, studentoj de Aŭstralio kaj Novzelando - plendas pri la doloro pro la mortpafado de Leopoldo Alas Argüelles, la glorfama rektoro de la Universitato de Oviedo; mortpafado preparita kaj laŭte publikigita per terura malrapido, kiu permesis, ke de la tuta mondo alvenis po centoj, la indignaj protesttelegramoj, petante lian liberigon, incitante al kompato kaj al la plenumo de vera justeco, kiu ne niam signifas krualecon kaj venĝon.

Sed ĉio estis vana. Tiu ĉi, preparita kaj antaŭvidita, teruraĵo estas plenumita sam kiel oni plenumis alian kaŝfaritan kaj ne suspektitan teruraĵon. Ĉar la maljusteco de la faŝismo malfermas la vojon al ĉiuj teruraĵoj. Kaj de la juna poeto estis kantinta la sanktan fruktodonan avidon ĉe la esenca virino, kiu estas la popolvirino, kaj li estis sin klininta al ŝi per la koro kaj la inteligento al la flanko de tiuj, kiuj suferadas, por aŭskulti kaj kompreni ilin; la eminentaj profesoroj estis metinta sian kulturon, siajn verkaĵojn kaj siajn vortojn je la servo de la demokrataj ideoj; je la servo de la Respublika afero, je la servo de la popolo. La gentoj hodiaŭ vivantaj kaj ordonantaj ĉe la nigra Hispanujo, ne povis pardoni tiujn "pekojn, pro amo kaj klareco". Kaj, pro ambaŭ okazaĵoj, blindaj kaj surdaj, ili pretendis, mortigante la viron, estingi la lumon, dronigi la kanton. Sed, kompreneble, la lumopli forte rebrilos, pli vibranta la kanto; sed, ho ve! La viro estis enigita en tiun nemerititan mortteruron, malsaĝe, kruele kaj beste maljusta.

Pri Leopoldo Alas Argüelles, lia inklino portis lin tra maldamaj vojoj, aŭ distancaj, de la nivelo kaj la ĵurnalo.

La katedro estis lia pasio, kaj en lia profesor studado atingis, juna ankoraŭ, la altan postenon de la rektoro de Universitato de Oviedo, posteno, kiun li ĉiam plenumis per absoluta oferemo, per perfekta konduĵo kaj per demokrata spirito, kiun ne hontis, kontuzmaniere, konstatiĝi antaŭ la tribunalo liaj propraj politikaj malamiko.

Neŭtrala homo, laŭdinta rekta kaj respekto plena pacamanto..... Sed, viro havanta fortojn fortajn konvinkojn. Leopoldo Alas estis respublikano, demokrato kaj la amiko de la popolo, li estis defendinta siajn ideojn kaj sentojn per paroladoj kaj ĵurnalartikoloj. Tiu ĉi estas la kulpo, kiu metis lin antaŭ la ekzekuta soldatamaso. Tiu ĉi estas la krimo, kiun la faŝismo ne pardonas. Kaj, nun Leopoldo Alas rektoro de Unuversitato en Oviedo, eminenta homo, kaj senmakula civitano estis mortpafita.

#### GRAVAJ DEKLAROJ KAJ HUMANA DISONO DE LA MINISTRO DE

#### JUSTECO.

La ministro de Justeco, Garcia Oliver, ne estas viro la<sup>ŭ</sup> antikva kaj kaduka, leĝburĝa kutimo. Li disvolvas laŭdindan aktivecon, kvankam multaj ne scias vidi tion.

De la nuna momento dum kiu mi prenis sur min la respondecon pri la justecministrejo, estis por mi konstanta kaj rapidiga okupo atingi la reorganizon de la juĝaj funkcioj tra la tuta lojala teritorio, ĉar mi opiniis kaj opinias, ke la normala funkciado de la Popoltribunalo, ne estas nur postulo montranta la indecon de la Respubliko antaŭ la mondo, sed necesega faktoro por la politika envojigo de la revoluciaj sopiroj laŭ la Justecordo. Por la plenatango de espremita celo, mi devis dediĉi ĉiujn miajn klopodojn; kaj per la entuziasma kaj sincera kunlaborado de la Subsekretariaro kaj de la tuta oficistaro, kiun mi devas aldoni, funkcias tute regule en ĉiuj lojalaj provincoj de la Respubliko; la Juĝestraro kaj la malliberuloj trovigantaj sub ĝia





J. García Oliver

Ministro de Justeco. kiuj, iuj diras, estas egalaj al tiuj de la faŝismo, sed laŭ la formo kiel ili estas strukturitaj en Hispanujo, ili tute diferencas pri tiuj kavernoj ekzistantaj en Germanujo, Italujo kaj Portugalujo. En tiuj-ĉi landoj, la politikaj kondamnitaj nenion faras, sed fizike oni turmentas ilin. Tamen, en nia lando, iliaj kondamnoj aliĝas je utilaj laboroj favore de la socio, kiun ili intencis ataki, konstruante superverŝajn kanalojn kaj konstruaĵojn por la granda publika utilo, traktante ilin samkiel en ĉiu libera lando kaj inde superigante ilin, ne per la vipa turmento kaj humiligo, sed per laboro, kiu indigas la homon.

Tio plej interesa el la lastaj disponoj, estas la dekreto rajtiganta la vidvinojn de milicanoj mortintaj dum la kampanjo, kvankam antaŭ ol okazi la morto de la amata estaĵo, ili ne estus legigintaj sian geedziĝan staton laŭ la leĝaro, kiuj havos la samajn rajtojn ol tiuj vidvinoj legigintaj sian geedziĝon.

Ci-tiu dispono plene rimarkigas la progresigan kaj modernan spiriton de la Ministro de Justeco kaj miligas grandan teruran antaŭjuĝon de la mortinta socio plenplena da nehumanaj laŭleĝaj konceptoj tute kontraŭagantaj la leĝojn de la Naturo.

#### KIE ESTAS LA BANKO DE HISPANUJO?

Estas tre bela la lasta montrampo de la frankismo. Ili eldonigis bankbiletojn datumitaj en Burgos, sur kiuj, por ke nenio manku, almenaŭ laŭŝajne, tio estas, en ilia leĝa aspekto, estas supreskribita: Banko de Hispanujo kaj la kutima legaĵo "La Banko de Hispanujo pagos al la biletportanto..."

Sed, kia Banko de Hispanujo? Kie estas la Banko de Hispanujo? Ĉu en Burgos? Ĉu en Valladolid? Ĉu en Huelva? En Sevilla ĝi ne estas, kompreneble, male Queipo de Llano jam estus forrabinta ĝin. Kie estas, ni ripetas, tiu Banko de Hispanujo respondenanta pri la biletdono fabrikita de Franko (Franco)? Laŭ la konstitucio de la Hispanuja Banko, ĉi-tiu havas sian centrejon en Madrid, siajn tenejojn en Madrid, sian administracion en Madrid, sian Administracion Konsilistaron en Madrid, sian ĉefestron reprezentantan la Nacion en Madrid. Tiuj ekzistantaj en provincoj estas nur filioj de tiu-ĉi Banko de Madrid. Ĝia regularo devigas, ke la biletdonoj estu faritaj interkonsente kun la Ŝtato, en la litografejoj,



Nº. 14.

kiujn ĝi montru kaj kun la interveno de la Mondomo, kiu devas doni la numerigon kaj registri la monpaperon. Krome, la Ŝtato ankaŭ estas en Madrid-aŭ provizore, en Valencia-, samkiel la Mondomo. Ĉu eble Franco prenis Madridon kaj ni tute ne sciiĝis pri tio?

Krome, la bankbileto, havas la valoron, kiun la Ŝtato donas al ĝi per sia respondeco kaj siaj orrezervejoj. Ĝi nur estas simpla rajtigilo por ŝanĝofaciligoj kaj pezevitado. En ĉiu lando, kie Financo estas bone organizita, oni ne povas eldoni pli da monpapero ol tiu respondeanta la ekzistantan fizikan metalon. Tiamaniere, ia ajn ŝanĝrapidigo ne povas endanĝerigi la eldonintan Bankon, kaj krom tio, la landan krediton, pro la ekzistanta kvilibro inter la valoro de sia trezoro kaj sia monpapero, ĝi restas staranta. Fine, monpapero sen tiuj-ĉi formulaĵoj estas nenio, kaj tiu ŝtato aŭ pseŭdo ŝtato, eldonanta tiun-ĉi monpaperon, faras bravegaĵon, kaj ke ili danku al ni pro la eleganteco de nia kvalifiko.

La falsigistoj de Burgos povus pretendi, ke posedante ili aŭtentikan monpaperon, pro ĝia kolektado, pri kiu devas respondeci la Banko de Hispanujo, ili samtempe respondecis al siaj devigaj klientoj, pravigo pli bone akceptebla se antaŭ ol la eldono ili ne estus stampintaj la leĝan monpaperon, per kies stampiĵo ili perdigis ĝian tutan valoron, ĉar ĝia modifo valorigante falsan ŝtaton, alligas ĝin je faŝista devizo. Sed jam farita la unua eraro, tiu pri la stampado, ili jetis sin senfine tra la montrampa vojo, elmontrante per sia malpura manipulado sian skrupulan kaj metalan mankon.

La procedo ne estas elpensado de Franco, nek de liaj teknikistoj, kompreneble. Tio estis elpensita en Germanujo okaze de la armistiko. La germanoj faris la plej grandan montramon, kiun registras Historio, nur komparebla al tiu de la Banko de Angola, de Portugalujo, dudek jaroj antaŭ ol ili. Sed tio nuntempa, havas pli da graveco, ĉar en Germanujo faris tion la propra "Reich", respondecante iamaniere per la hipoteke al siaj teroj, al siaj domoj kaj al sia industrio kaj ĉefe al sia kredito kiel aŭtentika ŝtato, dum en Burgos, faris tion bando de banditoj, kiuj forĝis ŝtatkarikaturon, samkiel povus esti ĝin farinta iu ajn leĝenda bandito, tra sendefendaj loĝlokoj.

La germana montrampo bone sukcesis. Germanujo havis la helpo de aro da idiotoj, kiuj ankoraŭ konfidis ĝin kaj kiuj reprezentis grandan nombron da miliono bone etenditaj tra la mondo. Ĝi estis kvazaŭ monkolekto farita kiel simpatio al la malvenko de la imperio. Cetere, la "viktimoj" de la germana ŝtelego rajtis plendi pri nenio, ĉar kiam ili aĉetis la markojn sentis tro da germana inklino kaj multe da egoismo. Sed koncernante la nunan montramon ekzistas nenio el tio. Ĝi estas falsa monbileto perforte altrudita sen respondeco de iu serioza ŝtato. Monbileto tiel falsa kiel la estraro de la ŝtato de Franco, kiel lia animo...

Lauŝajne la eldono de tiuj monbiletoj okazigis, ĉe la faŝista zono, multajn malĝojigojn. La loĝantaro ne akceptis ĝin. Ĝi preferis la monbileton, kvankam ĝi estus stampita, de la Respubliko. Tiu-ĉi mono memorigis ĝin, ke estis aŭtentika ŝtato, kiu respondecis kaj tio esperigis ĝin. Male, tiuj-ĉi novaj prospektoj de Franco, timigas la loĝantaron kaj por ke ili estu akceptitaj, devis denove agi perforte, pri kies sistemo, la friponoj de Burgos estas majstroj.

Tra la diversaj revolucioj okazintaj en Meksikio, multe da generaloj, farigis siajn monbiletojn, deflankigante la oficialan monon. Per sia komando ili altrudis sian monon. Lauŝajne, tio estis logika afero. Sed la meksikanaj generaloj ne eldonigis monpaperon sub la respondeco de iu Banko, sed sub ilia propra respondeco. Ili altrudis kaj ili respondecis tiun monpaperon. Neniam ili pensis enmiksi la Bankon de Meksikio, ĉar ĉiuj, eĉ la plej simplaj, estus mokintaj la eldoninton. Ne estas la sama afero altrudi revolucionan monpaperon en la regata zono, sub la respondeco de Banko, kiun ili ne kontrolas. Laŭ la nuna aspekto, povas esti granda neceso fari tion sekve, se Franco estus farinta ĝin tiel, li ne estus malbone aginta, laŭ lia plano, kiel rabisto de Hispanujo. Kion oni ne rajtas fari estas eldoni je la nomo de la Hispanuja Banko, eĉ kopiante la formuletan "El Banco de España pagará al portador..." (La Banko de Hispanujo pagos al la biletportanto....) Ĉar la vero estas, ke la Banko de Hispanujo pagos nenion pri tio. Kaj tion scias, kiuj ĝin eldonis tiuj, kiuj perforte uzas tiun falsan monon kaj, ĉefe, ni, kiuj tiuokaze devus pagi.



Car Franco kreis tiom da, kial li ne kreis Bankon? Ekzemple, la Faŝistan Bankon? Kreita la organo, facile estus estinta al li apliki la funkcion, kaj en ĝi ankaŭ povis esti tiu pri la monbiletdonado de la Imperiestra Stato. Faŝista Banko! Imperiestra Hispanujo! Stato de Burgos! Tio estas, kun la plej pompa noko, kiun li estus kredinta pli efektiva....

FASISTA DEMAGOGIO KAJ LETEROJ AL ITALAJ SOLDATOJ.

La malvenkego de Guadalajara permesis, oni scias, ekposedi nerefuteblan oficialan dokumenteron pri la malkaŝa itala interveno. Ekzistas alia, kiu, pli humildevena, ne estas pro tio malpli elokventa: ĝi estas la korespondaĵo de la soldatoj. Per ĝi, oni penetras en la akran kaj tragedian flankon de tiu milita ekspedicio. Ĝi konfirmas en ĝiuj punktoj la deklarojn de la kaptitoj. Kompare kun la fanfaronaj militistaj deklaroj, tiuj leteroj montras la disiĝon ekzistantan inter la faŝismo kaj la popolo. Ili denuncas la hontan ŝantaĝon faritan pri la heroeco kaj virtoj faŝistaj. La realeco, la modesta kaj kruda realeco staras tie interne.

Vidu jen la Italujon de la registoj je pompa frazeologio, tiel, kiel ĝi aperas en cirkulero adresita al la "heroeaj" masakristoj de Malago:

"Komandantaro de la Unua Brigado de Libervoluloj. (Lau dia volo). Tagordo Nº 3 de la 10 de Februaro 1937/XV.-La generalo de divizio, ŝefkomandanto de la libervolulaj fortoj, adresis al la trupoj dependantaj de la unua brigado, kiuj konkeris Malagon, la sekvantan proklamon, en dato de la 9ª de Februaro: De post hodiaŭ la Unua Brigado de libervoluloj alprenas la nomon: unua divizio de libervoluloj.

Legianoj de la Unua Divizio de Libervoluloj! Vi skribis de Malago gloran paĝon! En tri tagoj de batalo kaj de marŝado, vi liberigis vin provincon el la ruĝa barbareco; vi redonis al ĝi la pacon, la liberecon, la vivon! Tiel agas faŝismo, kaj vi, ĝia avangardo armita en lukto por idealo, vi interpretis ĝian spiriton, vi elmontris ĝian dinamismon.

Al vi, oficiroj kaj libervoluloj, al via komandanto generalo Arnaldi, kiu kondukis vin al konkero de Malago, mian dankon, kiu esprimas kaj interpretas la penson de TIU sekvanta vin de malproksime! Oficiroj kaj libervoluloj de la Unua Divizio; a! ni!

La divizigeneralo, misioĉefo: subskribas: Mancini.

Malago, la 10ªn de Februaro 1937ª/XV. Generalo komandanta: G. Arnaldi."

Apud la faŝista verovo, vidu la simplan kaj doloran lingvon de la humiluloj, esprimitan en la letero reproduktita ĉi-sube kaj sekviĝanta de ĝia traduko: Traduko de la letero reproduktita sur la antaŭa paĝo:

"Mia kara edzo: Hierau la 18a mi ricevis cian karan leteron, kiu sciigas al mi la bonegan staton de cia sano; mi povas certigi al ci la samon pri mi, pri niaj karaĵaj infanoj kaj pri la tuta familio de cia kaj de mia flanko. Kara edzo, mi ricevis ankaŭ du poŝtkartojn. Mi, kara edzo, ricevas ĝiujn niajn leterojn, sed ni ne scias kial ci ne ricevas novaĵojn de mi....(?) ne....(?) kiel fari. Tamen ci diras al mi, ke kiam oni liberigos cin la hispana registaro donos al ci premion de 6,000 liroj; ci estos kontenta je tio, sed ci esperu, ke ci devos elteni kelkajn suferojn; la monó iras kaj revenas, sed la sano ne revenas plu. Kara edzo, ci volas scii, ĉu mi ricevas la militpagon; mi enspezas



le diamine che in tuam  
 ti vuoi immaginare il parlare  
 di allora mi dice che quando  
 sticci vuole portata la famola  
 ti dono un forte facio.  
 mi spose la tua mamma  
 e accerta da lettera e un  
 cartoline illustrate ora ti  
 manda la scorta per  
 tuo padre e tua madre  
 e da ora i miei tuoi fratelli  
 facci dalla mia famiglia  
 e miei fratelli mio sorella  
 Garmel ora di nuovo  
 ti ricevo facci da me.

La tua offerta spora  
 Concetto. Pac.

Lancetti 19 (1937)

Oh caroissimo sposo ieri  
 giorno 15 o ricevuta la tua  
 amata lettera la quale  
 mi sai sapere lo stato  
 della tua salute lo stesso ti  
 posso assicurare da me e i  
 nostri cari figli e tutta la  
 famiglia la parte tua e  
 la mia. Garand spose e mandò  
 anche due cartoline illustrate  
 io caro sposo le ricevo tutte le  
 tue lettere ma non so perché  
 tu non ricevi notizie da  
 me non come fosse. Percio  
 mi dice che quando ti  
 concedi il governo di 5000  
 di dare il premio di 5000

20

lia tu sei contento di questo  
 modo ma dire di sperare di  
 passare qualche giorno perfino  
 il diavole va e spara una la  
 salute non torna più.  
 Garand spose desidero sapere se  
 ti quando il sussidio io prendo  
 di il giorno compenso con i  
 miei figli ora tu mi dice  
 che mi devo dare la stessa  
 paga che saranno 5000 al mese  
 e mi dice che io devo dare la  
 stessa tua o pure compresi  
 come mio sussidio. Ora spero  
 o di Dio fatti arrivare questo  
 lettere e fatti rasserenare il  
 pensiero. Garand spose come  
 mi è arrivato il tua lettera  
 lo parlato dalla mamma

3

dalla mamma. E tutti  
 e mi a lettera che tu vai  
 crescendo e due figli a  
 giorno ricevo i miei figli ti  
 sei fatto la mia a detto  
 come che sono partiti  
 per un'altra parte io prego  
 sempre per te. Ah Garand  
 di fatti scarsi di qualità  
 pericolo e anche io  
 una messa carnale a  
 fare. Garand spose non  
 ti puoi figurare che  
 pensiero lo sempre penso di  
 te. Fatta termine con la  
 puna e non col cuore  
 dandoti forte facci col affacci  
 di vero cuore di me e i  
 nostri cari figli e sorella



Nº. 14.

7 lirojn por ni kaj ciaj infanoj. Nun ci diras al mi, ke ili devas doni al ni cian pagon, kiu estos de 300 liroj ĝiumonate, sed ni deziras scii, ĉu tio estas aldone al tio, kion ni enspezas. Nun ni esperu je Dio, por ricevi al ci tiun ĝi leteron kaj por serenigi al ci cian penson. Kara edzo, kiam alvenis al mi cia letero, mi portis ĝin tuj ĉe la panjon de cia leŭtnanto kaj ŝi diris al mi, ke ci plipeziĝadas je 2 kilogramoj ĉiutage kaj konsekvence mi vidas, ke ci bone fartas kaj ŝi ankaŭ diris al mi ke vi devis foriri al alia loko. Mi ĉiam preĝas al Sankta Joakimo, ke li evitigu al ci kelkajn danĝerojn kaj mi ankaŭ promesis al li meson kaj ankaŭ alian al Sankta Jozefo. Sekve vi povas imagi, ke mia penso estas ĉiam al ci: Sufiĉe. Mi finas per la plumo, sed ne per la koro, donante al ci fortajn kisojn el tuta koro de mi kaj de niaj karaj infanoj Antonieto kaj Mariuccia kaj ci ne povas imagi la babiladon de Maria, kiu diras al ni, ke kiam ci revenos, ci alportos al ŝi pupon kaj ŝi donos al ci fortan kison. Kara edzo, cia panjo ricevis cian leteron kaj ankaŭ la ilustritajn kartojn. Nun mi sendas al ci la Sanktan benon de cia patro kaj de cia patrino; kisojn de ciaj fratinoj, kisojn de mia familio, de miaj fratoj, de mia fratino Carmela. Nun ankoraŭ kisojn de mi. Concetta Paci. "

Al Legionario - Ferracini Emilio  
 1ª Divisione Ricattari  
 4º Gruppo Battaglione  
 Battaglione Equilino  
 Comp. Comando Gruppo  
 Ministero della guerra O. M. S.  
~~Spagna~~ Roma

Tiu laŭvorta traduko, ĉu ĝi ne vidigas person speciale naivan? Certel!  
 La heroj standardoportistoj de la faŝista ideo estas nur malfeliĉuloj, aŭtentikaj dungitaj soldatoj, kiuj, riskas sian vivon por monaj premioj de demobilizo. Cu sin oferema spirito? Ne! Avido al gajno, profunda mizero!  
 Morti por la faŝismo! Kaj tiuj naivaj alvokoj! Kaj tiuj mesoj! Tre vanaj tamen, ĉar la adresato de tiu-ĝi letero, falinta en niajn manojn, ĉar li frenezigiĝis -kiel centoj da aliaj-, devas estitre malproksime, en la alia mondo....  
 La reĝimo de tiuj obskuraj propagandagentoj, kiuj konvinkas la malfeliĉan vidvinojn, ke ŝia edzo estas bone zorgata, ke li estas, por tiel diri, grasigata! Malgraŭ tio, la apatio ĉeestas. La edzino ne estas partieca, ŝi ne diras: batalu kaj mortu kiel faŝisto. Ŝi preĝas. Tio estas silenta malespero, la sola, kion permesas la Mussolini'a reĝimo. Tiom da rezigno kaj naiveco surprizas: vere, tie la opinio estas tia! Estas tiuj malfeliĉuloj, kiujn oni prezentas al ni kiel la "armitan avangardon" de la faŝismo! Kia malforteco! Kia trompo!  
 Ni transiru al la poŝta organizo, kiu, per la demobilizaj premioj -garantiitaj de neekzistanta registaro- aldonas oficialan karakteron al la ekspedicio.



La leteroj estis adresitaj iel al la "poŝto restanta" de la Militministro en Romo, sendube por kaŝi, almenaŭ por kelke da tempo, la lokon al la familioj, ĉe kiu troviĝas iliaj familianoj. Jen estas unu el tiuj kovertoj, kiu pruvas, ke la sendinto estis jam trompita: "Romo" anstataŭas Hispanujo" ni

Ni ne epilogos. Tiuj atestoj sufiĉas, ili estas elokventaj. Ne! La milito ne vivas en la animo de la popoloj; ili restas pacemaj malgraŭ la perfortoj; la bravaĵoj kaj la fiaventuroj de iliaj militemaj tiranoj. Tiuj ĉi estas fiaskontaj; ili estas nur palaj kaj efemeraj marionetoj, devigataj ĉiam uzi la trompadon por konduki siajn popolojn al la buĉejo.

### LA KONTRAŬFAŝISTA KUNLIGO DE ĈIUJ ESPERANTO - SOCIETOJ EN BARCELONA.

Faŝismo kun ĉiuj ĝiaj kruелеcoj kaj malbonoj kaŭzitaĵoj al la Homaro, havas tamen, unu bonan flankon, ĉar ĝi samtempe kaŭzas, ke la tuta antaŭeniĝinta homaro, partioj kaj klasoj pli kaj pli kunigu sin, kunfandiĝas en unu granda, potenca, kontraŭfaŝista bloko por kontraŭstari la kruelcon kaj brutecon de la faŝismo.

Tiu tiro al unueco inter la kontraŭfaŝistaj amasoj trovis sian laŭtan resonon, inda por imiti kaj deca kiel ekzemplo inter la esperantistaj societoj en Barcelono.

En Barcelono sin kunigis propravole ĉiuj Esperanto - societoj sen escepto de iliaj malsamaj politikaj tendencoj, en unu granda Esperanto - Kontraŭfaŝista - Kataluna - Komitato.

La tasko de tiu Esperanto Komitato, estas propagandi, per la internacia lingvo Esperanto, en - kaj eksterlande por la Generalitat (Registaro) de Katalunjo, sciigi al la mondo pri la novaĵ akiraĵoj sur la tereno de Kulturo, Ekonomio kaj Sociala Ordo.

Tiu peresperanto agado de Barcelona Esperantistaro montras gravan rolon de la internacia lingvo en la batalo kontraŭ faŝismo kaj evidentiĝis, ke en la estonto la Internacia Lingvo Esperanto okupos gravan lokon en la kultura kaj socia vivo de Nova Katalunujo.

Jaume Miravittles, la Komisararo de Propagando de la Generalitat de Katalunujo akceptis la patronecon de la Kataluna Kontraŭfaŝista Esperanto Komitato kaj en sia alparolo li diris: " Mi esperas, ke Esperanto kontribuos al rapida venko super la faŝismo kaj kunlaboros por instali la pacon kaj kulturon en nia lando."

En la unuaj kunsidoj 15 deligitoj - esperantistoj unuanime akceptis, ke la oficiala bulteno "Comunicat de Premsa" de Generalitat de Catalunya estigu samtempe ilia oficiala organo, kiu estas de du reprezentantoj de ambaŭ grandaj sindikatoj U. G. T. kaj C. N. T. redaktata, por reprezenti simbole la demokratian kaj unuecan karakteron de hispana popolo.

Plue oni entreprenos fari pli intensan propagandon en eksterlando por organizi ekspoziciojn kaj porhispanaj vesperojnkaj krome instigi la eksterlandajn Esperanto Federaciojn, societojn ktp. por kunigi kaj alpreni la malkaŝan sintenon kontraŭ la faŝismo.

Esperanto, lingvo internacia, lernebla kaj parolebla por ĉiuj popoloj estiĝis grava faktoro por reciproka interkompreno inter la popoloj. Faŝismo, la plej kruela kaj barbara elmonro de homa estaĵo, estas la plej ŝovinista kaj plej granda malamiko de moralo, kulturo kaj hometiko.

La malpermeso kaj persekutado de Esperanto movado en Germanujo, Portugalujo, la kruela mortigado de la Cordoba esperantistaro devas konvinki la Esperantistaron, ke ĝia plej granda malamiko estas la faŝismo. Do, pro tio, la Barcelona Esperantistaro kunigis por konduki la senpardonan batalon kontraŭ la faŝismo, esperante, ke la tutmonda Esperantistaro sekvos ilian ekzemplon kaj kunhelpos en la defendo de homaj rajtoj, kulturo kaj paco.



SOVET - UNIO EN LA UNUA LOKO.

En la lastaj semajnoj atingis nian oficejon multaj solidarecesprimoj el diversaj partoj el mondo. Ofte estis prezentitaj en la formo materia aŭ spirita. Por ni, batalantoj por la sendependeco de nia patrujo por la libereco de nia popolo estis ĉiuj esprimoj el niaj fratoj alte taksataj. Hispana popolo neniam forgesos tion, la hispanoj scipovas esti dankaj kaj spontaneaj!!

Ĉi sube estas montrita unu el multaj atestoj de solidareco kun la hispana popolo. Tiun fojon ĝi estas el malproksima Ordjonikidze (Nord Kaikazio - U. S. S. R.) okaze de Unua de Majo:

VIVU UNUA DE MAJO - LA TAGO DE INTERNACIA PROLETA SOLIDARECO !

GEKAMERADOJ LABORULOJ !

Hodiaŭ estas Unua de Majo! Hodiaŭ la laboruloj de Sovetio kaj proletoj de kapitalistaj landoj Festas grandan Feston de laboro kaj Libero. En la tago de Unua de Majo ni sciigas la tutmondan proletaron, ke konstruado socialisma en nia lando estas finita. En USSR. je 1/6 parto de terглоbo, dank al gvidado de komunista partio kaj ĝia gvidanto, gvidanto de la tutmonda proletaro - k - do Stalin, la socialismo jam ekzistas, kaj estas realeco!

En nia lando ankaŭ sukcese finigas la plenumado de Dua kvinjarplano. Kelkaj fakoj de popola mastrumo, kelkaj industrioj, sian planon plenumis jam dum kvar jaroj, anstataŭ kvin. Festante tiun ĉi tagon, la Unua Majo, kiu kunligas kun festo de IRH (MOPR), ni solene juras nek unu minuto forgesi pri vi, niaj klasfratoj.

Ni donas proletan promeson ĉiam, kun granda energio partopreni en IRH (MOPR) laboro. La IRH - organizaĵo de nia instituto havas en siaj vicoj pli ol 400 gestudentojn. Por frata materiala helpo al virinojn kaj infanojn de Respublika Hispanio, ni kolektis inter sin 4223 da rublojn. Krom tio ni daŭrigas regule, ĉiumonate dekalkuli de sia stipendio kaj salajro Unu procenton en fondo por helpo al niaj Hispanaj Klaskameradoj.

Tiun ĉi ni faros ĝis tio momento, kiam Hispanaj Respublikanoj venkos kaj forigos la Hispanajn faŝistojn kaj alilandajn faŝistajn intervenojn.

Ni ne lasos la revoluciajn batalantojn kaj iliajn familiojn al malsata morto, je pereco sen hejmo kaj manĝo.

Ni promesas ĉiam kaj ĉie esti kun vi !

Por daŭrigi sian vivon la kapitalismo aplikas nun la saman lastan rimedon por ke tute sklavigi kaj senrajtigi, eĉ same elemente, la internacian laboristaron.

La sanga faŝismo kruelege furiozas inter la laboristaro en kapitalistaj landoj.

Centoj de la plej bonaj klasbatalantoj estas mortigitaj kaj pafmortitaj en faŝismaj landoj.

Proksimiĝas grandegaj bataloj, en kiuj ni kunbatalos ŝultro al ŝultro; rusoj, francoj, angloj, hispanoj, hollandoj, belgoj, ĉinoj amerikanoj, kanadoj, argentinoj, ĉeĥoslovakoj, aŭstralianoj, nov - zelandoj, meksikanoj, aŭstrioj, svisoj, ĉiloj, svedoj, estonoj, norvegoj, k.t.p. kontraŭ la internacia faŝismo.

Internacia proletaro tio ĉi jam pruvis en Hispanio, kie kun hispanoj kunbatalas kaj mortas la franculoj, sveduloj, belguloj, ĉeĥoslovakuloj, germanuloj, hollanduloj, bulgaruloj, ĉinuloj, angluloj, ktp. kontraŭ la sola malamiko - kapitalismo kaj ĝia lakeo faŝismo.

Ili konas, ke batalas nek pro bonstato de Hispanio; ili savas kulturon, savas progreson; ili batalas kaj mortas pro demokrateco kaj libero de ĉiu progressa homaro.

Kun helpo de Internacia lingvo - Esperanto fortigu la fratan solidarecon! Uzu Esperanton je servo de tutmonda proletaro !

Unuigu kaj plifortigu unuecan fronton de laboristaro kontraŭ la sanga faŝismo, kontraŭ nov preparanta mondbuĉado !

Rakontu al vastaj laborularoj de kapitalistaj landoj la veron pri Sovetio

Karaj Klasfratoj !

La studentaro, profesora - pedagoga personaro kaj oficistoj de Agrara Ins-



Nº. 14.

- 13 -

stito en u. Ordjonikidze (Nord - Kaukazio) sendas al vi en tiun 81 tagon, la tago de proleta solidareco - Varmegan Proletan Saluton !

Vivu la unuiĝa Popola Fronto !

Vivu la Heroa Proletaro de Respublika Hispanio !

Vivu la Internacia Proleta Solidareco !

Vivu la Komiterno !

Komisiite de studentara kolektivo subskribis;

(sekvas 20 subskriboj.)

EN HISPANA RESPUBLIKO LA UNUA DE MAJO ESTOS LA LABORTAGO. (lasthore).

Por solonigi la Unuan de Majo proksiman en Respublikana Hispanujo, la ambaŭ Regionaj Komitatoj de U. G. T. kaj C. N. T. decidis;

Konsideri tiun Unuan de Majo kiel labortagon. Kune okazigi mitingojn nur vespere de Unua de Majo, aŭ la duan de Majo matene.

Proponi al la Laboristaj Internacioj, ke la dato de Unua de Majo estu utiligita de ĉiuj Laboristaj Internacioj por la Kontraŭfaŝista Hispana Movado !







# GENERALITAT DE CATALUNYA

PRESIDÈNCIA

COMISSARIAT DE PROPAGANDA

Avinguda 14 d'Abril, 442 bis : BARCELONA : Telèfon 82215


## COMUNICAT DE PREMSA

ESPERANTO ELDONO.

Nº. 15.

Barcelona, 29/V, 1937.

### BILBAO!!! KION VOLAS LA INTERNACIA FAŝISMO EN BASKOLANDO.



Preskaŭ la tutan monaton kontraŭstaras la Baska popolo la feriozan ofensivon de la faŝistaj trupoj. La trupoj de la respublikana Popolarmeo kaj la loĝantaro de Baskolando; kiuj grandparte estas piaj katolikoj, skribas gloriajn paĝojn en la historio de Euzkadiaj la tuta hispana Respubliko. Sub la devizo "Por la libereco kaj ordonoj de Patro", defendas la filoj de Euzkadi la teron de sia patrujo, paŝon post paŝo kontraŭ la grandioza invadarmeo, kiu grandparte konsistas el germanaj kaj italaj soldatoj kun germanaj armiloj ekipitaj, kaj kiu por apogo posedas 150 flugmaŝinoj, precipe ger-

manaj, kaŭzintajn terurajn detruojn en pacaj vilaĝoj kaj urboj de Baskolando. Intertempe estis pruvite, ke la operacioj de faŝistoj en Baska fronto estas tute gvidataj nur de eksterlandaj kaj ĉefe germanaj oficiroj kaj el kelkaj italaj konsistanta generala stabo, sidiĝanta en Deva. Estis pruvite, ke nur en San Sabastian dum 10<sup>a</sup> de Aprilo kaj dum 26<sup>a</sup> de Aprilo, 1500 kaj 2000 germanaj soldatoj estis rimarkitaj, kiuj marŝis en Baskan fronton plifortigi jam tien ekzistantan germanan "Reichswehr" kaj italan armeon. Estis pruvite, ke en la mezo de Aprilo proksimume 35 germanaj milit-flugmaŝinoj en granda alteco traflugis francujon. Tiuj flugmaŝinoj partoprenas nun en batalon kontraŭ Baskolando.

Ne ekzistas ia dubo, ke la ofensivo kontraŭ Baskolando estas gvidata de germana generalstabo interkonsente kun la germana registaro. Ĉi tie oni ne povas paroli eĉ pri la interveno. Hitlergermanujo troviĝas en malkaŝa milito kontraŭ la Hispana Respubliko, sen ke ĝi deklaris la militon al Hispanujo. Kial ĝuste la germana faŝismo tiel forte aranĝis sin en la fronto de Baskolando, kaj kiujn celojn planas la germana ofensivo en tiu parto de Hispana Respubliko?

Post la venko de la respublikanaj trupoj ĉe Guadalajara, estiĝis en la tuta mondo klare, ke la perfidulo Franco perdis sian kroman ludon, kiun li komencis. La malvenko de itala intervenarmeo ĉe Guadalajara ekstrems ne nur la prestiĝon de faŝistaj ribelintoj en la tuta mondo, sed ankaŭ en la vicoj de faŝistoj mem.



La faŝistaj landoj, kiuj per helpo de hispanaj faŝistoj kondukas la militon kontraŭ la hispana popolo, devis ion entrepreni, por savi sin kontraŭ la rapida malvenko, por kiuj tio signifas ne nur perdon de la milito, sed ankaŭ la komencon de fino de faŝistaj diktaturoj en Germanujo kaj Italujo. Al ili koncernis akiri se eble plej baldaŭ la rapidan moralan sukceson, dum ili entreprenis la ofensivon al detranĉaĵo, kiu estas detranĉita de cetera Respubliko kaj kien oni kredis akiri la rapidan venkon per uzado de granda kvanto da homoj kaj militmaterialo.

La germana faŝismo havas ankaŭ aliajn celojn; ĝi kredas, ke post la malvenko de ĝiaj italaj kompanianoj, ĝi akiros facilan triumfon, kiu poste kaŭzos por ĝi la superecon en la dispartigo de hispana rabaĵo.

Pro tio la invadarmeo en Baska fronto alprenis la gigantan disgrandigon, kiu laŭ kalkulo de faŝistoj devus konkeri la malgrandan Baskan landon. Post la unua heroa kontraŭstaro de Baskoj kontraŭ la faŝista ofensivo, estis kreitaj novaj rezervoĵoj kaj ĉefe la aviadarmilo estis plibonigita. Post proksimume unu monato, estas la bilanco de germana ofensivo en Basklando pli ol malkontentega. Kun la apogo, de ceteraj hispanaj popoloj, kiuj spite multaj malfacilaĵojn, venis helpi sian fratan popolon, povis jam nun la Baska popolo komenci la sukcesan kontraŭofensivon en la fronto de Biskaja.

La germana faŝismo en sia ofensivo en Basklando havas krom tio ankoraŭ alian celon. Basklando posedas riĉajn metalminejojn, kiuj per siaj fosforomanko estas la plej bonaj en Eŭropo. Sed la ferominaĵo mankas al Germanujo por ĝia militekipaĵo. La Baska ferominaĵo prizorgis diversajn landojn, precipe Anglujojn, kiu estas la ĉefa aĉetanto de Baska ferominaĵo. En jaro 1936 konsistis la Baska liverado de ferominaĵo al Anglujo el 21 % de ĝia ĝenerala bezono, antaŭe Basklando liveris ankaŭ al Germanujo gravajn kvantojn de ferominaĵo, kiuj nun ne plu okazas. Tiun ferominaĵon volas nun la germana faŝismo ricevi en siaj manoj. Ne estas ia hazardo, ke la germanaj flugmaŝinoj bombardas la malfermajn vilaĝojn kaj urbojn de Basklando kun fajrobomboj, mortigante la sendefendan civiloĝantaron, sed ke ili ŝparas la grandajn industriojn kaj minejojn en Basklando? Hitler, Krupp kaj Thijssen opinias jam tiujn industriaĵojn kiel siaj propraj. La ferominaĵo - produkcio en Basklando estas en stato kontentigi proksimume 35 % de bezonoj de Hitlergermanujo por militekipiga celo. Tio klarigas la intereson de germana faŝismo en la konkero de Basklando. Por konkeri tiujn minejojn, Hitlerregistaro estas tute indifidenta pri la morto de miloj germanaj soldatoj.

Krome ĉe la naci-socialistaj militfervorantoj ludas grava rolo la ideo, ke per konkero de Basklando oni povos doni al Anglujo fortan frapon. La Angla rearmigo forte malkvietigas la regintojn de la tria regno. Ili timas, ke ĝia efektevigo kaŭzos fortan plifortigon de la kolektiva paco. Pro tio la Hitlerregistaro rigardas tion kiel vivgravan demandon, por nebligigi la Anglan rearmigon. Tio okazos, se la liverado de Baska ferominaĵo al Anglujo forrestos.

Estas sufiĉe kompetente, ke la oficiala organo de germana ŝtatbanko "Der Deutsche Volkswirt" (germana popolmastro) de 23<sup>a</sup> de Aprilo, tre klare informas ke la "plilonga forreŝto de Bilbao - ferominaĵo en la nuna tempo kondukos al influaj malhelpoj en la efektevigo de Angla armigo - programo. La okupo de Basklando de faŝistoj povas esti ankaŭ uzata kiel premrimedo por tiuj reakciaj rondoj en Anglujo, kiuj postulas la rekonon de la registaro - Franco de Anglujo.

Oni povas jam nun diri, ke bone elruligita plano de germana faŝismo en la Biskaja fronto fiaskis. La Baska popolo faras la dikan strekon trans tiu plano. Ĝi defendas sin per la sango de siaj plej bonaj filoj, ne nur sian liberecon, kaj tiun de la tuta hispana popolo, sed defendas ĉiujn popolojn, la tutan homaron, se ĝi metas la decidajn barilon sur la vojo de faŝistaj militkuloj en ilia realigo de mondmilitplano.



ANTONIO SÉSÉ

GRANDA PERSONO DE LA REVOLUCIO ESTAS MORTA.

Antonio Sésé, la ĝenerala sekretario de la Ĝenerala Socialista Sindikato (U. G. T.) en Katalunujo, estis unu el la plej interesaj personoj el politika vivo en nia lando. Li estis 43 - jaraĝa kaj naskiĝis en Huesca. Kiel juna komerca servisto li aliĝis frutempe al la laborista movado, de kiu li estis la plej nelacebla batalanto. En la jaro 1918 li venis Barcelonon kaj apartenis tiam en la anarĥista grupo ĝis jaro 1928. Li estis ano de anarĥista sindikato C.N.T. kaj en jaro 1923 li estiĝis prezidanto de la komerca sindikato de anarĥistoj. Lia nelacebla agado en la servo de la laboristaro kaŭzis al li multajn persekutojn dum la monarĥista reĝimo en Hispanujo. Lia sincera batalo por la interesoj de laboristoj kaj komercaj servistoj, ĉe kio li ne ŝparis siajn personajn oferojn, prenis lin plurfoje al la malliberejo kaj maldolĉaj jaroj de emigracio. La unuan fojon li estis enkarcerigita sub la reĝimo de la monarĥista gubernatoro Martinez Anido en novembro 1922 en tiel nomita "Pumejo", kiu estis aranĝita de tiaj tempaj reĝintoj por meti en ĝi homoj, ne estintaj por ili sufiĉe agrablaj por la nefiksita kvanto da jaroj.

El la malliberejo ellasita, li daŭrigis sian agadon pro la interesoj de la laboristoj kaj venis por la dua fojo al la "Pumejo" dum la regado de Primo de Rivera en la jaro 1924, kie li estis teninta ĝis julio jaro 1925. Preskaŭ liberigita, li estis denove arestita kaj tiun fojon kulpigita je la ribelo kontraŭ la ŝtato. En jaro 1927 li estis provizore liberigita kaj elprofitante tiun okazon Sese elmigris Francujon, kie li dum jaroj laboris kiel kamparano.

En Parizo ricevis Antonio Sese la kontakton kun la Marksista laboristmovado al kiu li tiam aliĝis. En septembro 1930 li revenis Barcelonon kaj denove okupis lin la zorgoj pro la faŝista diktaturo, kiu prenis lin por la tioma fojo al la malliberejo por du monatoj. Kiam li en decembro 1930 estis liberigita, sentis jam la lando la proksimon de la revolucio, kiu baldaŭ Primo de Rivera kaj poste la tutan monarĥion forpelis. Antonio Sese, estis kompreneble denove trovita en la unuaj vicoj de batalantoj por la pli bona Hispanujo. Ĉe unu demonstracio en Marto 1931 Sese estis denove arestita. En jaro 1931 aliĝis Sese al Komunista Partio, de kiu li estis la plej diligenta antaŭenbatalanto por la starigo de "Unuiginta Socialista Partio Kataluna". Li estis longan tempon sekretario de Kataluna Komunista Partio kaj estro de aliaj gravaj partiaj institucioj. Du monatoj antaŭ la ribelo de faŝistaj monarĥistoj, li estis vokita por la gvidado de Ĝenerala Socialista Sindikato (U.G.T.), de kies la ĝeneralsekretario li restis ĝis la morto.

Dum la lastaj registarkrizoj, Antonio Sese estiĝis ministro de la Ĝenerallitatkaj kaj kiam dum la lastaj malŝelĉaj tagoj en Barcelono, Sese iris al domo de la Ĝenerallitat por plenumi sian taskon, la kuglo de la faŝista provokatoro finis lian vivon. Sese mortis en la dramata momento, kiam lia sindikato komisiis lin preni denove la postenojn de la ministro.

Kun Antonio Sese foriris de ni la granda viro, granda demokrato, nelacebla antaŭbatalanto por unuecfrento inter la laboristoj. Antonio Sésé kvankam estas morta, tamen por Katalunujo kaj por la Kataluna laboristaro, Sese restos ĝiam en la memoro.

LA FORKURO EL LA RIBELINTAJ REGIONOJ.

La higiena komisiono transdonis al la Ligo de Nacioj la komunikon, en kiu estis konstatite, ke 1,400.000 hispanoj elmigris el regionoj okupitaj per faŝistoj.

Nenio montras pli bone ol tiu cifero, la akran kontraŭstaron de la hispana popolo kontraŭ la faŝismo. Se dum ok monatoj unu kaj duino milionoj da ho-



Nº. 15.

moj decidis forlasi siajn hejmojn, spite ĉiujn koncernajn danĝerojn, forlasi la terenon okupitan per faŝistoj, tiel signifas tio, ke ekzistas pluraj milionoj da hispanoj en la faŝistaj regionoj, kiuj estas por la laŭleĝa Registaro de Respubliko kaj kontraŭ la perfidulo Franco.

Fakte la respublikana regionaro kŭnstante pliriĉiĝas en loĝantaro el diversaj direktoj, kiuj estas per faŝistaj sinioroj okupataj. Ekzistas vilaĝoj kies loĝantaro duoble pligrandigis; Barcelono havos baldaŭ la milionon da rifuĝintoj, Valencio kaj la ĉirkaŭaĵoj estas plenigitaj kun rifuĝintoj el regionoj okupitaj per faŝistoj. Oni povas diri, ke la plej granda parto de hispana popolo loĝas nun en la regionoj de la Respubliko, kaj alia parto de hispana popolo prefere hodiaŭ forlasos iliajn hejmojn por transiri al regionoj de Respubliko.

### "LA FINANCA SITUACIO EN LA RIBELULA KAMPO ESTAS VERE KRIZA"

La ribelula ĵurnalaro malbone kaŝetas la monaj embarasoj de la t. n. Stato de Burgos. La unua indiko de tiuj embarasoj montriĝas en la kolektivoj kaj la urboj. Estas malpermesite posedi pli ol 25 pesetojn en arĝentaj moneroj. Riskas je certaj danĝeroj la gardantoj de pli ol 500 pesetoj en bankbiletoj. Oni povas elirigi la oson kaj la arĝenton el la monujoj kaj kestoj apelaciante al la patriotaj sentoj; same pri la juveloj. En kelkaj lokoj la rigoro iris ĝis la ekstremo konfiski la dentajn aparatojn el oro. Tiuj detaloj estas sufiĉe bone konataj.

Ni cedas nun la parolon de S-ro Guillen, ĝenerala direktoro de la valutoj; "Estas sufiĉe malfacile, li diris, funde koni la financon en la faŝista kampo. Indikoj montras al ni, ke ĝi estas sufiĉe delikata, se ne katastrofa. Estas evidente, ke tio povas neniu surprizi, se eĉ li ne estas sperta en tiuj aferoj. La solaj trompitaĵoj en siaj kalkuloj estas la provokintoj de la enlanda milito hispana. Ili kredis, ke la milito estis la afero de tagoj, maksimume de kelkaj semajnoj. Jen la batalo daŭras jam de monatoj sen la ŝanco de sukceso por ili.

Por siaj unuaj elspezoj, Franco bone starigis la financon planon, forprenante, inter alie, la oron deponitan en la bankoj, kiuj falis en iliajn manojn. Sed la rabajo estis malgranda, ĉar li ne posedis, kiel li supozinta, la oron de la Hispana Banko. Tiu unua elriviĝo estis lia unua eraro.

Sed pro la daŭro de la batalo, la "generalestro" vidis sian militrezoron elĉerpita post tri monatoj. Li krome trovis grupon da induŝtruisoj, da aris-tokratoj, da financistoj kaj da terposedantoj por sin helpi, sed ilia helpo estis, kiel glaso da akvo en la maro, konsiderante la egajn elspezojn de la moderna milito. March, la maljun Majorka bankiero investis en la aferon dek milionojn da dolaroj.

Tiam, por havi rimedojn Franco komencis negoci per la piritoj de Huelva kaj la mineralo de Er-Rif, Ĉar tio ne sufiĉis, li hipotekis partojn el nia teritorio; la Kanariajn kaj la Balearajn Insulojn, Marokon. Sed la bezono de mono flanke de Burgos, fariĝis pli kaj pli grandaj, ĉar al la elspezoj de la milito aliĝis tiuj de la diplomatio; la Militista Estraro, dezirante afekti veran ŝtaton, sendis dekoraciajn ambasadorojn - certe tre multekostajn-, tien, kie oni volis ilin akcepti.

Ĉar la situacio estiĝis angora, Franco havis la strangan ideon stampadi la Hispanbankajn biletojn troviĝantajn en la ribelula teritorio. La popolo alarmiĝis, sed ĝi alportis siajn biletojn al stampado.... Ne gravas, ke la kalkulistoj de Francoplandis pro manko de patriotismo de la loĝantoj de la ribelula sektoro.... Nur du trionoj de la biletoj ekzistantaj estis stampataj; la restantaj malaperis... La homoj pensis prave, ke ĉiu stampita bileto fariĝas mortinta kredito por la estonto, vidante pli kaj pli nebla la venko de la ribelintoj.



Nº. 15.

Franco devas tamen esti ĉirkaŭita de kompetentaj financistoj. Tial, ke devizoj kaj la oro elĉerpiĝis kaj lia kredito ŝanceliĝis ekster la landlimoj, Franco nur devis repreni la Hispanbankajn biletojn, la nestampitajn, ĉar ili povas esti - tio estas supozo tre riska de la ribelintoj - espero pri ricevoj. Estas tiam, kiam aperis la fama eldono de biletoj el Burgos, sen la garantio en oro kaj subskribitaj de iu neniel kvalifikita en ĉi tio afero. Tio estis

la dua eraro de Franco.

La minaca trudo ŝanĝi la stampitajn biletojn kontraŭ hispanaj biletoj presitaj en Germanujo, semis la panikojn en la ribelula kampo, kie oni fine konscias la montrompon. La dirita papero ne enhavas por la posedantoj iun garantion; ĝi nur cirkulas pro la minaco. Por sin forŝteli el tiu anstataŭigo de biletoj, certaj personoj afektas la nehavon, sed la plej malgranda malprudenteco povas kosti kare al la kaŝantoj. La maltrankvileco invadis la ribelulajn oficialajn rondojn, ĉar pli ol unu monaton post la ŝarĝordono, apenaŭ 40% da la stampitaj biletoj estis reenirintaj....

Tia estas la situacio. Ĝi emas malboniĝi, ĉar ĝis tiam nur la biletoj de 25, 50 kaj 100 pesetoj estis metitaj en cirkuladon. Baldaŭ eliros tiuj de 500 kaj 1.000 pesetoj - kies eldono atingas konsiderindajn proporciojn. La konsekvenco de tiu nova eldono pligrandigos la panikon en la ribelula zono ruinigante fine la etan krediton, kiu restas al la Estraro de Burgos en eksterlando.

Tie estas la angoro de Franco; nek la piritoj, nek la fero sufiĉas por pagi la elspezojn de la milito. Nur sole Germanujo sendis la militmaterialon por 800 milionoj da ormarkoj. La sumo de la sendaĵoj el Italujo ne estas ankoraŭ ekzakte konata; oni scias nur ke la eksporto ne sufiĉas por pagi la elspezojn, kiuj fariĝas aliaj anticipoj.

La kredito de la ribelintoj estas tiel ruinigita en eksterlando, ke la anglaj negocistoj akceptas negocojn nur je interŝanĝo de varoj. Ĝi estas la reiro al la antikva varŝanĝo".

Jen per grandaj trajtoj la financa situacio de la ribelintoj vidita de specialisto en la afero. Estas facile kompreni, ke se la vundebla punkto de la modernaj ŝtatoj plej firmaj, plej riĉaj kaj plej fortaj, troviĝas ĉiam en iliaj financoj, des pli prave, kiam ŝtato, ne havis leĝan ekziston, nek oron, nek iun krediton. Eĉ se psikologie - kio ne okazas -, ĝis la situacio estus firma, la falsa ŝtato de Burgos ne estus tamen kapabla eviti la kompletan financan disfalon, kiuj ĝin insidas. Al la psikologia putrado aldoniĝas la bankroto. Ĝi estas pli ol sufiĉe por konkludi pri la disfalo tiel proksima kiel certa de la Estraro de Burgos.

---

#### LA NOVA REGISTRARO EN HISPANA RESPUBLIKO.

Ministro - Prezidanto, Ministro de Financoj kaj Ekonomio estas Negrin (partio socialista). Ministro de Eksterlandaj Aferoj estas Girat (partio maldekstre respublikana). Ministro de Defendo estas Indalacio Prieto (partio socialista). Ministro de Justicio estas Irujo (el Baskolando - katoliko). Ministro de Internaj Aferoj estas Zugozaĝoitia (partio socialista). Ministro de Instruado kaj Sano estas Hernandez (partio komunisto). Ministro de Agrikulturo estas Iribe (partio komunisto). Ministro de Publikaj Laboroj kaj Komunikado estas Giner de los Rios (partio respublikana unio). Ministro de Sekureco estas Ayguade (el Katalunujo).



HITLER KAJ INFANOJ.

En la kolonio de Baskaj infanoj en Anglujo, okazis terura ektimo elmontra por tiuj personoj, kiuj supozas troigitaj la rilatojn pri la senhonora milito farita de la germanoj en la Basklando. Super la koncernanta kolonio, dum la infanoj ludis en la libera aero, aperis kelkaj flugmaŝinoj farantaj manovrojn. Apenaŭ oni ekaŭdis la raŭkadon de motoroj, la infanoj levis la kapojn serĉante en la horizonto la mekanikajn birdojn, kiuj alproksimiĝis flugante laŭlinie en la vidindatformacio. Tuj kiam vidis ilin la grupoj de malgrandaj rifuĝintoj, ili kuris ĉiufanken, meze de granda kriado okazigita pro la supren flugantaj maŝinoj.

La plentimaj infanoj kuradis panike, serĉante la rifuĝejon, kiun ilia instinkto, edukita pro la bombardadoj, kiuj ili travivis en sia patrolando, ne scias trovi nun. Sufiĉis la ĉeesto de la flugmaŝinoj, timiga bildo de la estinta suferado, por forgesigi ilin, ke ili troviĝas en Anglujo kaj malproksime, tre malproksime de la buĉistoj.

Cu oni volas pli nerefuteblan pruvon pri la bruligistoj de Guernica kaj aliaj Baskaj urboj, samkiel pri la sovaĝa krueleco, nekomprenebla por ĉiuj personoj havantaj normalajn sentojn, kiun praktikas la aviadistoj germanaj sur senkulpaĵaj estaĵoj ?

La "naciista doktrino" de hitleranoj estas senkompata. Ni nun rememoras, ke en unu novelo de Ludvig Renn; "Antaŭ la mateniĝo", kiu aperis antaŭ nelonge - Junulo, kiu estis viktimo de senhonoriga perfortaĵo flanke de la agentoj de "Führer", diras al sia patrino; "En la lernejo oni instruis min, ke la pieco estas enkondukita de kristanismo pere judo Paŭlo kaj ke sekve, ke ĝi ne estas norda, ĝi ne estas aria, ĝi estas kontraŭa kompreneble kun la heroismo".

Hitler, kiu militas kontraŭ la Dio katolika kaj la Dio luterana por enradikigi en sian popolon novan kredon, kiu pli harmoniu kun la barbareco de la milito, nura religio por ĉiu germano, fiera pri la pureco de sia sango, paliĝos la famon de Herodes. Li komencas esti la teroro de la infanaro kaj ni esperas, ke la infanoj oferbuĉitaj al lia naciista krueleco taŭgos kiel ornamaĵo ĉe lia monumento.

Li volas forpeli la piecon el Germanujo! La pieco estas sento de la malfortuloj! La infanoj negermanaj devas esti oferitaj kaj tiuj havantaj arian sangon devas lerni adori lin.

Ni elpensas nenion. Kion ni nun diros estas reproduktita el unu libro de Roben d'Hancourt, "La Evangelio de la Forto". En la kantinoj de la Filantropa Naciista Komitato, oni devigas al infanoj, antaŭ kaj post la supo, deklami preĝon al "Führer". Tiuj malsataj infanoj, estas en la Tria Reich, samkiel tiuj, kiujn la romana Imperio prenis sub sia vartado por poste nutri siajn legiojn. La akso Romo-Berlino malebligis al Mussolini denunci la plagiaton.

La preĝon, kiun la infanoj de Germanujo estas devigataj preĝi, antaŭ ol la supo, diras laŭtekste: "Führer, mia führer, kiun Dio donis al mi: protektu kaj konservu mian sanon. Ci savis Germanujon el la abismoj de la mizero. Al ci mi ŝuldas mian ĉiutagan panon. Daŭrigu ĉe mi; ne forlasu min. Mia führer, luno kaj konfido de mia spirito! Heil mia führer!"

Aliaj similan preĝon preĝas la infanoj post la fino de la manĝaĵo, por danki sian dian protektanton, kiu pretigos ilin por taŭgi kiel kanona karno por ilia plej granda gloro.

Se la infanoj hispanaj estus ĉiuj blondaj kaj sciis preĝi al Hitler!... Sed ili estas, en sia plej multe, brunaj kaj portas en la sango la mikrobon de la libereco.

Ili estos ekstermitaj!!



LA SANGTRANSVAZIGAJ SERVOJ DE LA KATALUNA REGISTARO.

La milito, kun ĝia dolora sekvo, okazigis, ke ĉiu havanta rilaton kun la ĥirurgio kaj kun la kuracsystemo de la vundoj okazigitaj en la daŭro de l' batalo, estas pliperfektigintaj pri tiaj konoj. La grandaj necesoj pri atentaj niajn klasfratojn vundite falantaj sur la batalkampoj je la defendo de la kontraŭfaŝista celo, faris, ke ĉiuj homoj specialigitaj en la diversaj aspektoj de la ĥirurgio estu viglaj por eltrovi kaj porti al praktiko metodojn kaj procedojn kun la celo malpligrandigi la terurajn efikojn de l' milito kaj por ke la kuracado de tiuj vunditoj estu pli rapida kaj kompleta.

En tiu-ĉi humana laboro rimarkege distingiĝis niaj scienculoj, kiuj multokaze atingis eĉ superigi la plej faman specialiston de ekster nia lando. Estas vere, ke la alveno de kelkaj kuracistaj eksterlandaj elementoj faris al ni grandan servon, honore al la vero, ni devas diri, ke en la plimulto da fojoj ili portis al ni procedojn, kiujn ni jam estis konintaj kaj eĉ uzintaj.

Ĉi-tie estas por doni ideon pri tio, kion ni diras, la sangtransvazigaj servoj, kiuj perfekte funkciadas de la komenco de la kampanjo. Interparolo kun la D-ro. Durán Jordà, havigis al ni la okazon detale koni la formon per kiu funkcias de la unua momento la citita Sangtransvaziga Servo de la Registaro de Katalunujo. Multe interesis al ni profunde koni ĉi-tiun aferon por certece scii, ĉion, kio povas ekzisti pri la supozitaj enovigoj praktikitaj de kelkaj kanadaj kuracistoj eĉ pri tiu-ĉi specialeco pri kiu lastatempe oni parolis.

D-ro. Durán Jordà, informas al ni kiel de la unuaj tagoj de la milito, li prenis sur sin la zorgojn de tiuj-ĉi gravaj servoj. Dum la lastaj tagoj de Septembro, tiuj-ĉi servoj transiris al Milita Saneco kaj sekve, al la Registaro de la Generalitato de Katalunujo.

Plej rimarkinde el tiu informado kaj ĉefe, kion pli interesas al ni montri, estas, sendube, la procedo uzata por ke, per speciala systemo emboteligi la sangon, ĝi povas esti injekciata ĉe la sama batalfronto, sen neceso pri ia ajn akcesoraje nek pri kuracistoj. Do, ĝi estas tiel, ke per tiaj boteloj havantaj du prematmosferojn oni atingas tiun simpligon tiel estiminda ĉe la fajrolinio, kie en la plimulto da fojoj oni ne havas multajn elementojn, kiuj per aliaj procedoj estus necesegaj.

Krom ĉi-tiu detalo estas aliaj, kiuj montras la bonan aserton havantan, ĉiuj kunlaborantoj de tiu grava tasko.

Oni faras tiun servon en la sanga hospitalo № 18, kie alkuras decide la sangdonantoj, tute ne postulante ian ajn pagon, nur por la celo esti kiel plej multe taŭgaj al la kontraŭfaŝista afero. Estas kalkulitaj po 1400 la gesangdonantoj, kiuj ĉiutage oferas sindoneme sian sangon por la militvunditoj. Inter aliaj detaloj, kiuj rakontis al ni D-ro. Durán Jordà, kiuj reliefas la solidarecan kaj helpan spiriton akzistantan ĉe la sango-gedonantoj, pro la nunaj cirkonstancoj, estas la okazaĵoj pri tutaj familioj, kiuj alkuras la hospitalon, kiel sangdonantoj, kaj tiu okazaĵo pri lia jaraĝa infano forkurinta de la lernejo por doni sian sangon...

Ni sciigas, ke tiuj gravaj servoj estas efektividataj ... per malgranda nombro da personoj. Tri kuracistoj, unu ĥirurgihelpisto, du flegistinoj kaj unu flegisto, estas la tuta personaro prizorganta la Transvazigajn Servojn de la Registaro de Katalunujo! Krome, ekzistas la aŭtobilo efektividanta ĉiutage vojaĝojn al la fronto, perfekte dotita per malvarmiga ekipo portanta ĝis la fajrolinio nem la injekciaĵojn, kiuj estis preparitaj en Barcelona kaj kiuj devas savi multajn junajn vivojn de niaj kuraĝaj batalantoj.

Tiel estas, kiel silente laboras la kamaradoj de la Sangtransvazigaj Servoj por malpligrandigi la terurajn konsekvencojn de tiu malbenita milito al kiu ni estis portataj, kunlaborante per ilia penado en la afero, kiun ĉiuj ni defendas.

Antaŭ nelonge, ni sciigis, ke diversaj laboristoj el Zürich estas donintaj sian propran sangon por ke ĝi estu tuj sendata al Hispanujo. La sango alvenis



al ni bonstate per aviadilo, sed la loka estraro el tiu svisa urbo kaptis la laboristojn, kiuj tiel sindoneme volis helpi siajn fratojn el Hispanujo batalantaj por justa kontraŭfaŝista celo. Eĉ per ĉi-tiu tute malhumana maniero estas sabotata la lukto, kiun ni subtenas por la rajto al la vivo, por justeco kaj por libereco!

### MEKSİKIO KAJ ĜIA INTERNACIA SINTENO.

Hispanujo neĝiam povos ŝfiĉe danki al Meksikio pro la morala kaj materia helpo, kiun ĝi havigis al ĝi dum tiuj dek monatoj de batalo kontraŭ la faŝismo. kaj tion ni bone memoros en niaj estontaj rilatoj kun tiu lando.

Meksikio, kiu konservis ĝis la dato la samajn kutimojn kaj tradiciojn de ni, estas frata lando, eble, tiu, kiu estas plej ligita al ni el ĉiuj amerikaj Respublikoj, kaj pro tio ĝi pensas samkiel ni pensas kaj ĝi sentas samkiel ni sentas. Tio estas: ĝi ankoraŭ havas la spiriton saturita per tiu proverba nobleco de nia raso, kiu, kunigita al ĝia juneco kiel libera Stato, metas ĝin antaŭ mondon kiel potencan al kiu oni devas respekti kaj admiri.

Kaj kiel tia potenco ĝi agas. Se en Ameriko estas Statoj, kiuj pretendas esti aŭtoritaremaj; se en Eŭropo estas nacioj, kiuj faris el la aŭtoritarismo leĝon por ĉiuj; Meksikio deflankigas tiujn malgrandaĵojn kaj starigas sin kiel demokrata Stato, plene demokrata, tiom da, ke ĝiaj voĉoj kaj sinteno aŭdiĝas en ĉiuj mondaj sferoj.

En unu el la lastaj kunvenoj de la Ligo de Nacioj, iu lando senhonte petis, ke Abisenujo estu elpelita de la kunveno, la reprezentanto de Meksikio kontraŭstaris tiun pretendon pledante la motivojn, kiujn havas Abisenujo por ke oni akceptu ĝin kiel nearegantatan Staton. Tiu-ĉi incidento forpasis sen esti rimarkita de la granda amaso, sed la fakto en si mem, parolas tre alte favore de la meksika popolo, kiu scias defendi la subprematojn, kiel Abisenujon, kaj la surpaŝitajn popolojn, kiel nian Respublikon.

Same pro ĝia agado en Hispanujo, kiel pro ĝia interveno en la diversaj internaciaj problemoj pri kiuj ĝi estas interveninta, samkiel la severeca kaj korekta ekzemplo, kiun ĝi donis al siaj frataj landoj la hispan-amerikaj Respublikoj, Meksikio difinis sian internacian sintenon en la senco, ke oni devas respekti la rajtojn de la homo kaj de la popoloj, kiam tiuj estas akiritaj per la liberega volo de ili mem.

Kelkaj landoj, kiuj agas sen hipokrito kaj ĉirkaŭvojoj, kiel delonge faras Meksikio, sufiĉus por firmigi la pacon inter ĉiuj homoj de la tero. Ni, kiel hispanoj kaj respublikanoj, profunde admiras tiun fratan landon dezirante al ĝi pli bonan sorton en ĝia destino ol tiu, kiun havas nia lando.

Malgraŭ la bonaj intencoj de Meksikio, samkiel ni tiu lando estas tre kalumniata kaj la plej absurdajn fantaziojn oni faras pri ĝi. Oni faras legendojn pri ĝiaj tipaj kutimoj, pri ĝiaj vivrimedoj kaj pri la intestaj luktoj, kiujn ĝi travivas, kaj tiuj kalumniistoj ne soias, ke same Meksikio, kiel Hispanujo, estas travivinta la martirecon de eklezia perfortregado, kiu multe malebligis la disvolvigon de ĉiuj vivenergioj de ambaŭ landoj. Meksikio povis jam forpeli la jugon, sed ankoraŭ restaĵoj restas en ĝi, kaj en Hispanujo ni estas farantaj tion de la 19a de Julio.

Estante, la rilatoj inter la du landoj eksperimentos radikalan transformigon en bonfaronta senco kaj sen ia ajn dubo, ĝi estos motivo por plivastigi la marajn komunikojn inter la du kontinentoj, kaj la eksportan kaj importan komercon, kun la celo, ke ni soios reciproke fari por Meksikio ĉion, kion ĝi bezonus de ni.

Ke ĝi daŭrigu tra tiu bona vojo kaj ĝi trovos la kompenson.





# GENERALITAT DE CATALUNYA

PRESIDÈNCIA

COMISSARIAT DE PROPAGANDA

Avinguda 14 d'Abril, 442 bis

BARCELONA

Telèfon 82215

## COMUNICAT DE PREMSA

ESPERANTO - EL DONO

Nº.16.

Barcelono, 5/VI/1937.

### LA DEFENDO DE LA GRANDAJ IDEALOJ DE LA LIBERAJ POPOLOJ.

( Per leklaroj de la Prezidanto Companys)

Dum malmulte da tempo ni suferis la barbaran bombardon de Barcelona, la atakon al niaj ŝipoj en laŭleĝaj akvoj kaj lastatempe la bombardon de Almería per germanaj militŝipoj.

Oni volis malfortigi la nunan Registaron de la Respubliko per la supozo, ke ĝi inklinus sin al la akcepto de interkonsentaj formuloj kaj pritrakeblecoj kun la faŝistoj, kiuj nur estas instrumentoj de la internacia faŝismo. La certa malvenko de la ribelintoj ŝajnas nun stimuli al tute malkaŝa agado de ĝiaj eksterlandaj gvidantoj. Ciutage prezentiĝas kun pli larĝaj kaj grandiozaj aspektoj nia batalo por la defendo de la grandaj idealoj de ĉiuj liberaj kaj demokrataj popoloj el la mondo.

Dum la okazantaĵoj disvolviĝadas, estas necese, ke ni plifortigu niajn virtojn per la propra grandiozeco, kiun nia batalo signifas. Oni devas rapide gajni la militon.

La krimaj atakoj de la eksterlandaj nacioj okazigis la renaskiĝon de la landovolo, kiu sin manifestis tuj kaj kun forta decido antaŭ la travivanta teruran konvulsion, kies respondeculoj estas la faŝistoj, kaj ili estos ankaŭ respondecaj pri la teruraĵoj devenitaj kaj pri tiuj, kiuj povos deveni el tiu invadomilito, kiun ili preparis kaj kontraŭ kiu ni nin defendas.

Nia ofero ne estos senfruktodona, ĉar estos malaperintaj la kastoĵoj de la monarĥia Hispanujo, kiuj havis la landon submetita, kaj ni estos farintaj la fundamentojn de vera popola Respubliko.

Katalunujo malsatas la perfortoĵojn, estas bona politiko de kontraŭ-faŝista defendo kaj respondeco eksciti la denaturajn virtojn de nia popolo, hodiaŭ forte kunligita, pli ol iam, per devaj stimuloj kaj emocia frateco kun la sorto de la respublikana Hispanujo.

### LA HEROA ANTAŬENIRADO DE NIA POPOLARMEO AL SEGOVIA.

La militaj operacioj statas tre malbone por la ribeluloj. Haltigita la faŝista ofensivo al Bilbao, la ribelula panoramo ne estas nur malbona, sed malespera. En la ĝenerala daŭro de la operacioj estas nek unu esperiga signo por ili. Haltigitaj en Madrido. Haltigitaj en Bilbao. Haltigitaj en An-



No. 16:

daluzio kaj ŝtopitaj en Aragono, kaj ĝuste tio okazas proksimume dekunu monatoj de la faŝista militistaĵo, kaj en plej bona epoko de la jaro por komenci grandajn militajn operaciojn.

La rapidigaj helpkrioj de Franco tra diplomata vojo decidigis al la faŝistaj nacioj, kiuj dekomence helpas lin, agi tute malkaŝe kontraŭ la hispana Respubliko surpaŝante la internaciajn rajtojn de la popolo. Tiuokaze, Germanujo situis sin en vera ribeliĝo kontraŭ la Komitato de Neintervem. Pro tio, Germanujo, vidante perfekte la ĥaosan kaj malesperan situacion de la Komitato de Salamanca, politike profitas la justegan bombardon de nia aviacio kontraŭ la ŝipo "Deutschland", efektivas sian internacian atakagon kontraŭ la urbo Almería, kaj tuj ekŝiĝas, kune kun Italujo de la Ne-intervena Komitato, ĝuste por intenci-se ili povas-alifoje helpi senhonte, kiel antaŭe, al la faŝistoj kaj vidi se tiamaniere estas eble modifi la nacian panoramon de la milito. Tiu kaj ne alia estas la vera signifo de la germana atako al la haveno de Almería. Do, ni estas, en la internacia aspekto, kiel antaŭ la konstituo de la Komitato de ne enmiksiĝo. Ĉiuj kun la manoj liberaj.

Kompreneble, ke la afero sufiĉe ŝanĝiĝis favore al ni. La faŝistoj restis kontraŭ la pordejoj de Madrid, kiam siaj celoj estis ĝian tutan posedon. Ili restis sen eni Bilbao'n, kaj nun, per tiaj internaciaj faroj, ili pretendas levi la moralon de siaj ellaciĝintaj bandoj pro tiom da malsukcesoj dum malmulte da tempo.

Dume, la proleta armeo malŝatante tiom da intrigo, daŭrigas donante baton post baton al la malamiko kaj venkege antaŭeniras tra kastiljaj teroj al Segovia.

Niaj soldatoj troviĝas nur je kvin kilometroj de la historia urbo. De antaŭ malmultaj tagoj ĝis nun niaj fortoj konkeris al la malamiko en tiu grava sektoro pli ol kvardek kilometroj, sen ke la ekipoj de aviadiloj, alportitaj el aliaj partoj de la ribeluloj, povis eviti tion.

#### LA LASTA KRIMO DE LA FAŜISTA AVIACIO KONTRAŬ BARCELONO.

Kvankam la faŝista aviacio kutimigis nin al la plej teruraj fiagoj kaj al la plej abomenaj krimoj, ni devas konstati, ke la faro de la sabato 28a de Majo surpaŝas ĉiujn krimojn kaj lasas nin sen vortoj adekvataj al ĝia grandeco. Kvankam ili diskonigis la uzon de revenĝoj neniu povis atendi la sadismon supozantan la faron de tiu tago.

Superflugi grandan urbon, kiu troviĝas malproksime de la fajro-linio, kiam la sendefendaj urbanoj troviĝas ripozantaj pro la laĉiĝo de la taglaboro; ili blinde semas la bombojn kvazaŭ ili semus grejnon, sur kampo, okazigas la morton, sen atendi, ke post la surprizo, la urbanoj povu organizi tion plej elementare el la antaŭzorgoj; forkuri sen atendi batalon tuj post la sono de la kanono de la urbbaterioj aŭ leviĝu aviadilo de la plej proksima aviacikampo; ĉio, tio konstituas skalon da malkuraĝo, aron da krimoj, turmentmalŝparemon, kiuj malkovras krimulan animon, sangosoifantan, pro la praktikado de krimo.

La bomboj ĵetitaj sur la urbon Barcelona estis multaj dekduoj, tiom, kiom povas porti sep trimotoroj "Junkers" devenantaj de Palma de Mallorca.

Se tiuj sep trimotoroj ŝargitaj da bomboj estus sin direktintaj kontraŭ la strategiaj lokoj, atakante kaj sin defendante, pro la respondo, kiun ili povus esti ricevintaj, eble ni estus konsentintaj al ili militan rajton, sed la okupantoj de tiuj sep "Junkers" ne agis kiel soldatoj.



Nº. 16.

Ili blinde eniris tra la Oriento de la urbo kaj eliris tra la Okcidento semante la bombojn senrimarke, sen esti grava por ili la loko kie la bomboj faladis. Tiel la mortintoj estis pli ol cento. Multe pli estis la vunditoj, la kontuzitoj, kaj la akcidentitoj.

Inter tiuj mortintoj kaj vunditoj estas el ĉio: Viroj kaj virinoj, infanoj kaj maljunuloj. Sed ne estas soldatoj nek milicianoj, evidenta pruvo, ke la bombojn estis ĵetitaj sur la kvartalojn de la urbo kaj ne sur la lokojn, kie estus armitaj viroj, kiuj povus esti respondintaj per siaj kanonoj



Ĉu vi bezonas pli da pruvoj por diri al mi, ke mi estas krimulo?

aviacio.

Tiu-ĉi morala sankcio kaj la materia helpo, kiu estas ĝia natura konsekvenco konsolas nin, la hispanoj-viktimoj de la malkuraĝaj atakoj, kaj samtempe kuraĝigas nin por daŭrigi nian lukton por la libereco de Hispanio, kiu ankaŭ estas la lukto por la libereco de ĉiuj popoloj.

aŭ per siaj fusiloj. Estas malplaĉa memori la kolonojn de la urbĵurnaloj, kiuj rakontas sur kiuj lokoj la bomboj falis kaj personoj falis mortintaj aŭ vunditaj pro la faŝista mitraĵlo torento falinta. Tiamaniere la super kiuj ne flugos la faŝistaj flugmaŝinoj estas la Kastelo de Montjuic, la lokoj kie estas baterioj, kaj ankaŭ la domoj, kiuj taŭgas kiel kazernoj....

La popolaj kvartaloj, la stratetoj de la malnova parto de la urbo, kie la loĝantoj estas ege grupigitaj, la modernaj stratoj, la kvartaloj de malkaraj domoj, tiuj jes, ili estas certa paŝcelo de la krudelaj kaj malkuraĝaj aviadistoj.

Sed ĉia krimo havas sian punon. En landoj el la civilizita mondo oni perceptas la signalojn montrantajn, ke la homoj havantaj konsciencan bone rimarkis la sencon havantan la hispana milito.

Kaj la ĉiuta mondo energie devas kontraŭigi la krimojn faritajn sendaŭgure de la faŝista

### LA MORTO DE LA PERFIDULO MOLA.

Kiam tempesto nuligis la faman militŝiparon "Invencible" (Nevenkebla), kiun Felipe la II<sup>a</sup> igis pretigi en la naciaj ŝipkonstruejoj, la fanatika kaj melankolia reĝo diris: "Mi sendis ĝin batali kontraŭ la angloj, ne kontraŭ la metereologiaj elementoj".

Franco, sciinta pri la morto de la generalo Mola, estus diranta: "Mi sendis la generalon krimulan por platigi Bilbao'n, ne por venki la fizikajn elementojn".



Sed la fakto estas, ke la generalo, kiu revis lasi nenion starantan en Bilbao, dank'al la flugmaŝinoj, kiujn Germanujo kaj Italujo metis je lia dispono, falis pro aviaci-akcidento, dum esplorflugado eble preparante unu el tiuj bombaradoj, kiuj transformis la nordon je vasta serio da ruinoj. Oni ripetigis la malnova hispana proverbo "Kiu per fero mortigas, tiu per fero mortas". Ĉi-tiun fojon, la naturaj elementoj estas realigintaj riparverkon.

Unue falis Sanjurjo bruligita inter la flamoj de aviadilo; nun estis Mola, kiu falis. Ni la katalunoj diras: "Ne estas du sen tri". Kompreneble, ke tio estus kredi al supertiĉo, sed estas espereble, estas eble, ke la fakto okazu. Nu; ni ne konfidu al la elementoj nek al hazardo por fini la militistajn faŝistajn bandojn, tute male, samkiel la angloj, kiuj ne konfidis nur al la kaprica helpo de la elementoj por findetruki la ŝiparon de Felipe la IIa atakante la difektitajn ŝipojn, ni arde devas ankaŭ ataki kontraŭ la malamiko, por ke pro la malvenkoj ili konvinkigu pri la fakto, ke la popolo ne lasas forrabi siajn konkerojn, kiuj kostis al ĝi tiom da sango kaj ofero.

Guste, Franco perdis persistan kaj inteligentan kunlaboranton; eble tiu plej bona el siaj bandoj: kruela, aroganta kaj, ĉefe, absoluta malamiko de la Respubliko, sen ia ajn dubo Mola estis la dekstra brako de la aspiranto al diktatoro, kaj estas nenecese diri, kiel tion bedaŭras la generalo "drinkemulo".

Ni opinias, ke tiu estas unu el la plej oportunaj okazoj por entuziasmigi la heroan rezistadon de la baskoj, kaj samtempe liveri al ili nian laŭpovan helpon por ke ne malpligrandiĝu ilia pruvita persistemo, kiel ankaŭ ne malpligrandiĝis tiu de Madrid nuligante ĉiujn triumfeserojn pri kiuj revis la faŝistoj helpataj de siaj eksterlandaj kunlaborantoj.

KION FARAS KAJ KION FARIS LA PROPAGANDA KOMISAREJO DE LA GENERALITAT DE KATALUNUJO.

INTERVJUO KUN JAUME MIRAVITLLES, KOMISARO DE PROPAGANDO,

Jaume Miravittles, konata Komisararo de la Propagando de Generalitat de Katalunujo rakontis al korespondanto de "Molodoj Bolŝevik" de Omsk (U.S.S.R.) interesajn informojn pri la funkciado de la Komisararo de Propagando en Barcelona.

En la politika kadro de Katalunujo la nomo de Jaume Miravittles havas grandan prestiĝon kaj eĉon de unuanimaj fervoroj. En ĉiuj politikaj kaj sociaj sektoroj oni estimas lian grandan kapablecon por iniciativo kaj laboro, lian entuziasmon, lian inteligentecon. Li estras la Propagandan Komisararon de la Generalitat. Kaj li realigadas ekde tiu posteno vere admirindan laboron. Laboron tre vastan, modernan, tre bone direktitan, kun celoj konkretaj kaj efikaj, adresitaj al rondo en kiuj tre interesas ĉi tiu propagando.

Estas ĉies rekonite, ke unu el la faktoroj en tiu ĉi batalo kontribuintaj plej potence hardigi la popolan spiriton donante al ĝi impeton kaj firmecon, estas tiu de la Propagando, disvolvita kun la fervoro kaj la entuziasmo, la pasio kaj la vibrado, kiujn la horo postulis. Kiam iam serene, povos esti skribata la historio de la batalo - jam kun perspektivo de tempo - oni devos dediĉi la ĉapitron de tiu ĉi tuta propaganda laboro - afiŝo broŝuro, gazeto, fotografaĵo, kiun en la milito oni faradas senlace. Nur tial oni povas plene kompreni la medion streĉan, hardan - de ĉi tiu horo de Hispanujo.

La Propaganda Komisararo de la Generalitat, sub la inteligenta kaj sentema direktado de Jaume Miravittles, efektivegas en tiun direkton unu bonegan laboron. Grandparte tiu propagando estas adresata al eksterlando serĉante koraajn rezonojn por la hispana afero. Akorde kun tiu sento la Komisararo havas siajn delegaciojn establitajn en Parizo, Londono, Bruselo, Stockholmo kaj



Nº. 16.

kaj baldaŭ starigos unu en Praha kaj Nov Jorko. Propogando kaj multobla. Ekde la sobra afiŝo vibranta, kiu klopodas deteni la atenton de la homo sur la strato, ĝis la broŝuroj en diversaj lingvoj, celanta veki eĥon en malproksimaj medioj. Ekde la informa bulteno ĝis la dokumenta filmo. Ekde la publika festo ĝis la ekspozicio kun la primitivaj temoj. Kaj ĉio ĉi kun rigora sento de arto, de estetika digno, kiu donas tie ĉi majestan rangon al ĉi tiu laboro, kiun la Propoganda Komisarejo realigadas.

Ciutage estas eldonata, en diversaj lingvoj, bulteno informa kaj komentaria pri temoj de milito kaj ariergardo. Tiu bulteno estas sendita ĉefe al eksterlando. Ĉiusemajne proksimume, oni eldonas la fotografan serion, dokumentan pri la doloro kaj la krueleco de la milito, dramaj bildoj pri la horoj, kie Hispanujo nun vivas. Tiuj grafikaj kolektoj estas destenitaj ankaŭ ĉefe al eksterlando.

Eldono de la Komisarejo estas ankaŭ la gazeto "Nova Iberia", de kiu oni publikigis ĝis nun kvar numerojn. Ĝi estas difinita antaŭ ĉio por kolekti la profundan transformadon, kiun la milito impresas sur Katalunujon en la diversaj aspektoj de ĝia kultura kaj socia organizo. En Hispanujo ne nur disvolviĝas unu milito. Profunda renovigo skuas ĉiujn fibrojn de la socia vivo, kaj tiu forta pulso de la ariergardo, tiu sopiro produktema kaj kreanta, estas tio, kio inspiras la paĝojn de "Nova Iberia". Per tiu revuo oni povas koni, ekzemple, ion el la milito, kiun Katalunujo faris en la sektoro de la socia helpo.

Alia publikaĵo de la Propoganda Komisarejo estas tiu dediĉita al Madrido pro ĝia bonekzempla defendo: cent paĝojn kun teksto kaj fotografaĵoj de granda dokumenta valoro kaj esprimkapabla. Du partojn entenas la volumo: unu estas tiu destinita al la kontraŭstaro kaj doloro de Madrido, alia pri la helpo, kiun Barcelono havigas, sub la diversaj aspektoj, al tiu Madrida defendo.

Estis eldonita granda kolekto de afiŝoj, kun desegnaĵoj kaj fotoj. Kaj estas starigita unu fako de fotografio. Kaj alia de kinomatografio. Temoj el la fronto kaj el la ariergardo estis transformitaj en filmojn de alta propagandvaloro.

Laboro de la Komisarejo estas la organizado de festoj kaj publikaj kunvenoj, en kiuj oni manifestas la signifon de la batalo. Ankaŭ estas ĝia kreaĵo la "Casal de Cultura" (Domo de la Kulturo). Kaj ekspozicio "Sep Monatojn de la Milito", antaŭ nelonge inaŭgurita en Barcelono. (Oni volas transporti tiun ekspozicion al Madrido por ke ĝi povu esti ĝi granda populara sukceso).

Tiu estas skeme la laboro realigita de la Propaganda Komisarejo, sub la inteligenta direktado de Jaume Miravittles. Inter la laboro, ekzistas ankoraŭ projekto de Ekspozicio de la Militindustrioj. Kiel oni scias, en Katalunujo ne estis militindustrioj. Nun pro la postulo de la milito ili estis kreitaj. Unuj estas por tiel diri, nova establaĵo. Aliaj estas produkto de la transformo kaj adepto de civilaj industrioj jam ekzistantaj. En Katalunujo oni faras nun kuglojn, aviadbombojn, mitralpafaĵojn.... Tio ĉio emas kontentigi tiun fundamentan aspekton de la militbezonoj. Ĉion oni projektas kaj direktas al la servo por la lukto. (Pitoreska ekzemplo: fabriko, kiu antaŭe faris tiujn malgrandajn metalajn tubojn por la karmino, faras nun tubetojn por la kugloj....) Ĉion ĉi portos grafike, okulfrape, al tiu preparata ekspozicio, sintezo de la militindustrioj. (Ĉion kompreneble, kion oni povos porti, ekzistantaj aferoj kaj aspektoj, kiujn la prudento konsilos kaŝgardi). La ekspozicio estos granda elmonro de tio, kion la milito postulis de la ariergardo sen kiu la avangardo ne povus ekzisti. Kaj ĝi estos la plua signo de la trafeco kun kiu la Propaganda Komisarejo efektevigus sian taskon.

Tion ĉion rakontis al mi Jaume Miravittles dum mia intervjuo rilate la laboron kaj la signifon de la Komisarejo de Propagando. Sidante apud la ĝenerale konata kaj amata Komisararo, mi povis sperti pri kia psikologia kaj teoria konoj la Kataluna Komisararo de Propagando. Propagando estas nova tereno, nova objekto, sen kiu en la moderna mondo oni ne povas akiri la modernajn aĵojn. Propagando estas potenco, kiun ni nepre devas uzi en nia batalo kont-



raŭ la faŝismo.

Kiuj aĵoj estas plej efikaj en propagando mi demandis al li?

Mi spertis respondis la Komisararo, ke ĝis nun ni akiris plej grandan sukceson pereniaj bultenoj, kiuj konstante bombardas la poŝtkestojn de ĉiuj redakcioj en la mondo, esceptante la faŝistajn landojn, kreante por ni la fervoran apogon kaj ankaŭ la kinejo. Ni havas ankaŭ la proprajn filmojn kun propraj laboristoj kaj produktas nian propran filmon "España al Día" (Hispanujo de Hodiaŭ), kiu estas preskaŭ en ĉiuj kinejoj el mondo prezentataj. El diversaj flankoj ni ricevas konstante atestojn de rekono.

El kiuj landoj vi ricevas la plej grandan apogon?

"Estas malfacile difini tion, ĉar ni ricevas moralan kaj materialan helpon ne nur el la demokrataj landoj, sed ankaŭ el la faŝistaj landoj. El Germanujo, Italujo, Portugalujo kaj eĉ el la malproksima Japanujo ni ricevas regule monsumojn. Sed tamen kronologie staras: Usono, Francujo, poste Belgujo, Anglujo, Svedujo, Norvegujo, Nederlando kaj kompreneble Sovet - Unio, sen kies helpo ni ne estos en stato gajni la militon!".

Cu post la fino de la milito la Komisararo de la Propagando daŭrigos sian agadon?

"Kompreneble. nun ni dediĉas ĉion al la milito kaj post la milito estos necese dediĉi ĉion al novaj akiroj de nia organizado rilate la nian ekonomian kaj socialan ordon".

"Nia tasko kaj nia laboro estas preskaŭ plenumo de misio por nia popolo. En jaro 1873 komencis jam la revolucia konvulsio de nia popolo kontraŭ la feŭdalisma, ekspluato kaj subpremo. La liberiga lukto de nia popolo kontraŭ la subpremantoj trairis jam diversajn sangajn periodojn, de jaro 1873, 1902, 1907, 1909, 1917, 1929, 1931, 1934 ĝis jaro 1936. Tiuj ciferoj montras, ke nia popolo povas persisti kaj venki. Nia tasko estas ĉiam rehabiliti kaj diskonigi la veron pri ĝia batalo por libereco kaj demokratio. La nova registaro ĵus starigita estas la elmonro, ke nia popolo deziras nek registaron anarĥistan, nek alian, sed nur veran demokratian decan por ĝia revolucia kaj libereca historio."

Cu vi estas kontenta pri la rezultoj akiritaj dum la funkciado de la Komisararo de Propagando?

"Jes, mi estas tre kontenta. La bonan rezultaton mi devas unue danki al bona organizo de nia entrepreno. Ĉiu regiono posedas sian propran Komisararon de Propagando: Aragono, Basklando, Valencio kaj Barcelono. Inter ĉiuj ekzistas ideala kunlaboro kaj en ĉiuj troviĝas reciprokaj reprezentantoj de nomitaj propagandoj. Due la bona rezultato dependas de niaj kunlaborantoj, sen kies oferema kunlaboro la sukcesoj estiĝos nebla."

Multaj homoj atentantaj en antaŭĉambro kaj konstanta sonorigo de telefonoj ne permesis al mi plidaŭrigi nian interesan interparolon. Mi devis adiaŭi la Komisararon kaj doni la okazon al paciente atentanta interesagintaro en antaŭĉambro. Forlasante la Komisararon mi admiris kaj ekestimis la genian Komisararon kiu povas tiel perfekte movi la grandan propagandan meĥanisman.

#### EN LA SEP REKONKERITAJ VILAĜOJ.

Antaŭ kelkaj tagoj la respublikanaj trupoj okupis sep vilaĝojn en la fronto de Guadalajara. La raportisto de "Mundo Obrero" vizitis tiujn denove al la lojala teritorio apartenantaj vilaĝoj kaj rakontas pri ili la jenon!

- Kiam la italaj trupoj devis sin retiri al Brihuega, ili detruis nenur la tutan vojon de Cifuentes, sed ankaŭ el ĉiuj proksimaj lokoj kunprenis kun si ĉiujn urbestrojn kaj personojn de la maldekstra tendenco. Tiel restis la



vilaĝoj; Torrecuadradilla, Sacedorbo, Cauredondo ktp. sen estrado. Depost la foriro de italoj, komencis la patroloj de "reketes" (faŝistoj) kontroli la vilaĝojn, sen okupi ilin. Ili rekvizigis, gluis iajn afiŝojn kaj foriris. Sed nun niaj trupoj okupis tiujn vilaĝojn.

Cauredondo, estas malgranda vilaĝeto de 120 enloĝantoj. La plej granda parto de la Junularo servas en la vicoj de Popolarmeo. La enloĝantoj, kiuj postrestis, kaj tiuj kiuj vidis la faŝistojn veni kaj foriri, estas senfidaj. Ili scias nenion. Ili scias nur, ke la faŝistoj pagis por iliaj ovoĵoj po 10 cendimoj. Sed ni scias, ekzemple, ke la faŝistoj dum unu el iliaj vizitoj eniris en domon de Dro Martin; frato de unu socialista diputado kaj detruis ĉiujn liajn ĥirurgiajn instrumentojn, rompis la meblojn kaj ŝtelis liajn librojn kaj ludaĵojn de liaj infanoj. La najbaroj timas paroli pri tio.

Sacedorbo, estas jam iom pli grava. Ankaŭ ĉi tie venis faŝistoj ĉiutage. Plej ofte ĝi estis la kavalerio de "reketes", kiu vizitis la vilaĝon kaj deŝiris la plakatojn gluintajn de "falangistoj", sur kiuj ili gluis tiujn de "reketes". Kiam venis "falangistoj", ili faris la kontraŭon. Ili prenis kun si ovoĵojn, tritikon kaj lanon... La enloĝantoj kiuj ne levigis la manon por la faŝista saluto estis minacitaj per sabro. La mulejisto, kiu foje servis al la respublikanaj trupoj kiel gvidisto estis de faŝistoj mortigita. La sama okazis al la kafejisto Bartolomeo Andres, kiu ne vizitis la meson kaj ne fermis lian kafejon dum la Dioservo. Lia vidvino ploras hodiaŭ ĉe la enirejo de kafejo, kaj lia patrino kiel statuo sidas senmove turnita siajn okulojn al muro. La vilaĝanoj estis mirigitaj, kiam niaj soldatoj pagis por la ovoĵoj po 25 cendimoj. Ili prenas la monon kaj ĵetas ĝin teren por aŭskulti la sonon. Nur pri la papermono ili ankoraŭ ne konfidas. Ili diras, ke tiu mono estas alia ol tiu de "aliaj-tien". Tiuj "tien" estas la faŝistoj de Abanadaz kaj aliaj lokoj.

Kiam en Julio la pasintan jaron venis ĉi tien la soldatoj de la popolo, ili lasis ĉion ne tuŝite. Ili postlasis nur malgrandan gardon. Poste venis la italoj kaj la faŝistaj rajdantoj, kaj ili portis kun si ĉion eblan. Kiam niaj soldatoj revenis ili trovas nur malĝojon kaj doloron. Samtempe kun tiuj vilaĝoj estas ankaŭ kelkaj gravaj strategiaj pozicioj okupitaj en la proksimaj montoj. De preĝejoj kaj estradomoj estis forigitaj la monarĥistaj flagoj kaj la respublikana trikolora flago levigita. En la stratoj la infanoj salutis niajn soldatojn kun pugnigitaj manoj. Kaj baldaŭ la tuta provinco Guadalupe kuŝos malantaŭ nia linio.

#### HISPANA PUBLIKA OPINIO PRI LA KUNVENO DE LIGO DE NACIOJ.

Oni ne povas diri, ke la Hispana publika opinio, pri la sinteno de neintervena komitato estis tiel seniluzigita, kiel pri la lasta kunveno de la Ligo de Nacioj, kiu devis pritrakti la eksterlandan intervenon en Hispanujo. Hispanujo apogas sin pli multe je siaj armeoj kaj ĝia militemo, ol je ĉiuj intertraktadoj kaj volas konduki sian taskon ĝis la fino; rapide liberigi Hispanujon el siaj internaj kaj eksteraj malamikoj kaj konstrui la novan socion, sur kies ripozas la societo de morgaŭ. Krome estis Hispanujo skandalmaniere trompita de Genava Instituto kaj ne posedas plu la fidon en ĝiaj agadrimedoj.

Spite, tiuj ambaŭ gravaj kondiĉoj priskribas la ĵurnaloj, kiuj reprezentas la publikan opinionon, kun la certa nerimarkebla rezervo la Genevan kunsidon.

- Unue la "Blanka Libro" en la posedo de la Hispana delegacio en Genevo, kiu estas de la hispana gazetaro rigardata kiel kolekto de pruvoj pri la ek-



sterlanda interveno en Hispanujo. Iki havis ĉi tie la opinion, ke la ligitaj statoj estus devigataj, repreni la respondecon, se Del Vajo montros al ili tiujn dokumentojn. Alieflanke ekzistas opinio, ke Francujo kaj Anglujo ne povus rifuzi agi, ĉar alie la milito en Hispanujo disvastiĝus en la milito Europa.

Ĉi tie oni estis ĝenerale de la opinio, ke la demando pri la libervoluloj estas duonsignifa, ĉar en la realeco ili ne estas libervoluloj, sed regulaj italaj trupoj. Tiel skribis "El Marcantil Valenciano", la organo de la Respublikana Unio, la dekstra flanko de la Popolfronto: "Diskuti pri la retiro de la libervoluloj signifas, ne voli la retiron kaj labori por la invad-milito". La ĵurnalo substrekas, ke la ĉeesto de germanaj kaj italaj trupoj signifas la duobla rompo de pakto de la Ligo de Nacioj kaj de la neinterveninterkonsento. La titola frazo de la koncerna ekzemplero esprimas pri la demando de eksterlanda interveno animstato de la tuta hispana popolo; "Se la pakto de la Ligo de Nacioj estos kondamnita, tiam la hispana popolo estas kun siaj malamikoj baldaŭ preta".

Kio rilatas la peradon, kio estas tiom multe en eksterlando priparolata, oni havas ĉi tie ĝenerale egalan opinion. Oni devas rememori pri la deklaro de la ministro - prezidanto Negrin, ke la perado de laŭleĝa hispana registaro neniam estos akceptita. Se la registaroj kiuj apogas la peradon, ofte pri tiu parolas, nur ofendas la hispanan naciofieron. Laŭ propono de Eden pri la interpaco, kiu donos la okazon por retiri la libervolulojn skribas "Frente Rojo", organo de la Komunista Partio Hispana; "La rompo de operacioj en la frontoj, por retiri la libervolulojn estos egale al organizado de la perado.

#### LA INTERNACIA KONFERENCO DE PARIS «ESPERANTO EN MODERNA VIVO»

Comissariat de Propaganda esprimas sian kontenton pro la bona akcepto farita al la kataluna delegacio, kiu partoprenis la Konferencon por unufoje pli aŭdigi la voĉon de popolo batalanta por plej bona Homaro, samkiel pro la bonaj konkludoj aprobitaj en ĝi kaj ankaŭ pro la saluttelegramo, kiun ĝi sendis al la Kataluna Registaro.

Comissariat de Propaganda esprimas ankaŭ samtempe sian plej sinceran dankon al la Laborista Esperanto Grupo de Paris pro la vespero de ĝi organizita por honori nian delegacion, en kies vespero partoprenis multaj delegitoj de aliaj landoj. Ankaŭ partoprenis k-do. Barthelmes, kiel reprezentanto de S.A.T., reprezentantoj de I.P.E. kaj ceteraj kamaradoj el aliaj esperanto-organizoj.

La vespero estis vera pruvo de simpatio por la afero, kiun defendas la hispana popolo. Niaj delegitoj atente respondis al la demandoj de la ĝeĉeestantoj, kiuj deziris informiĝi pri la stato de hispana problemo.

Laŭ peto de litova esperantisto, oni estis unu minuto silenta por honori la esperantistojn mortigitajn de la faŝistaj hordoj de Franco. Je la fino de tiu interfratiga vespero la k-do. organizintoj faris monkollekton por la viktimoj de faŝismo, kiun oni donis al nia delegacio por ĝia celutiligo.

Comissariat de Propaganda sincere dankas la organizintojn, partoprenintojn kaj ĝeĉeestintojn al tiu porhispana vespero petante samtempe ilian senĉesan kunlaboradon por la celo, kiun ni defendas, por la Libereco, por Esperanto!





# GENERALITAT DE CATALUNYA

PRESIDÈNCIA

COMISSARIAT DE PROPAGANDA

Avinguda 14 d'Abril, 442 bis

BARCELONA

Telefòn 82215

## COMUNICAT DE PREMSA

ESPERANTO ELDONO.

N<sup>o</sup>. 17.

Barcelona, 12/VI, 1937.

### LA ITALA INTERVENO KAJ LA BLANKA LIBRO.



La Blanka Libro prezentita de Alvarez del Vajo en Genevo, estas akuzaro skribita de la kulpuloj mem. La akuzisto havas nenian specialan parton en sia akto de akuzado.

Inter la dokumentoj entenataj en la libro, ĉiuj egale premantaj, iuj interesas nin speciale, ĉar ili estas la oficiala kompletigo de la neoficialaj dokumentoj, kiujn ni ĉi tie mem publikigis, pri la morala stato de italaj trupoj. Ni diris, ke la dungitaj soldatoj estis malfeliĉuloj varbitaj per mensogoj kaj puŝitaj al tio pro la mizero. La granda deziro de tiuj soldatoj estas nur savi sian haŭton, enspezi sian pagon, kaj fini kiel eble plej baldaŭ kun la milito, kaj ĝi ne estas realigi brilajn farojn, estante por ili, en tiu okazo, venko aŭ malvenko absolute egalaj.

Ni diris ankaŭ, ke la silenta malvenkismo entenata en la korespondado de la

soldatoj perfidis la severan cenzuron; sen ĝi la malkuraĝigo kaj la laceco esprimus sin plej malkaŝe. Unu dokumento el la Blanka Libro (XXIV, paĝo 79) certigas nin en tiu opinio:

"Ekzistas multaj, kiuj kredante, ke la korespondataj iras al Italujo sen submeto al la cenzuro, demandas al siaj familioj "sen kaŝmalico" (sic), detalajn novaĵojn pri tio okazanta en Italujo. Aliaj, kontraŭe, rekomendas, ke oni ne pritraktu politikajn aŭ delikatajn aferojn, por iviti, ke la leteroj "estu haltigitaj de la cenzuro"... En la civilajn leterkestojn (hispanajn) oni ĵetas leterojn enhavantajn la neeviteblajn kritikojn kaj la kutimajn plendojn. Kaj ĉar tiuj leteroj pasas tra la cenzuro de la militaj hispanaj aŭtoritatoj, ili povus okazigi malbonajn kaj falsajn interpretadojn pri la karaktero kaj la disciplino de la itala legionaro. Estus konvene malaperigi tiel baldaŭ, kiel eble tiajn malhelpaĵojn.

La oficejestro de la servoj de la miksa milico itala - hispana;

subskribis:

G. Modiani."



Nº. 17.

„MALBONAJ KAJ FALSAJ INTERPRETADOJ PRI LA KARAKTERO KAJ LA DISCIPLINO DE LA ITALA LEGIONARO“ - (ni vidu! ĉar en la dokumento XXXIX de la paĝo 125 de la Blanka Libro, urĝas organizi perfektan servon de spionado por malkovri la rezistantojn:

IIa Brigado de Libervoluloj „NIGRAJ FLAMOJ“  
ĈEFA STABO

Burgo de Osma, 11- 2 - 37. (XV)

N. 2 A/III

PRIO: Politika servo.

Al la komandantoj de la grupoj de unuoj VI, VII, VIII, IX.

Estas necese starigi la politikan servon por ĉiuj grupoj da unuoj.

Oni devos dediĉi al tiu servo elektitan personaron, kiun neniu konu, absolute fidinda, tre rezervema.

Funkcioj: privigli, aŭskulti, observi ĉiun individuon kaj ĉion raportu. MI havas motivojn por kredi, ke ekzistas en la regiono ribelemaj ĉeloj kaj provokemaj agentoj komisiitaj fari malkuraĝigan propagandon inter la trupoj.

Estas necese vigli por scii ĉion, kion pensas la milituloj kaj la civiluloj.

Por tiu la dirita personaro devos ĉeesti la kantinojn, pensionojn, trinkejojn, kunvenojn, aŭskulti kion oni diras tie, k.t.p..

Ĉiu komandanto de grupo organizos, kiel li kredos pli konvene, tiun servon, maniere koni ĉiam la pulson de siaj homoj kaj la temperaturon de la loka medio.

Estas necese ne lasi surprizi sin de la malamiko nek de la okazintaĵoj.

Oni bonvolu sendi al mi privatan kaj konfidecian raporton, la 15an kaj la 30an tagon ĉiumonate pri la novaĵoj kolektitaj en tiu senco.

La Generalo ĉefkomandanto de la Brigado,

subskribis: A. G. Coppi.

.....  
La moralo de la trupoj devis esti impresita de la subgato de tiuj „ribelemaj ĉeloj“, kiel atestas alia dokumento konfesanta la laŭvolajn kripligojn, la maskitajn forkurojn kaj aliajn trompojn por apartiĝi el la buĉejo  
.....

Komando de Libervolaj Trupoj  
La Generalo ĉefkomandanto.

Arcos, 16 de Marto 1937. - XV -

Al ĉiuj Unuoj !

(Ĝis al la ĉefoj de batalionoj aŭ de grupoj, rotoj aŭ aŭtonomaj unuoj).

-Eĉ inter la amasoj plej bonaj kaj plej bonaj kaj plej kuraĝaj, ekzistas malkuraĝuloj.

-Io ni ne devas surpriziĝi se tiaj ekzistas ankaŭ inter ni; sed ni liberigus je ili.

I - Oni evidante konstatis, kazojn de laŭvola kripligo.

II - Oni konstatis, ke homoj surhavantaj banĉaĝojn havis absolute nenian



vundon.

III - Oni konstatis, ke aŭtektikaj vunditoj estis akompanataj de individuoj neniel konsiitaj por tia tasko, kaj kiuj laŭ sia propra iniciato, profitis tiun okazon por forlasi la fajran linion.

MI ORDONAS:

- A - KE TIU, IGINTA KULPA JE LA ANTAŬE DIRITAJ AĴOJ, ESTU TUJ PAFMORTIGITA! (5 homoj suferis jam de hieraŭ ĝis hodiaŭ tiun justan punon).
- B - La flegistoj urĝe avertos pri la okazoj de laŭvola kripligo kaj pri la suspektataj je tio.
- C - La komando de la reĝaj karabinistoj de la komando de la libervolulaj trupoj kaj la komandoj de divizio starigos observan servon kun tiu celo sur la interkomunikaj vojoj, en la sanigaj sekcioj, kampaj hospitaloj k.t.p.. La ambulancoj estos speciale observitaj.

La Divizio - Generalo Cefkomandanto

Mancini.

Revizita kopio  
La ĉefo de la Generala Stabo  
subskribis

Ferraris.

.....  
Nek la sistema spionado, nek la plej kruelaj punoj povis fini la staton de la aferoj. Ne temis nur pri la detruo de kelkaj "ribelemaj ĉeloj". La malbono estis pli profunda : Tio estas ke ĉiu soldato, pli malpli rezestemaj, estis funde tia ĉelo. Jen estas la interkompletigo pri la moralo de la trupoj kaj la rimedoj uzitaj por reformi ĝin.  
.....

#### LA KNABINOJ EL MADRIDO.

Antaŭ la revolucio, en Hispanujo estis malmultaj virinoj, kiuj kuraĝis ~~ĝin~~ malkaŝe defendi siajn idealojn. Sed tuj post la faŝista ribelo, iris ankaŭ la virinoj sur la stratoj por kune kun la viroj batali, ĉar ili komprenis, ke tiu batalo por libereco de la tuta hispana popolo signifas ankaŭ la liberigo de la virinoj. Multaj el ili tenis forte la pafilon en la manoj, diversaj prizorgis la maŝinpafilojn kaj aliaj mirinde batalis en la unthaj linioj en la frontoj. Sed la disvolvo de la milĵto baldaŭ montris, ke ne tien estas ilia loko. Iom post ion ili okupis efektivajn postenojn por labori por la venko. Same kiel per armita batalo, kiel per paca influo, al kio ili kapablis per sia kunsento, ilia koreco kaj ofereco, la virinoj el Madrido montris sian gravan rolon en tiu nacia sendependebatalo.

Antaŭ ne longe okazis en Madrido la konferenco de Madridaj knabinoj, kie la reprezentantinoj de virina junularo esploris sian kontribuon en la venko super la faŝismo.

Carmen Arrojo, kiu parolis en la nomo de studanta virina junularo deklaris; ke ĝi alprenis la akordeĝeman taskon, unuigi la junularon kaj plialtigi ĝian kulturen nivelon.

Antonia Sanchez, la sekretairino de la virina Socialista Unuiginta Junularo en Madrido rememoris, kun kia memofereco la junaj virinoj de Madrido laboris por ekipi la batalantojn kun ĉiu necesa. Ili kreis la klubhejmon por la virinoj, kie ili laboris kie ili laboras por ilia sekvanta eduko. Ili volas en ĉiu urbkvartalo malfermi tiajn virinajn klubojn, kie ĉiuj sen escepte de ilia partia konvinko aŭ percepto komune povos labori. Ili laboras por likvidi la analfabetismon, unu el la hontmakuloj de la malnova Hispanujo.



Nº. 17.

Samtempe estus al ĉiuj donante la metioeduko, kiu ebligos al ĉiuj virinoj plenumi siajn funkciojn. La sindikatoj kaj la Registaro forte apogas niajn klopodojn kaj la ĝisnunaj rezultatoj estis tiel bonaj, ke inter la knabinoj troviĝas jam veraj "Staĥanovistinoj".... Tio ne estas ĉio kio n la knabinoj el Madrido akiris. Ili kreis la infanhejmoj, ĉar la gepatroj mortis aŭ troviĝas en la fronto, estis multaj infanoj senhejmaj kaj forlasitaj. Antonia Sanĉez diris analoge, ke ĉiuj en la ariergardo kaj precipe la knabinoj devas dum sia laboro senĉese havi antaŭ siaj okuloj tiujn, kiuj batalas en la fronto, kaj malpezigi ilian suferon, pro tio estas necese duobligi la unuavicibrigadojn.

La juna kamparanistino el Ĉinĉon rakontis, ke ŝi kun siaj kamaradinoj kudris la vestaĵojn por la soldatoj kaj formis la unuavicibrigadojn por kolekti la rikolton. Rezentantinoj rakontis pri realigo de iliaj projektoj. Unu knabino el Guadalajara rakontis pri la granda batalo, kiu ebligis la liberigon de la loĝantaro kaj pri la kuraĝa sinteno de la knabinoj kontraŭ la italaj trupoj. Ĉie la Junularo montris esti valora grandan laŭdon. La Ministrejo de Milito demandis ĉu estas eble, en mallonga tempdaŭro konstrui unu milionon da provizoraj bandaĝoj. Dank al la penoj de la unuavicibrigadinoj estis tiu demando plenumita.

Marcelina, de la sanitara sekcio raportis pri sia tasko; unu hospitalo estis kreita, de kiu la tuta personaro teknika kiel helppersonaro konsistas nur de knabinoj. Dum unu semajno la sanitara sekcio de Socialista Unuiĝinta Junularo en Madrido injektis ĉiujn siajn membrojn el sia urbo.

Tiel havis ĉiu por reporti pri sia kampo kaj laborloko. Sen ilia diligenta kaj valora kunlaboro, nekalkulante la vivdangeron, kiu ilin ĉie minacas, estas la venko super la faŝismo nebla. Ilia oferema laboro neniam estos forgesita.

#### KION DIRAS BELGA DEPUTITO.

La belga deputito Max Buset, kiu sinsekve vizitis la havenojn de Cartagena, Alicante, Valencia kaj Barcelona diris pri la kontrolo de ne interveno, ke estas agentoj de la kontrolo, kiuj estas spionoj, piratoj kaj batalantoj.

" La kontrolo ĉe la respublikanaj havenoj - li diras - estas farita tre severe; sed la germanaj kaj italaj ŝipoj faras ion pli ol kontroli. Anstataŭ efektivi la gardoservon je distanco de dek mejloj de la marbordo troviĝanta sub ilia gardo, ili ĝenerale situas sin je tri mejloj kaj eĉ ili iras ĝis la rodoj.

Ĉe la promontorio Bagur, unu submareno de la itala kontrolo metis kelkajn minojn (eksplozaĵojn) la 22-an de Aprilo. Ĉe Alicante, la oficiroj de submareno faris fotojn pri la diversaj instalaĵoj de la haveno kaj, en Valencia, kie oni estis havigintaj al la kontrolantoj diversajn landkartojn pri la elŝipiĝlokoj, ili profitis tiujn planojn por viziti ĉiujn haveninstalaĵojn, rigardegi ĉiujn militistajn lokojn de la urbo kaj fari ĉiujn fotojn, kiuj estis eblaj. Antaŭ nelonge estis necese aresti la germanan kontrolagenton Johannes Lemmerzahi, ĉar en kafĉinkejo li dediĉadis sin paroli kun granda provokmaniero. Ĉe Cartagena, ĉiuj respublikanaj militŝipoj estas senĉese spionataj de la malamika kontrolo. Germana krosŝipo, kelkfoje la "Leipzig", alifoje la "Nuremberg" aŭ la "Sinden" - restas kontraŭ la haveno, je tri mejloj da distanco, kaj iliaj hidroaviadiloj ofte flugas laŭ la alteco plej konvena al ili, por fari fotojn pri la haveno, pri la rodo aŭ pri la apudmara zono. Ĉiufoje, kiun la ŝiparo eliras de la haveno ĝi estas sekvata de



No. 17.

germana militŝipo aŭ hidroaviadilo, kaj kiam la direkto povas esti jam konata, tiam de la spiona ŝipo eliras laŭŝlosile radiogramoj por la ribelinta ŝiparo.

La ŝarĝŝipoj, kiuj navigacias inter Cartagena kaj Almería preskaŭ ĉiam ili sin vidas inspektataj de la kontrolhidroaviadilo, kaj post kelke da tempo ili estas bombardataj de alia hidroaviadilo aŭ kaptitaj de ribelula krozŝipo. La 6an de Majo, estis torpedata tiamaniere la hispana ŝarĝ-kaj pasagerŝipo "Sister", kaj la sekvantan tagon, la hispana ŝarĝŝipo "Augusta", kiu eliris de Valencia al Barcelona, estis atakata de bombaraviadilo. La 10an de Majo, la dana ŝarĝŝipo "Hamick" estis kaptita kaj ŝtelita la terpomŝarĝo, kiun ĝi portis al Valencia, post esti inspektita de itala hidroaviadilo kaj kaptita de ribelinta krozŝipo, kiu kondukis ĝin al Ceuta.

La kaptaĵoj kaj bombaradoj, kiuj oni faris per tiamaniere valoras pli ol miliono da pesetoj,"

Max Buset denuncas ankaŭ, ke la germanaj kaj italaj ŝipoj de la kontrolo tute ne hezitas doni sian helpon al la ribelintaj ŝipoj dum iliaj militoperacioj.

Kaj laste, por se tio ne estus sufiĉe, estas la antaŭnelonga subakvigo de la pasagerŝipo "Ciudad de Barcelona" apud la katalunaj marbordoĵoj, kaj ankaŭ estas, la senhonta kaj grandega krimo pri la bela hispana urbo Almería sovaĝe bombardita de la "civilizita" Germanujo. Ni ne dubas pri la fakto, ke la tuta mondo scias la gravecon, kiun tio signifas, tamen la sinjoroj de la fama (?) kaj pompa Komitato de Neinterveno, agas kvazaŭ nenio grava okazis kaj krom tio, eble por premi la "herooĵojn" de la "bonkoruloj" Hitler kaj Mussolini, ĝi donis larĝajn garantiojn al la cititaj "kontrolantoj" por ke ili povu defendi sin kontraŭ la atakoj (?) de la "teruregaj" hispanaj respublikanoj.

Ni ne volas paroli pri la ekzisto de asocio nomata Ligo de Nacioj, kiu devas prizorgi siajn membrojn kvazaŭ bona patrino, nek fari debaton pri tiu nomata Komitato de Neinterveno, por ne ĝeni iun ajn senton, ni devas diri al la mondo, ke se la afero daŭrigas tiamaniere estos pruvita, ke la tuta mondo, for honestaj esceptoj, lasas sin porti de la plej granda farso kaj hipokrito, kiun registras Historio.

#### LA BATALO KONTRAŬFAŜISMO EN HISPANUJO ESTAS ESENCE TRANSFORMIGA.

Respondante al la demandaro, kiun antaŭe respondis la ceteraj eksministroj de Nacia Konfederacio de la Laboro (C.N.T.) Frederika Montseny diras, ke la kontraŭfaŝismo estas esence la defendo de la malnovaj liberalaj konceptoj.

En Hispanujo kontraŭfaŝismo signifas profundan submetigon de ĉiuj malnovaj socialaj valoroj kaj ankaŭ de la propraj demokratiaj formoj, kiujn minacas faŝismo. La batalo kontraŭ faŝismo en Hispanujo estas esence transformiga. La sendependo de Hispanlando estas la propra rajto de nia popolo memregi ĝian sorton kaj elekti la politikan, socialan kaj ekonomian reĝimon akorde kun la deziro de la plimulto, la okazinta mensa evoluo kaj la eblecoj de la momento.

Si laŭdis la konduton de Meksikio kaj Sovetio koncerne nian landon.

Pri la social-politik-trajektorio sekvata de Hispanio de kiam komenciĝis la faŝista ribeliĝo, ŝi kredas, ke sen esti farintaj multe da, sen esti farintaj ĉion, ni faris, kion ne faris ĉu popolo el la mondo dum dek monatoj de revolucio. La veraj bazoj de kontraŭfaŝista kunlaborado devas esti antaŭ ĉio la honesteco kaj la lojaleco, por ke neniu partio monopoligu ĉiujn risortojn kaj fortojn destinitajn al la morgaŭo por dispecigi la hodiaŭajn cirkontancajn kunlaborantojn.



LA VIKTIMOJ DE LA FAŝISTA BARBARECO EN BASKOLANDO.

Valencio. - La Ministrejo por Defendo publikigis liston pri la viktimoj okazigitaj en la civila enloĝantaro de Baskolando pro la bombardadoj de la faŝista aviadilaro dum la monato Aprilo.

Amorebieta, dum la tagoj 13<sup>a</sup>, 22<sup>a</sup>, 28<sup>a</sup> kaj 30<sup>a</sup>, 22 mortintoj kaj 34 vundito.

Abadiano,	"	22 <sup>a</sup> ,	"	"	4	"
Apatamonasterio,	"	22 <sup>a</sup> ,	"	"	4	"
Arbasegui,	"	26 <sup>a</sup> ,	"	30	12	"
Arrazúa,	"	26 <sup>a</sup> ,	"	1	2	"
Algorta,	"	24 <sup>a</sup> ,	"	1	"	"
Bilbao,	"	1 <sup>a</sup> , 6 <sup>a</sup> , 18 <sup>a</sup> , 22 <sup>a</sup> , 23 <sup>a</sup> , 29 <sup>a</sup> , 25 <sup>a</sup> ,	"	253	146	"
Baracaldó,	"	22 <sup>a</sup> , 23 <sup>a</sup> , 30 <sup>a</sup> ,	"	13	22	"
Durango,	"	24 <sup>a</sup> ,	"	2	6	"
Ceanuri,	"	2 <sup>a</sup> , 6 <sup>a</sup> ,	"	14	37	"
Ceberio,	"	29 <sup>a</sup> ,	"	1	4	"
Durango,	"	1 <sup>a</sup> , 2 <sup>a</sup> , 29 <sup>a</sup> , 31 <sup>a</sup> ,	"	193	84	"
Erandio,	"	22 <sup>a</sup> , 23 <sup>a</sup> , 24 <sup>a</sup> , 25 <sup>a</sup> , 26 <sup>a</sup> ,	"	29	36	"
Eibar,	"	24 <sup>a</sup> , 25 <sup>a</sup> ,	"	74	97	"
Elorrio,	"	22 <sup>a</sup> , 24 <sup>a</sup> , 25 <sup>a</sup> ,	"	24	28	"
Galdácano,	"	7 <sup>a</sup> , 27 <sup>a</sup> , 30 <sup>a</sup> ,	"	22	34	"
Guecho,	"	22 <sup>a</sup> , 24 <sup>a</sup> , 29 <sup>a</sup> , 30 <sup>a</sup> ,	"	5	16	"
Guernica,	"	26 <sup>a</sup> , 27 <sup>a</sup> ,	"	1.654	889	"
Gautequiz,	"	27 <sup>a</sup> ,	"	4	2	"
Lejona,	"	15 <sup>a</sup> , 24 <sup>a</sup> ,	"	11	10	"
Las Arenas,	"	24 <sup>a</sup> ,	"	9	18	"
Lamiaco,	"	7 <sup>a</sup> , 8 <sup>a</sup> , 22 <sup>a</sup> , 23 <sup>a</sup> , 24 <sup>a</sup> , 30 <sup>a</sup> ,	"	8	4	"
Larrabezúa,	"	29 <sup>a</sup> ,	"	3	2	"
Marquina,	"	28 <sup>a</sup> ,	"	7	12	"
Ochandiano,	"	1 <sup>a</sup> , 2 <sup>a</sup> ,	"	18	14	"
Portugalete,	"	29 <sup>a</sup> , 30 <sup>a</sup> ,	"	4	5	"
Rigoitia,	"	26 <sup>a</sup> ,	"	5	13	"
Sestao,	"	13 <sup>a</sup> , 15 <sup>a</sup> , 29 <sup>a</sup> ,	"	14	18	"
Santurce,	"	29 <sup>a</sup> ,	"	8	17	"
Zormoza,	"	23 <sup>a</sup> ,	"	12	26	"
Zarataín,	"	24 <sup>a</sup> , 25 <sup>a</sup> , 29 <sup>a</sup> ,	"	3	6	"
Zuazo,	"	25 <sup>a</sup> ,	"	1	3	"

Sume, la tuta kvanto da mortintoj el tiu listo estas: du mil kvarcent kvardek kvin, kaj tiu pri la vunditoj estas: mil sescent unu.

En tiu-ĉi rilato ne estas enkalkulitaj la viktimoj okazigitaj pro la bombardadoj de la tago 31<sup>a</sup> de Marto en Durango, kiuj estis proksimume kvincent dudek mortintoj kaj naŭcent kvindek vunditoj.

Entute la viktimoj okazigitaj pro la bombardado al sendefendaj vilaĝoj dum nur unu monato en Baskolando, sumas tri miloj da mortintoj kaj pli ol du mil kvincent vunditoj.



No. 17.

ALMERIA.

LA HISPANAJ INTELEKTEULOJ PROTESTAS.

(el "Het Volk")



La bombardado de Almeria kaŭzis la profundan indignon ĉe la tuta hispana popolo. La plej konataj viroj de arto kaj scienco turnis sin per manifesto al la Ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj kaj al ĉiuj kulturaj institucioj en la tuta mondo en kiu ili hontmarkis la sintenon de la faŝistaj ŝtatoj. Inter alie estas skribite:

"La longa vico de eksterordinaraj atakadoj, kiujn nia lando devis travivi, la faŝistaj ŝipoj komencis denove novajn krimojn. La bombardado de Almeria estas cinike preparita krimo. Tiun fojon bombardis la germanaj ŝipoj kun ventblovataj flagoj la sendefendan civitanaron, porke ĉiu sciiĝu pri ilia agado. Ni senpartiaj hispanaj verkistoj, artistoj, sciencistoj konfirmas:

La Hispana Respubliko neniam provokis iun militon kaj ankaŭ neniam provokos ĝin. Ni ne volas, ke la terura sorto de la hispana popolo transiru al aliaj popoloj, sed ni hontsignas antaŭ la tuta mondo, antaŭ ĉiuj niaj amikoj, la intelektuloj de aliaj landoj, la impertinentan atakon, kies celo estas hodiaŭ la hispana popolo. La devo de ĉiuj demokratoj, se ili ne volas forlasi sian historian taskon - estas, energie agi kontraŭ la provokistoj, se

ili vere volas konservi la pacon, kiu estas de la faŝistaj atakantoj tiel malhelpata. La hispana popolo batalas hodiaŭ ne nur por sia sendependeco kaj libereco, sed por la antaŭenigo kaj civilizo, por la libereco kaj paco por la tuta mondo. Pro tio ni kredas havi la rajton alvoki la helpon de ĉiuj liberaj kaj demokrataj landoj, same alvoki la solidarecon de la reprezentantoj de inteligenteco kaj kulturo por nia sincera batalo.

La dokumento estas subskribita de verkistoj; Machado, skulptisto Macho, kaj multaj sciencistoj kaj universitataj profesoroj.

Dro. TREBALL, SEKRETARIO DE LA "CORTES" PRI AFERO ALMERIA.

Al korespondento de "Het Volksdagblad" el Amsterdam deklaris Dro. Treball, la sekretario de parlamento, ke "la bombardado de Almeria estas afero kiu rekte tuŝas ĉiujn landojn kaj speciale tiujn kiuj partoprenas en la ne-intervena komitato. La germana militŝipo "Deutschland" ne nur ke ĝi kuŝis



Nº. 17.

en Ibiza, haveno en malpermesataj akvoj por germanaj ŝipoj per la Kontrol - Komitato, sed ankaŭ ĝi pafis al niaj flugmaŝinoj.

Tiu bruteco estas rompo de internaciaj interkonsentoj kaj rekta provo al milito. Se eĉ niaj flugmaŝinoj unue bombardis la germanan ŝipon, ankaŭ tiam Hitler ne rajtas bombardi la malfermitan urbon. Tiu krima bombardado estas plej barbara mortigo de la senkulpa loĝantaro de Almeria. Ni imagu, ke okazas la kunpuŝigo aŭ iu akcidento inter ŝipoj angla kaj germana, ĉu tiam Anglujo devas bombardi Berlinon kaj Germanujo Londonon? Ne! La bombardado al Almeria signifas la bombardado al Parizo, Londono, Amsterdamo kaj aliaj urboj de demokrataj landoj.....

#### LA VERO PRI LA BOMBARDADO DE "DEUTSCHLAND".

La granda franca ĵurnalo "Paris Soir", konata de siaj dekstraj tendencoj publikigis la intervjuon de sia speciala korespondanto el Valencia pri la bombardado de "Deutschland" kun kapitano Aroega, komandanto de la respublikana aviadescadro, bombardita la germanan krosŝipon "Deutschland".

La sciigo de "Paris Soir" estas de granda valoro, ĉar ĝi estas ĵurnalo estanta ĉiam tre objektiva rilate la hispanan Respublikon, kaj ke ĝi pravas pri la mensogo de "atako de rusaj pilotoj" kaj konvinkas pri la atako de "Deutschland" kontraŭ la respublikanaj flugmaŝinoj.

En tiu intervjuo deklaris la kapitano Aroega, ke ĉiu el la partoprenantaj pilotoj estas de la hispana nacieco, kaj nomis iliajn nomojn; Feliks Allende, Ramon Lopez kaj li mem flugis en unu maŝino. Leŭtenanto Armando Garcia, observisto Jaime Serra kaj serĝanto Felikso Lopez okupis la alian aparaton.

Kapitano Aroega ricevis la ordonon de kolonelo Hidalgo Sisneres por fari la observadan flugon super Ibiza. La ordono estis doninta je la 9<sup>a</sup> horo matene kaj la maŝinoj ekflugis je la 5<sup>a</sup> horo postmeze. La ambaŭ maŝinoj estis dumotoraj bombardaparatoj kaj multe pli rapidaj ol la germanaj "Heinkel" aparatoj.

Flugante super Ibiza, ili rimarkis en la golfo unu militŝipon, kiu tuj komencis al ili pafi. La ambaŭ flugmaŝinoj respondis la atakon sen hezite. La fajro kontraŭ la flugmaŝinoj estis komence tro malalta, sed estis tre rapide plibonigita. Tio okazis proksimume je la sesa horo postmeze. Tiu de Aroega komandita flugmaŝino jetis teren kvar bombojn; tri de 200 kg. kaj unu de 110 kg.. La alia maŝino kondukis la atakon en la sama ordo. La demando al subuloj pri iliaj opinioj, pri la bombardado, ĉiuj respondis; "Tre bone! Pli bone ĝi ne povas esti".

Cetere la pilotoj kredis, ke la ŝipo, kiu ekpafis al ili estis la ribelula ŝipo "Admiral Cervera", kaj tiel ili ankaŭ raportis al sia ĉefo. Poste ili sciigis, ke koncernis la germanan ŝipon "Deutschland".

En la germana deklaro, klarigis Aroega, niaj maŝinoj flugis tre malalte. Tio estas simple ridinde. Ni ne bombardis en falflugo, ĉar tio ne estas ebla per niaj maŝinoj. Ni devis kontraŭe bombardi de granda alteco. La fabelo, kiun germanoj elkovris estas simple ridinda.





# GENERALITAT DE CATALUNYA

PRESIDÈNCIA

COMISSARIAT DE PROPAGANDA

Avinguda 14 d'Abril, 442 bis

BARCELONA

Telefòn 82215

## COMUNICAT DE PREMSA


ESPERANTO ELDONO.

Nº. 22.

Barcelona, 2/X, 1937.

TERORO KAJ LA PASIVA KONTRAŬSTARO EN BILBAO.

LA FAŜISTA KULTURO AL KIU SOPIRAS FRANCO.



El ĉiuj partoj de hispana teritorio okupita de Franco, venas la komunikoj pri la ribeloj en ariergardo, kiuj tre klare montras la malkontentecon de la popolo kontraŭ la altrudita sur ĝi reĝimo.

Tre originalan signifon havas la komunikadoj, kiuj devenas el la konfidaj fontoj pri la rezisto de civila loĝantaro de Bilbao kaj aliaj partoj okupitaj de Franco. Tre interesa estas rakonto de iu Basko, kiu forkuris el la faŝista zono kaj rakontis al ni la jenon pri Bilbao:

"Estas vere, ke Bilbao, kelkajn horojn antaŭ la okupado de italaj trupoj travivis tragediajn scenojn, la plej granda parto de la loĝantaro, libervole forlasis la urbon. Tiuj personoj, kiuj decidis resti, faris tion ne pro la simpatio al Franco, sed pro jam

antaŭe preparita plano, por kondamni la pasivan kontraŭstaron. La unuaj enmarŝintaj italaj trupoj trovis la fenestrojn kaj la balkonojn fermitajn kaj ornamitajn per respublikanaj kaj baskaj flagoj; la rezulto estis la pafado, pro kio mortis 11 personoj kaj 23 vunditoj. Pro la okazigo de nova parado, devis la loĝantaro malfermi la fenestrojn kaj balkonojn, eliri en la stratojn kaj hurraŭ al la eksterlandaj trupoj. Ankaŭ tiuj postuloj restis senrezultaj - ses viroj kaj du virinoj estis nova bilanco de la faŝista perforto. Postaj aranĝoj de la militista stabo por restarigi la normalan vivon restis spite la minacojn de pezaj pumoj tute senatentitaj, ĉar nek laboristoj kaj nek la komercistoj malfermis siajn butikojn kaj uzinojn, eĉ la pastroj al kiuj estis ordonite malfermi siajn preĝejojn kaj legi la mesojn rifuzis tion. Tri pastroj kaj naŭdekdu komercistoj pagis per sia vivo la persiston.

Hodiaŭ estas Bilbao la germana kolonio, ĉiuj oficialaj postenoj estas okupitaj de germanoj, la magistratpostenoj estas gvidataj de germanoj, germanoj estis tiuj, kiuj ekfunkciis la minejojn, la metalindustrion, la trajnoj, tramoj, unuvorte ĉio estas en la manoj de Hitler'a subuloj, kiuj cetere konfiskis la plej bonaj hoteloj por si. La soldatoj kaj "falangistoj" estas devigataj



Nº. 22.

eble plej baldaŭ lerni la germanan lingvon, por ke ili povu kompreni siajn novajn "sinjorojn".

La kontraŭstaro de la popolo kontraŭ la eksterlandaj subpremantoj, montrigas ankaŭ en alia maniero, ke viroj, virinoj kaj eĉ infanoj ĉiun lokalon forlasas demonstracie, se nur germanaj aŭ italaj soldatoj estas rimarkitaj. Ĉe tio okazas ofte incidentoj, kiuj krom ceteraj ofendoj, la pistoloj de eksterlandaj subpremantoj faras la finon de la vivo de bravaj respublikanoj.

La ĵurnalo "Gaceta del Norte", organo de faŝistoj en Bilbao publikigis jenan komunikon:

En la listo de juĝesploroj okazintaj antaŭ la speciala Tribunalo ĝi raportas pri la specialaj kondamnoj kaj detaloj de la aljuĝitaj punoj:

Monaño Aranguen, el la Karmen a Ordeno, ĉar li faris predikon antaŭ la registaraj trupoj. Je morto.

Pastro Manuel Arsuaga, ĉar li celebris la serĉon da mesoj dum la daŭro de religia festo organizita de la respublikanoj. Je morto.

La pastroj Sotero, Legerra kaj Batia, pro la sama krimo. Je tridek jaroj de mallibereco.

Aliaj pastroj estis kondamnitaj je punoj, kiuj varias inter ses kaj dekdu jaroj je perfortaj laboroj, ĉar ili alportis la "spiritan helpon" al la respublikanaj soldatoj.

Aliaj du kondamnoj je morto estis diktitaj kontraŭ Melchor Hospitalet, redaktiano de ĵurnalo kaj Demetrio Basturia, trinkejstro pro servo de manĝaĵoj al iuj membroj el la Baska Registaro.

El ĉio tio oni povas konkludi, ke la daŭra kontraŭstaro maltrankviligas la faŝistajn estrojn, ĉar Franco sentis sin devigita skribi la deklaron, kies publikigo estis en la lasta momento de la cenzuro malpermesita. La perfidulo Franco deklaris inter alie, ke al li estas malagrabla sciigi, ke tiu popolo, por kies liberigo, li uzis la plej bonajn siajn fortojn (italoj kaj germanoj), kies parto en li eĉ perdis, per sia sintenado montras kontraŭon al liaj meritoj.....

---

#### DAVID LEVINSON EN HISPANUJO.

Troviĝas en Hispanujo la fama usona advokato David Levinson, defendinto de Dimitrov kaj Popov en la proceso de "Reichstag", de Matias Rakosi en Hungarujo kaj de Harry Berger kaj Prestes en Rio de Janeiro.

Levinson deklaris al unu ĵurnalisto inter aliaj aferoj la jenon:

Mi ĉiam estis pacifisto. Mi malamas la militon; pruvo pri tio estas la prepagando de Junio ĝis Aŭgusto 1917, kiun mi faris defende al tiuj, kiuj tiam rifuzis iri al la milito, sed antaŭ la faŝista invado, kiun la Hispana tero suferas, mi kredas je la milito kontraŭ la faŝismo premanto de la libereco kaj demokrateco, je la milito ĝis ekstremo de la reakcia imperialismo. Mia plej granda deziro estas esti utila al la Hispana afero. Mi ne apartenas al iu partio, mi nur estas demokrato, amiko de la libereco de popolaj rajtoj kaj de la vera justeco. Mi estas partiano de la Hispana afero, kiu estas la afero de la tutmonda demokrateco. Mi estas kontraŭa al la faŝismo, ĉar ĝi laŭ ĉiuj liberaj konsciencoj, estas la malfeliĉego de la Homaro.

---



ALVOKO AL TUTA PROGRESEMA KAJ DEMOKRATA MONDO !

LA KRUELEGO DE INTERNACIA FAŜISMO EN BARCELONO.



la vojon al paco laŭ la parlamenta justeco, montras al ni la faŝismo de Franco ankoraŭ foje la teruran bildon de terure kripligitaj kaj mortigitaj senkulpaĵaj infanoj.

La libera Katalunujo kaj la Respublikan<sup>a</sup> Hispanujo, turnas sin kun nova apelacio al ĉiuj sinceraj homoj en mondo:

Haltigu la murdrulistejn, kiuj volas Eŭropon kaj la civilizon detrui per fajro kaj sango !

La unuan de Oktobro pasinta devis kunveni la ambaŭ parlamentoj en Valencio kaj Barcelono. Multaj parlamentanoj revenis el eksterlando, por rekomenci sian parlamentan laboron kaj per sia ĉeesto demonstraci la justecon kaj rajtecon de la Respublika Registaro.

La atomena Kieĵpo de Liano, jam plurajn fojojn sciigis per la radio, ke la parlamentaj kunsidoj en Valencio kaj Barcelono estos salutotaj per "honorŝalvo". Kaj fakte tuj antaŭ la malfermo de la parlamento en Barcelona, aperis tri flugmaŝinaj eskadroj konsistantaj de 5, 4 kaj 3 faŝistaj flugmaŝinoj, kiuj per barbara maniero bombardis la civilan loĝantaron.

En la sama tago de unua de Oktobro, kune kun la malfermo de la parlamento, estis ankoraŭ malfermitaj la lernejoj por komenci la novan lernejaron.

La bomboj detruis 34 domojn en la konata laborista kvartalo Barceloneta, inter kiu unu Popollernejon, kiu estis tute egalita kun la tero. Jam ĉe la unua formeto de la ruinoj oni trovis pli ol 100 mortintoj kaj pli ol 150 peze vunditaj.

Ĉefparte ili estas infanoj, senkulpaĵaj infanoj sen brakoj kaj kruroj kun terure kripligitaj vizaĝoj kun disŝiritaj ventroj kaj kapoj, prezentis la kruelan bildon.

Intertempe, kiam la respublikana Hispanujo serĉas







EKZEMPLO DE LA UNUECA FRONTO EN KATALUNUJO.

En Lerida starigis nova Komitato de Popola Fronto. En ĝi partoprenas, ĉiuj politikaj kaj sindikataj organizoj; Anarĥistoj, Unuiĝinta Socialista Partio, Respublikanoj, U.G.T. - C.N.T. sindikatoj kaj la Kamparanoj. Oni prezentis la komunan programon. Ĉiuj partoprenantoj devigis sin precize teni je tiu programo. La ĉefaj punktoj de tiu programo estas:

- Organizo de la defendo de la urbo.
- Komuna agado kontraŭ la "kvina kolono".
- Komuna agado kontraŭ la spekulantoj.
- Komuna agado kontraŭ la kaŝado de produktoj.

Krom tio la Komitato de la Unueca Fronto alprenis al si la taskon, mobilizi la virinojn por plenumi la taskojn prezentitaj pro la necesoj de la milito.

La kreo de la unueco en Lerida, estas unu el plej gravaj faktoj de tempo de starigo de unueco pere la Junularo Hispana. La tuta kontraŭfaŝista preso en Hispanujo akceptis tiun iniciaton kun granda laŭdo.

EPIZODO EL LA CENTRA FRONTO.

Antaŭ nelonge en Carabanchel (Madrido), niaj dinamitistoj preparis minon. Kiam ili realigis la laboron, ili rimarkis, ke la malamiko, siavice konstruis la kontraŭminon.

La nokto estis tre malluma kaj la pafado tre ofta, eble pro tio, ke unuj kaj aliaj gardostarantoj celis montri, ke ili staras vigle.

En la momento kiam la kemandataro kredis konvene, oni ordonis komenci la pafadon per bombardiloj, mitraliloj kaj pafiloj kontraŭ la malamikaj pozicioj, kvazaŭ temus pri preparado por iniciati antaŭeniron.

La ribeluloj falis en la kaptilon, kiun preparis por ili la komandataro kaj kaj ili koncentradis homojn en la antaŭajn poziciojn, konsistantajn el tri fortikaĵetoj ĵus instalitaj de ili.

Kiam tio estis atingita, la respublikanaj trupoj malantaŭen iris iom por ne esti atingitaj de la esplodaj efikoj. Oni puŝis la kontaktilojn estigantajn la cirkviton de la elektraj piloj kaj okazis la terura eksplodo, kiu tremigis la terenon de amplekso de tri aŭ kvar kilometroj.

Samtempe oni ĵetis raketon kaj bengalajn fajrojn, kiuj lumigis la spacon pro kio oni povis perfekte vidi la ampleksan kurtenon el tero, kiu akvofalforme falis de granda alteco.

Niaj soldatoj, kun siaj ĉefoj antaŭe, saltis el siaj parapetoj kaj iris okupi la lokon, kie antaŭ momentoj estis instalitaj la tri fortikaĵetoj.

Samtempe la respublikanaj mitraliloj, strategie lokitaj, pafis al la forkurintoj, multajn el kiuj oni vidis teren fali senviva aŭ vundita.

Momentojn poste la novaj pozicioj estis fortikigitaj de niaj trupoj.

PLI OL UNU JARO EN LA FAŜISTA ARMEO.....

La ŝerĝanto de la sanitara helpo el la garnizono Saragosa, prezentis sin en niaj linioj kaj rakontis pri la demoralizacio en la ariergardo de la faŝistoj:

"Neniu vivas kontente en la rebelul-Hispanujo. La "reketistoj" kaj "falangistoj" malamas sin reciproke. Ĝiuj riĉuloj kaj la burĝaro, eĉ la reakcio-



nulej, preĝas je la venko de "ruĝuloj", ĉar tiuj diras, estas maleble vivi tiel malfeliĉe suferi.

Sed venas ankoraŭ pli, ĉiu kiu ion enspezas, aŭ havas iun fortunon, devas fordoni la monon, mi vidis similajn "libervolajn" donacojn konsistantajn de unuduoni miliono da pesetoj.

La forkurinto rakontis ankaŭ pri la fremda invado. En Saragoso estas ĉiuj teknikaj servoj en la manoj de germanoj. Ili havas la aviadon, la fortifikacion kaj la kontraŭaeratakadon. En la urbo estas multaj marokanoj, sed tamen la italoj estas la sinjoroj en la urbo. La hispanajn militistojn oni ne plu kalkulas. Per la italoj estas en la hospitaloj la plej bonaj litoj rezervitaj kaj en la publikaj transportiloj la plej bonaj lokoj.

La "Arriba Espania" estas ĉe tiuj spektakloj la akra sarkasmo. Homoj, kiuj tion vidis, scias, ke ilia urbo estas kolonio kaj sekrete aŭskultas al la registaraj radiostacioj. Eĉ la burĝaro kaj la dekstruloj deziras la venkon de registartrupoj. En la faŝista teritorio ĉiu scias, ke la militon oni ne povas venki, kaj tio estas dirita de buŝo al buŝo, ĉar oni diras, ke la "ruĝuloj" estas minimume hispanoj. La venkoj de niaj trupoj estas tie tre bone konataj, la venko de ribeluloj estas sen entuziasmo akceptata, kontraŭe la plej malgranda venko de la respublikanoj revokas la esperon pri la baldaŭa liberigo.

La politiko de teroro nebligis ĝis nun la ribelon, spite ke la popolo malamas la perfidulojn kaj entrudulojn.

#### PATRIOTISMO NATURA PATRIOTISMO POLITIKA KAJ ESPERANTO.

##### PAROLADO DE DELFI DALMAU DUM LA EKSPozICIO "50 JAROJ ESPERANTO" EN BARCELONA

Delfi Dalmau elstarigis ke ĉia homa agado devas esti favora al la naturo, al scienco, al vero. La tuta mondo produktas por satigo kaj riĉigo de la tuta homare. Kontraŭnatura estas politike, kiu malliberigas landojn kaj naciajn homarojn; ĉar tiam por unuj troas la naturaj produktaĵoj kiuj mankas al aliaj nacioj. Naciaj diferencoj estas naturaj diferencoj, kaj tial oni devas respekti ilin, kiel ekzemplas, pri tio, la malgranda Svisa Konfederacio, kaj modernaj ŝtatoj: Sovetunio, Ĉeĥoslovakujo, Belgujo, k.a.. Lingvaj diferencoj estas naturaj: neniu popolo antaŭelektis sian nacian lingvon. Tial ĉiaj naturaj lingvoj meritas plenan respekton. Homaj aŭ homaraj problemoj povas nur per superado esti solvataj, neniam per detrue; tial Zamenhof, geniule ne intencis selvi la interlingvan problemon per detrue de iuj lingvoj, sed por kreo de superlingvo; neŭtrala, helpa, komuna, kun granda ideale - internacia, ne kontraŭnacia. Natura nacia lingvo estas patro, dum ŝtata, leĝa lingvo estas bopatro; kaj estis kaj ie estas ankoraŭ politikadoj de bopatro kontraŭ la patro, de trude kontraŭ rajte. Tial ĉefe, Zamenhof, pro interna ideo de justeco kaj homane, elĉerpis sin per kreado de neŭtrala lingva fundamento; ĉar li, jude kaj polo, sin sentis sklavo, subpremato, en la imperiestra Rusujo. Kaj ĉar li estis precipe kulturulo, li sentis plej akute en la lingva afero la vipon de politiko kontraŭ la naturo, de leĝo kontraŭ justeco, de lingva konfuzigo kontraŭ lingva kulturo.

Ni, Katalunoj sentis, sentis kiel tiuj poloj kaj ĉekoj antaŭmilitaj la lingvan truden kontraŭ lingva rajto, kaj tial ni profunde komprenas la internan ideon de justeco interlingva sur neŭtrala lingva fundamento, kaj deziras akcelon de fina venko esperantista kontraŭ ĉiuj pretendoj de superrego de ŝtata lingvo kontraŭ natura, de eksterlanda kontraŭ enlanda.



LA NOVA AGRARLEĜO EN KATALUNUJO .

La Kataluna Registaro (Generalitat), eldonis post longaj kunsidoj la dekreton, kiu estas historia paŝo antaŭen sur la vojo de nova agrara formo en Katalunujo. Diferente al la resto de Hispanujo estas la terposedo en la formo de farmodonado, pro ĝia speciala historia evoluo tute nekonata. La ĉefa formo de ekspluato estis la farmo, kiu prezentigis en diversaj formoj, La 19-an de Julio estis la farmo abolicita. La farmistoj estiĝis pro tiu leĝo liberaj kamparanoj. Post kiam la farmo estis forigita kaj la faŝistaj posedaĵoj senproprigitaj, kaj post kiam ankaŭ oni faris la finon al la eksperimentoj de kolektevigo, la kataluna terkulturigo aspektis proksimume tiel:

Unualeke estis kamparanoj, kiuj sen ekspluato de fremdaj fortoj povis kontentigi siajn bezonojn; due estis ter-malriĉaj kamparanoj kaj terlaboristoj sen tero kaj fine estis grandterposedantoj, antaŭe farmistoj, nun potencaj kamparanoj, kiuj posedis tiom da tero, ke ne sufiĉis al ili siaj propraj laborfortoj, do prenis fremdajn laborfortojn por labori, kiujn ili ekspluatit.

Al tiu situacio devis la Kataluna Registaro fari la finon. La difinitiva paŝo al la solvo de la agrara ŝanĝo en Katalunujo, signifas la nova dekreto de Generalitat, kiu malfermas al la kamparanoj la novan perspektivon de la feliĉa estonteco. La ĉefa signifo de la dekreto konsistas el tio, ke al ĉiu kamparano kaj terlaboristo garantias la rajton posedi la teron. La dekreto difinas inter alie, ke ĉiu kamparano kaj terlaboristo, kiu ne posedas, aŭ ne sufiĉe posedas la teron, povas sin turni al la Ministrejo de Agrikulturo. La Generalitat devas post 30 tagoj de la ensendita peto disponigi al la petinto la necesan teron. La kondiĉoj koncernataj la novan distribuon de la tero, estas, ke la kamparano estas defendata kontraŭ ĉiu ekspluato, kaj permesas al li perlabori la teron laŭ propra volo inter la limoj de la leĝo. Ĉiu klopodo por malutiligi la rajton de kamparanoj per deviga kolektevigo ktp., estos rigardata kiel kontraŭrevolucia ago kaj punita de Popoljuĝejo. La registaro disponas pri la tero konfiskita de faŝistoj, pri la neperlaborita tero, kaj pri la tero de riĉaj kamparanoj, kiuj sen fremdaj fortoj ne estas en stato perlabori ĝin.

SOLDATOJ DE KATALUNUJO .

Kvardek mil katalunoj batalas en la Centra kaj Suda frontoj. Tiuj vortoj elparolitaj antaŭ kelkaj monatoj impresas kiel granda cifero. Tamen, ankoraŭ krom tiuj, aliaj dekkvar mil katalunoj iris pligrandigi la herojaj divizioj, kiuj defendas Madridan fronton antaŭ la perforta faŝista okupo.

Tiu estas, inter multaj aliaj aspektoj, la kunlaborado de Katalunujo, en la milito por sendependece de Hispanujo.

Jam de kelkaj tagoj la Komisarejo de Propagando de Generalitat de Katalunya estas vizitata de amasoj de junuloj plene entuziasmaj, ili estas la soldatoj de la lasta militvarbado de la Respublika Registaro, kiuj venis serĉi la insignon, kiun la Komisarejo de Propagando faris kun la Kataluna emblemo kaj surskribis Katalunujo.

Centoj da soldatoj pretaj pretaj por formarsi al la fronto deziras antaŭe akiri la insignon de Katalunujo. Ilia juna gajejo plenigas la domon kun ĝojo kaj entuziasmo. Ĉiuj scias la kialon pro kie ili iras al fronto batali, ili bone scias, ke ni batalas kontraŭ la italaj - germanaj intruduloj kaj nur deziras la momenton trovi sin kontraŭ la amlamiko, sed tiu dezirata momento estas prokrastata, ĝar la novaj soldatoj bezonas unue la necesan militistan edukon. Ili estas la entuziasma kaj optimisma juneco de nia vivanta karne sur nia tero, kiuj estas pretaj deni ĝion por atingi la liberecon de Katalunujo kaj Hispanujo, tial ke, dum tiuj dekkvar monatoj de milito ili ekkonis la kruelaĵon de perfidaj generaloj kaj la krimoj de la faŝistaj armeoj. Kun ĝojo ili portas sur la bruston



la insignon de "quatre barras".

Ni estas kaj estos katalunoj - diris unu el ili - ĉu en Madrido aŭ Saragoŝo, en Kordovo aŭ en Asturio kaj ĉiuj, kiuj estas kun ni ni konsideras kiel fratojn. Unuiĝinte ĉies fortojn kaj klopodojn en unu tuto, ni detruos la faŝismon.

Dudekjarajn knabojn ! Kiom da iluzioj, konvinkoj, optimismo kaj plena fido en la plena venko.

Tial parolas niaj soldatoj, kiam sur iliaj brustoj kaj koro pendas la emblemo kun la vorto : CATALUNYA.

#### ANGLA DELEGACIO EN LA HISPANA PARLAMENTO.

William Doebi kaj Ernest Thurtle, du anglaj diputitoj el la "Labour Party" alvenis per flugmaŝino Hispanujon por ĉeesti la unuaj kunsidoj en "Cortes" (parlamento). esprimante la kunsentojn de la vastaj amasoj de angla popolo, ili deklaris: "Ni venis al Hispanujo por pagi la ŝuldon de estimo al la reprezentantoj de la hispana popolo, batalanta tiel energie por konservi la demokration en sia lando kontraŭ tiranie kaj diktature.

#### HITLER SENDAS ĈIUTAGE TRANSPORTON AL HISPANUJO.

El tre bonaj fontoj ni sciigis, ke la 18-an de Aŭgusto pasinta, foriris la transporto de germana "Reichswehr" 4/31/1 el Orienta Prusujo al Hispanujo. Tiu transporto estas desanĝo de la 6<sup>a</sup> baterio de 23<sup>a</sup> regimento el Veimar, kiu nuntempe troviĝas en Hispanujo. La nova transporto 4/31/1, estis en Rudolfstadt en Thuringen kunfandita. La soldatoj ricevis oksemajn kurson en hispana lingvo. Oni promesis al ili 400 markojn po monate kiel salajro. La duonon oni pagis al ili en Germanujo kaj la alian duonon oni pagis kun valorĉekoj, kies monnan valoron ili povos ricevi de post sia reveno en Germanujo. Oni informis al la transporto 4/31/1, ke la tuta korespondaĵo por ĝi kaj de ĝi devas esti sendata al unu adreso en Berlino.

#### KION RAKONTAS FORKURINTOJ EL FAŝISTA PARTO.

La komandanto de iu Baska bataliono, kiu antaŭ ne longe sukcesis forkuri el la faŝista teritorio, estis atestanto de sistemataj fusiladoj en Sntander, de post la okupo de la urbo per italoj. Ĉiutage estas de la marbordo metitaj tutaj montoj de kadavroj en la maron. La forkuranta komandanto vidis la fusiladon de 250 milicanoj pere la maŝinpafilo. La teroro regas en la tuta regiono kaj la marokanoj rabas sistemate.

Alia transkurinto el la ribela parto informas al ni, ke la komercistoj en Burgos kaj Vittoria transiris al la pasiva kontraŭstaro, rifuzante akcepti la novan monon eldonita antaŭ nelonge de Franco.

#### EL ARAGONA FRONTO ONI RAPORTAS.

Ĝis nun, dum niaj operacioj en la Aragona - fronto, ni kaptis 6.000 faŝistojn kaj proksimume lasama kvanto transkuris al nia flanko.





# GENERALITAT DE CATALUNYA

PRESIDÈNCIA

COMISSARIAT DE PROPAGANDA

Avinguda 14 d'Abril, 442 bis

BARCELONA

Telèfon 82215

## COMUNICAT DE PREMSA

ESPERANTO ELDONO.

Nº. 23.

Barcelona, 9/X, 1937.

SESA DE OKTOBRO 1934 - SESA DE OKTOBRO 1937.

LA DEKLARO DE PREZIDANTO DE GENERALITAT DE CATALUNYA.



La sesa de Oktobro, memoriganda datreveno de historia dato, unu el la plej gloraj de la Kataluna popolo, estis honore memorigita de Kataluna Prezidanto Lluís Companys per jenaj vortoj:

"Ne estas eble menci tiun daton, sen senti la kunligon, kiu kunligas Katalunuojn kun Asturio, ĉar subite kaj emocie ni rememoras ke Katalunujo estis persikutita kaj for deklarita de la leĝo, kaj ke Asturio travivis terurajn kaj malfeliĉajn momentojn. Kaj ni eĉ ne povas pronunti la nomon Asturio sen en plej profunda estimo memorigi ĝian grandan heroecon. La milito plena kun kruelaĵoj, kiuj la ribeluloj falegis sur ni, estiĝis milito por nia sendependeco. Kiam mi mencias la 6-an de Oktobro, ni volas konstati la plej altan solidarecon de la aŭtonoma Katalunujo al la Respubliko kaj ĝia Registaro kaj

samtempe esprimi nian konvinkan deziron kaj volon, ke ni kurage batalos por liberigi Hispanujon de la fremda perforta okupo. La popolo scias, ke la milito ankoraŭ daŭros kaj estos harda; sed tamen estas preta fari ĉion necesan kun plena kaj optimisma fido por la fina venko.

Katalunujo malamas la militon, ĝi estas laborema kaj sentema popolo estimanta la altajn spiritaĵojn kaj grandajn manifestadojn de arto, beleco kaj kulturo. Ni malamas la militon kaj pro tio ni ĉion donos por gajni ĝin kaj la triumfon fariĝi la fundamenton de la paco kontraŭ la perforteco, la liberecojn de aŭtonoma Katalunujo kontraŭ la subpremaj agadoj de centralista ŝtato kaj la vojojn de antaŭeniginta demokrateco kontraŭ ĉiuj diktaturoj kaj ĉiuj formoj de despotismo".

*Lluís Companys*



SESA DE OKTOBRO 1934 - SESA DE OKTOBRO 1937.

La dato 6<sup>a</sup> de Oktobro havas por Katalunujo grandegan spiritan valoron. Ĝi montras limŝtonon en glora historio de nia popolo, pro ĝia antaŭeco en tiu ĉi batalo kontraŭ la internacia faŝismo.

La 6-an de Oktobro 1934, la kunligitaj fortoj de la hispana reakcio, kiuj inside estis filtrintaj sin en la Registaron kaj kiuj provoko post provoko estis detruintaj la elementojn de la respublikana rezistado, jetadis kontraŭ la lastan bastionon de la Respubliko, Katalunujojn, sangan ofensivon. Nia popolo, fidela al siaj tradicio kaj historio, subtenis la dignan pozicion, kiu devis permesi al ĝi tra la tempo, subteni ĝian prestiĝon kaj moralan forton.

La Prezidanto de la Kataluna Registaro rifuzis la facilajn solvojn, la pravigitajn abdikojn pro la malesto de materiala forto kaj adoptis heroan sintenadon, sur kiu monatojn poste povis la popolaj amasoj kristaligi la demokratian movadon de la 16<sup>a</sup> de Februaro.

Sen la 6<sup>a</sup> de Oktobro, sen la heroo rezistado de minlaboristoj el Asturio, sen tiuj du agoj, en kiuj unu popolo kurage akceptis la batalon en malegalaj kondiĉoj, la hispana reakcio ne estus malkovrita sian terurigan vizaĝon, la sango de la popolo ne estus droniginta la terurigajn intencojn de la faŝismo, kaj la oligarkiaj fortoj de la mono kaj de la religio, estus daŭrigintaj tra sia hipokreteco, subpremante la landon.

La herooĝo de la Kataluna Registaro, tiu de la Asturia Komuno, havis tiun grandan valoron; malebligi kompromison inter la fortoj historie kontraŭaj, eviti ke kun la abdikoj, la popola elemento perdu la stemulon de la venko.

Depost tiu 6<sup>a</sup> de Oktobro ĝis hodiaŭ okazis multaj aferoj. Aliaj fojon la reakcio montris sian veran naturon levante kontraŭ la unuanimvolonde la lando, manifestiginta en la brila balotada venko de la 16<sup>a</sup> de Februaro, la armitajn formaciojn de la Hispana Faŝismo intime unuiĝinta kun la itala-germana faŝismo.

Kaj denove Katalunujo akceptis la batalon sur la stratoj kaj venkinte kun vireco neniam egaligita en la historio, situigis la problemon sur la veran historian planon. Kaj pro tragedis paralelismo de la historio de Iberio, estas ankoraŭfoje al niaj fratoj de Asturio, al kiu apartenas la majesta honoro sin oferi sur la batakampo pro la justeco kaj pro la libereco.

Ekde la 19<sup>a</sup> de Julio Katalunujo venkis la faŝismon en sia tuta teritorio, faris ekspedicion al Mallorca, konservis fronton de 350 km., de Jaca ĝis Teruel; sendis sesdek mil libervolulojn al la fronto, ducent mil soldatojn, kvindek mil batalantojn en Jarama, al Arganda, al Cifuentes kaj al Pozoblanco; amekceptis sepcent dudek kvin mil rifuĝintojn, transformis je armilfabrikoj la fabrikojn de paco kaj progreso, laboras produktplene kaj sentis sur sia karno la tragediajn ŝirojn kaŭzitajn de la faŝismo per siaj krimaj bombardadoj sur la urbojn de la ariergardo.

Sesa de Oktobro 1934, sesa de Oktobro 1937. Datoj de ĉargreno kaj de doloro, datoj de renaskiĝo kaj espero. Katalunujo, nun kiel en 1934, kiel ĉiam, oferos sian vivon por savi sian liberecon kaj tiun de la Iberiaj popoloj.

SENATORIOJ POR TUBERKOLOZ-MALSANAJ EN HISPANUJO.

La Ministrejo de Higieno malfermis kvar novajn senatorioj por tuberkoloz-malsanaj. Kelkaj jam ekzistantaj senatorioj estis ŝanĝitaj en pli fervoraj lokoj. Per nova dekreto, oni aranĝis, ke la malsanuloj en estonteco ne bezonos plu atendi longan tempon al sia vico, sed al ĉiu tuj estos disponitaj novaj litoj. La ĉeesto en la senatorioj estis ĝenerale fiksita je proksimume tri monatoj, kun escepto de eksterordinaraj okazoj, de kiuj estos necesa pli longa restado en la senatorio.



SOLIDARECO INTER LA FRONTO DE MILITO KAJ LA FRONTO DE LABORO .

En nia urbo okazis serio da solenoj de granda valoro spirita kaj simbola, solenoj montrintaj la solidarecon ekzistantan inter la fronto de batalo kaj la fronto de laboro. La soldatoj, la reprezentantoj de la milita fronto vizitis la fronton de laboro kaj ili ricevis impreson superan, majestan, alte moralvaloran. Dum kelkaj horoj kunvivis batalantoj de la milita fronto kaj la batalantoj de la labora fronto, kaj la unuaj, tiuj, kiuj venis peti klopodon de la laboristoj, povis rimarki kiel tiuj ĉi superiĝas ĉiutage por atingi plej grandan produktadon kaj plej grandajn rezultojn por komplete kovri la necesojn de la batalantoj.

Unuj kaj aliaj, premante siajn manojn konsciis perfekte pri la unuiĝo, kiu devas ekzisti inter ambaŭ frontoj; tiu de milito, sen tiu de laboro, ne povus rezisti la atakojn de la ribeluloj; tiu de laboro sen tiu de milito vidus sin venkita de la krimaj hordoj de la fremda imperialismo, serĉanta en la milito eliron por siaj nesolveblaj problemoj.

Laboristoj kaj soldatoj, soldatoj kaj laboristoj, ekde la alta ĉefo ĝis la simpla soldato, ekde la inĝiniero ĝis la plej simpla laboristo, konis la ĝojon scii, ke ili estas necesaj unuj al la aliaj kaj vidi, kiel ili povis konfidi unuj al la aliaj reciproke. Ĉiuj en konsento ni formu solan blokon, solan armeon por kontraŭbatali la malamikon, kiu estas ĉies, ĉar la soldatoj, kiel la laboristoj, estas filoj el la popolo.

La solenoj okazintaj en tiuj ĉi tagoj havis grandan simblan valoron. Ili montris al la popolo, ke la unueco estas fera inter la bonfiduloj kaj bonvoluloj kaj kiel, streĉe unuiĝintaj, fermitaj la kadroj, kubuto kontraŭ kubuto, la venko estos nia. Pli ol ĉiuj vortoj, pli ol ĉiuj paroladoj, tiuj solenoj montris la unuiĝon de ambaŭ frontoj; la fronto de batalo kaj la fronto de laboro.

Nun la laboristoj devas iri al la baltfronto kaj vidi per siaj propraj okuloj kiel batalas la soldatoj de la Respubliko, la soldatoj de Katalunujo, kiel ili vivas, kiuj estas iliaj necesoj; kaj kiam tiuj ĉi laboristoj estos premintaj la manon al la soldatoj, kiam ili estos sigelintaj la unuiĝon meze de la kanona tondrado, en nuboj el polvo kaj fumo, kiam la solidareco estos fandiĝinta meze de maro el sango kaj fajro, tiuj ĉi laboristoj ne pensos plu je multaj aferoj, kiujn oni tie ne havas, kaj ili pensos je la malvarmo, je la libroj, je la bagateloj kaj je ĉiuj aferoj, kiuj mankis ĉe la fronto.

Tiam la soldatoj, niaj fratoj el la baltfronto estos gajnintaj la plej grandan batalon. Ili estos vidigintaj al la soldatoj el la laborfronto, kio estas la milito, kaj por la milito, - por ĝin gajni, - oni faros ĉiujn klopodojn, ĉiujn oferojn, kiuj ankoraŭ ne estis faritaj.

Soldatoj el la militfronto kaj la laboristoj el la laborfronto ! Ni ĉiuj estas la samaj, ni ĉiuj estas soldatoj de tiu nobla kaŭzo, kiun ni defendas, de tiu ĉi milito, kiun ni faras por meti finon por ĉiam al la faŝismo, ĉar me-tante finon al la faŝismo ni finos por ĉiam la militojn, kaj tiam ĉiuj en unu sola fronto, tiu de laboro, ni antaŭeniros laŭ la vojo de la socia justeco kaj de la progreso !

KIEL ESTIS MORTIGITA LA POETO GARCIA LORCA.

En tiu tago mi gardostaris. Mi vidis enirantan en la kazernon junulon. Li estis pala, sed li pasis serene. Li estis Frederico Garcia Lorca. Kiam mi lin vidis, mi komprenis la teruran tragedion, kiu ŝvebis super li. Garcia Lorca havis signita sian mortokondamnon, signinte la faman romanon pri la Civila Gvardio.....

Oni diris al mi, ke li estis trovita ĉe la Franca Legacio. Per trompo ili sukcesis elirigi lin de tie, kaj tiam li estis kaptita. Kompreneble, li ne estis, kiel ankaŭ neniu alia, juĝita de iu Tribunalo. Tiun saman nokton oni forportis lin inter kelkaj civilaj gardistoj el la Civigvardia Kazerno. Mi, mal-



Nº. 23.

ĝoĝe estas ĝin diri, troviĝis inter ili. La veturiloj ekmarŝis tra la ŝoseo de Padul. La terura karavano haltiĝis je dekdek kilometroj el Granada. Estis la oka vespere, kiam ni dessaltis el la veturiloj. La veturilaj lanternoj estis direktitaj al tiu, kiu iris al la morto. Lia silueto desegniĝis en la fono de la nokto. La civilgardistaro situiĝis post la lanternoj, kie ĝi ne estis videbla pro la forto de la lumo.

Garcia Lorca paŝis firme kun majesta sereneco. Subite li haltis, li turnis sian vizaĝon al ni petante paroli. Tio kaŭzis profundan impreson, speciale al la leŭtenanto Medina, kiu komandis la aron.

Kaj li parolis; parolis Garcia Lorca kun firmeco kaj certa voĉo. Ne estis liaj vortoj el malforteco kaj invokante pardonon. Ili estis virecaj vortoj de defendo je defendo de tio, kion li ĉiam amis; la liberecon. Kaj li laŭdis la kaŭzon de la popolo, kiu estis la lia, kaj la laboro, kiun ĝi realigas kontraŭ la barbareco kaj la krimo.

Tiuj vortoj, eldiritaj en la fajro de la paroksismo, kaŭzis teruran embarason en ĉiuj, kiuj tenis la pafilon. Por ni estis kvazaŭ penetranta lumo, kiu leviĝis en niaj cerboj. Kaj la poeto daŭrigis parolante..... Sed lia voĉo estis tranĉita. Okazis io ŝtranga, monstra, krima. Leŭtenanto Medina, ĵetante terurajn blasfemojn pafis per sia pistolo kaj ekscitis la civilgardistojn kontraŭ la poeton. La spektaklo estis abomeninda. Je frapoj de pafiltlenilo, je pafoj, ili sin ĵetis (kelkaj restis nekapablaj sin movi pro la teruro, kiun kaŭzis al ili la sceno) sur Garcia Lorca'n, kiu forkuris persekutita per la pluvego de kugloj. Li falis je ĉirkaŭ cent paŝoj..... Ili sekvis post lin kun la ideo lin finmortigi. Sed elstaris la figuro de Frederico. Li leviĝis sangante per teruraj okuloj li rigardis ĉiujn, kiuj returneiris timigite. Ĉiuj civilgardistoj supreniris al la veturiloj. Nur restis antaŭ li tiu leŭtenanto, kiu tenis sian pistolon, Garcia Lorca fermis siajn okulojn por ĉiam kaj falegis sur la teron, kiun li surverŝis per sia sango.

Medina rapide antaŭeniris kaj pafis kontraŭ la malfeliĉa Frederiko tri kompletajn pafseriojn. Tie restis la poeto neentombigita kontraŭ sia Granada...

La granda granadana poeto estas ĉe nia flanko la viktimo plej esprimoplena pri la batalo, kiun subtenas la reakcio kontraŭ la libereco. Frederico ne estis farinta malbonon al iu, li ne estis farinta politikajn propagandojn, li ne uzis sian gracian plumon kaj sian korektan verson por fari insultojn, nek eĉ laŭdi doktrinojn, kiuj povus ŝajni al iu ribelemaj. Li estis poeto pura, sen mikso de oficiala prozo; li estis gaja, optimista; kun siaj versoj kaj popolaj kantoj li iradis tra la vivo verŝante ĝin, ĝis kiam li renkontiĝis kun la kanajlo, kiu murdis lin de malantaŭe en mizera, barbara venĝo.....

(rakonto de civilgardisto forkurinta el la ribelula sektoro).

#### IMPRESOJ PRI MADRIDO.....

La presagentejo "Agence Espagne" komunikas, ke jam de unu monato ĉiuj lernejoj en Madrido rekomencis sian regulan funkcionadon. En Madrido troviĝas ankoraŭ 50.000 infanoj. Depost dekmonata heroa defendo estas kompreneble, ke la militaj okazintaĵoj pli okupas la infanojn ol la lernejavizitado. Ludi militon ĉefe okupas ilin. Multaj el ili ne nur kontentiĝas kun ludo, sed ankaŭ klopodas kaj eĉ atingas la unuajn liniojn en la Universitata Urbeto, kaj kiel ili deklaras por helpi en la defendo de la urbo.

Tiujn tagojn gardis sin ia naŭjara knabino en la tanko kaj povis esti elkovrita, kiam la tanko troviĝis jam en la fajra-linio. La knabino defendis sin per siaj kruroj kaj manoj nevolinte reveni al sia hejmo, sed resti ĉe soldatoj por flegi la vunditojn.

La evakuado de en Madrido restintaj infanoj, ne nur faciligos la defendon



Nº. 23.

de la urbo, sed ankaŭ ebligos tute alian lernejedukadon. Tial organizas la Unuiginta Socialista Junularo ĉe ĉiuj parkoj kaj infan- ludlokoj la kunvenojn de infanoj, partoprenantaj de cendoj da infanoj. Al tiuj infanoj alparolas anoj de la Junularo demandante ĉu ili volas, ke Madrido falu? Al tiu demando la infanoj respondas ĥore nel kaj poste ili estas petataj kun siaj gepatroj forlasi la urbon. Tiu propagando havis la rezulton, ke la kvanto de infanoj forlasinta Madridon ĉiutage estas pli granda.

Ankaŭ la konsumado estas ĉiutage en Madrido pli bona. Oni povas nun aĉeti ĉion, karnon, panon, fiŝojn, fruktojn kaj eĉ sapon, kies lasta ĝis nun ne estis akirebla en Madrido.

---

### INTERVJUO KUN LA MINISTRO DE JUSTECO IRUJO.

La katolika ministro el Baskolando Irujo, kiu gvidas la departamenton de justeco en Valencio, deklaris en sia intervjuo kun la ĉeĥoslovakaj deputitoj pri la rimarko, ke vastaj amasoj katolikaj batalas kun komunistoj kaj socialistoj ŝultro ĉe ŝultro kontraŭ la faŝismo, - la ministro respondis:

"Ĉi tie en Hispanujo, estis du specoj da katolikoj; tiuj, por kiuj la religio estis nur la ilo de propra ekonomia kaj politika potenco, la episkopoj, la alta pastraro, kiu estas por la faŝismo - kaj tiuj, kiuj rigardas al la preĝejo kiel religia institucio. En la komenco de la revolucio la amasoj falegis sur preĝejoj kaj bruligis ilin, ĉar ili vidis en ili la simbolojn kaj la bastionojn de faŝismo. En la komenco ja estis tie, ke la kruco estis la signo de faŝismo. Sed tiu animstato kontraŭ la preĝejo, kiu estas komprenebla, nun tute kvietigis, ĉar oni jam legas en Valencio kaj Barcelono la mesojn.

En tiu milito, la religiaj homoj lernis, reciproke kompronigi kaj komune batali kontraŭ dispotismo, tiranio kaj faŝismo. La Registaro de Hispana Respubliko estas demokrata, respublikana kaj liberala kaj garantias ankaŭ la liberecon al la religio. Al demando kion la Respublikanaj katolikoj supozas de siaj samkredanoj el aliaj landoj, respondis ministro Irujo:

"Nin kompreni! Ili komprenu, ke la faŝista propagando - en Hispanujo koncernas batalon inter Moskvo kaj Romo, inter religio kaj ateismo, estas granda malvero. La Respubliko faras ĉion eblan por la moraleco kaj homa etiko. Ministro Irujo montris koncerne al tio al la traktado de politikaj malliberuloj en la Respubliko kaj ĉe Franco. Lia tuta familio estas de Franco enkarstigita, lia frato estis kondamnita al la morto, alia al longa mullaboro. Lia patrino estis interŝanĝita. Tiel li montris al certaj lokoj, kie la malliberuloj ĉe Franco estas malbone traktataj. Kontraŭe al tio, ĉe la Respubliko estas la traktado de malliberuloj en la spirito de humaneco kaj kompatemo. En unu de ĝi konstruita virinmalliberejotroviĝas la fratino de perfidulo Kieppo de Liano, (kiu dum la vizito de ĉeĥoslovakaj deputitoj diris al ili, ke nenio mankas al ŝi kaj ŝi estas tre bone traktata). Ministro Irujo deklaris ankoraŭfoje, - Respubliko volas fratecon, egalecon, kompatemon kaj amon, la saman volas ankaŭ la religio. Kion kontraŭe al tio faras Franco - aldonis la Ministro - havas nenion komunan kun religio, ankaŭ se li eĉ tre ofte faras la krucon."

Je fino la ministro certigis pri la speciala simpatio de Baska popolo por Ĉeĥoslovakujo. Iliaj sortoj havas multan komunan. En la mondmilito, estis la ĉeĥoj, kiuj esperis al paco por konservi sian patrujon. Hodiaŭ la baskoj perdis sian hejmon kaj atendas al la paco, por ĝin denove rehavi.

---



BOMBOJ SUR BARCELONO'N.

Malmultaj tagoj pasis, kiam Hitler kaj Mussolini deklaris solene al la mondo, esti la veraj garantiantoj de la paco. Se oni sciis en la mondo, kion oni povas supozi de tiuj konataj rezonadoj, tiel staras ja ĉiuj deklaroj en klara kontraŭo al la faktoj de la lastaj tagoj, kiam Barcelona estis plurfoje viktimo de aĉa kaj faŝista barbareco.

Sajnas certe, ke la internaj Berlin'aj "inter kvar okuloj" intertraktoj havis la celon, pri la interkonsento de daŭra, planita kaj regula detruigo en la ariergardo. Estas eble, ke la malsukcesoj en la frontoj instigis ilin pli intensigi la aktivecon en ariergardo, por tiel maniere atingi la demoralizadon de amasoj kaj daŭrigi la krimon de Guernica, Durango kaj Almeria. Krime, kiuj frapas ĉiun kulturon en la vizaĝon. Oni povas bombardi la malfermajn urbojn, oni povas detruigi, oni povas murdi infanojn kaj virinojn, oni povas lasi libere siajn plej malaltajn instinktojn, sed sian celon, la hispanan popolon murdigi kaj subpremi, la faŝismo ne akiros; ĝi kreas al si nur pli da malamiko kaj baldaŭ trovos kontraŭ si la tutan mondon, kiu frue aŭ poste rekonos, kie estas la vera danĝero, kie estas serĉebla la efektiva malamiko de mondopaco.

Barcelona kaj aliaj urboj estas nune preskaŭ ĉiutage bombardataj. La italo-germana faŝismo serĉas siajn celobjektojn nur en la malfermaj urboj, en la partoj, kiuj estas plej dense enloĝataj, kie ne troviĝas nek iu strategia pozicio aŭ soldatoj - koncentriĝo. Preskaŭ ĉiutage la hospitalojn plenigas vunditoj kaj mortoj. Ĉefparte ili estas senkulpaĵaj infanoj kaj virinoj terure kripigitaj kaj vunditaj.

Koncerne al tiu nova krimo, valoras ankoraŭfoje malfermi la okulojn al la demokratio kaj al ili montri -kie kondukas la vojo. Unu fojon pli ni alvokas ĉiujn homojn honestajn; - Haltigu la faŝismon! Montru al ĉiu, tiun malamikon de la homaro kaj detruu ĝin, antaŭ ol estos malfrue - hodiaŭ estas Hispanujo la viktimo, morgaŭ estos Eŭropo, kaj postmorgaŭ la tuta mondo!

---

AL ĈIUJ ESPERANTISTOJ EN MONDO.

La Kontraŭfaŝista Esperanto Komitato de Katalunujo nomis specialan komisionon por pristudadi kaj esplori la problemon de enkonduko de Esperanto kiel devigan fakon en la lernejoj de Katalunujo. Por faciligi la laboron de tiu komisiono, oni petas al ĉiuj, kiuj havas ion da sperto sur la tereno de enkonduko de Esperanto en la lernejoj kaj alian materialon rilatan tiun problemon, por veni al Comissariat de Propaganda de Generalitat de Catalunya, Esperanto - Fako, Barcelona.

Ĉiuj, kiuj povas utiligi la enhavon de niaj bultenoj por la gazetaro kaj propagando-celoj, povas ricevi lin sendante sian adreson.

---

LA JUNULARO ESTAS NIA ESTONTECO.

La Ministrejo de Kulturo de Hispana Respubliko, sciigis antaŭ nelonge kelkajn novajn decidojn, servontajn la edukon de junularo. Unu el tiuj decidoj ebligas la junan hispanan generacion disvolvi sian ĝeneralan edukadon, per envenado en la militlernejoj, alia dispozicio estas eduko por motor- kaj ŝvebflugado kaj falsfirmilsaltado, kiam la tria destino estas por venki la analfabetismon. Per tiuj decidoj la Ministrejo de Kulturo kondukas sian fruktodonan laboron, por envicigi la junularon en nuna kultura vivo en Hispanujo, el kiu en estonteco eliros novaj gvidantoj de la popolo. La kreo de laborlernejoj, la malfermo de universitatoj kaj altaj lernejoj kaj multaj aliaj decidoj estas nur komenco por la disvolvado de tiu kultura programo de Hispana Respubliko.





# GENERALITAT DE CATALUNYA

PRESIDÈNCIA

COMISSARIAT DE PROPAGANDA

Avinguda 14 d'Abril, 442 bis : BARCELONA : Telèfon 82215

## COMUNICAT DE PREMSA

ESPERANTO ELDONO.

№. 24.

Barcelona, 16/X, 1937.

### LA MARTIROJ DE ASTURIO

#### LA GERMANAJ KAJ ITALAJ PILOTOJ DAŬRIGAS EN ASTURIO SIAN BARBARECON DE GUERNICA



Dolores Ibarruri (Pasionaria),  
Deputatino de Asturio.

La tuta faŝista preso klopodas senkomenterie prezenti la lastajn en Asturio kaŭzitaĵojn krimojn de italaj kaj germanaj pilotoj, kiel faritajn de asturiaj ministroj defendatajn sian hejmolandon. Post la barbara detruo de Guernica, ŝi klopodis ŝajnigi al la mondo, ke la respublikanaj trupoj estas en stato plenumi tiujn hontajn agojn, sed de post la eksterordinara indigno kaj flamaĵoj protestoj de la tuta civilizita mondo, ŝajnis ke en servo de Franco estanta faŝista aviado ĉesos sian barbaran detruon de urboj.

Hodiaŭ tamen, koncerne sian maltaŭgecon kaj senpotecon kontraŭ la senhoma heroeo de asturiaj soldatoj, ilia sadismo denove revekis. Ili revenas hodiaŭ denove al la sama rimedo, kiu prenis al ili en Basklando tiel "grandegan" rezulton; ili planite bombardas kaj detruas urbojn kaj vilaĝojn, en kiu troviĝas nenia milita objekto, kaj nur estas enloĝanta de civila loĝantaro, virinoj, infanoj kaj gejunuloj.

Antaŭ kelkaj tagoj troviĝis ankoraŭ Cangas de Onis kilometrojn malantaŭ la lasta linio, kiam la germanaj kaj italaj flugmaŝinoj kovris la malgrandan senŝirman kaj sendefendan urbon kun proksimume 400 bomboj pro kio rezultis la plena detruo, kaj post la uzado de granda kvanto de brulbomboj, tiujn de 250 Kg., la iom florita urbeto prezentas hodiaŭ la fumantan ruinsterkamason, en plena vortsignifo.

Kaj en sia cinismo, same kiel la murdisto forkuras el la loko de sia krimo, la faŝismo ankaŭ sekvas la ŝmon kaj la detruigon de pacaj vilaĝoj kaj urboj en ariergardokulpigas la respublikanan armeon. Same kiel la krimulo klopodas forigi la signojn de sia ago, tiel la internacia faŝismo klopodas forigi kaj gardi sub tiuj senhomaj kruelaĵoj sian senkulon; kruelaĵoj kiuj sole kaj nure povas rompila grandiozan kaj heroan kontraŭstaron de asturianoj. Oni forgesas en la faŝista gazetaro, koncerne iliajn mensogajn komunikojn, nur ion prikalkuli, ke la respublikana armeo konsistas de filoj el la popolo, al kiuj ila hejmourboj estas sanktaj, kies pli granda doloro estas, ke ĉiuj tiuj vilaĝoj kaj urboj, kiam ili denove estos rekonkeritaj, de la faŝistaj hordoj



Nº. 24.

povos esti detruitaj.

La ĉefa komandanto de militfortoj en Nordo, sendis telegramon al la ministro de Defendo rilate la detruon de Cangas de Onis:

...."Tiu armeo decidas nur dum siaj retiroj detruiri nur tion, kio havas ian militistan valoron. Estas konvene, ke la mondo sciu la veron."

Germanoj kaj italoj estas tute indiforentaj kiam koncernas detruon de tio, kio ne estas ilia - kaj neniam estos! Germanoj kaj italoj ebrigas sin kun sango hispana, detruas la hispanan heredaĵon, kiu apartenas al hispana popolo - kaj ĉiam apartenos, la heredaĵo, kiu estas ĝia historio kaj tradicio!

Estas konvene ke la mondo sciu la veron !

---

ASTURIO LUKTAS KONTRAŬ GRANDA FORTSUPereco DE ITALAJ SOLDATOJ - KIO TOLEDO ESTIS POR LA RIBELULOJ, TIO ESTAS ASTURIO POR HISPANA RESPUBLIKO.....

GERZON KREVELD PRI ASTURIO.

La konata nederlanda ĵurnalisto Gerzon Kreveld, disponigis al ni sian artikolon pri Asturio, verkita por sia ĵurnalo en Amsterdamo.

La falo de Bilbao estis decida por Santander. Tiu de Santander por Asturio. Sen kunligo de restode la lojala Hispanujo, nek per tero kaj nek per akvo, Asturio estas elliverata al kvin potencaj faŝistaj kolonoj, motorigitaj kaj antaŭeiritaj de mont - kaj pezartelerio, per tankoj kaj flugmaŝinoj, kiuj per senkontraŭstara premo atakas je ok frontoj.

Ok frontoj, sur peco de tero, de ne cent kilometroj longa kaj larĝa. Ĉe unu flankoregule deŝanĝitaj de fajra linio trupoj, bone nutritaj kaj metitaj en batalon post kiam la flugmaŝinoj kaj aŭtomataj armiloj rompis la malamikan kontraŭstaron; ĉe alia flanko la ministoj kaŝitaj en siaj montoj, nesufiĉe nutritaj, kun manko de armiloj kaj sendefendaj kontraŭ aerbombardoj. Pli facile la faŝistoj ne povas ja plu havi.

Venke ili elmarŝis Santander, laŭlonge de marbordo - sepdek kilometrojn longa, sen renkonti kontraŭstaron. La granda parto de Basko- Santander'aj trupoj estis ĉirkaŭitaj kaj vivis laŭ graco de ribeluloj; la resto en norda forkuro retiris sin inter la asturiaj limoj. Jus, pli ol sepdek kilometroj, ion antaŭ la haveno de Lianes, povis kolonelo Prada, ĉefo de Asturia armeo siajn trupojn sufiĉe organizi por meti ilin en la batalon kontraŭ la faŝista infanterio. Ĉi tie troviĝis la unua kontakto depost la falo de Santander, Lianes falis, Gijon kuŝis inter cent kilometroj, la tuta falo de Asturio ŝajnis afero de 14 tagoj plej eble de tri semajnoj. Poste venos la vico al Aragono aŭ Madrido aŭ Almerio. Antaŭ vintro Franco estus la cezaro hispana. La stranga kalkulo. La malgranda registarfidela insuleto en la nordo estiĝas ĉiutage pli malgranda, sed ne fordonas sin kaj luktas daŭre kun ĉagreniĝo kaj kuraĝo, kiuj malesperigas la malamikon kaj maldensigas ĝiajn vicojn.

Mi parolis kun la aviad- oficiro, kiu dekdu tagojn antaŭe estis teren pafita kun sia bombardaparato kaj kun rompita kruro transportita Valencion. Li estis ĉefo de eskadrono de 24 flugmaŝinoj. Precize la duono postrestis de ĝi aliaj estis malsupren pafigitaj. Sed tiuj postrestintaj, ekflugos, ĝis kiam ili ankaŭ estos forigitaj. Por ĉiu registara aparato estas kvardek faŝistaj; praktike ĉiu registara aparato estas ĉerko, sed sen timo la piloto raras en la maŝinon. Kun la sama rezignacio kaj eĉ kun bonhumoro ili iras al morto, kiam malsupre la ministoj kun iom da dinamito kaj lonto devas batali kontraŭ tankoj kaj kanonoj.

Kun naŭdek tankoj ruligis la ribeluloj la marbordan vojon de Lianes al Ribadesella. La samaj tankoj devojiĝis poste al Cavadonga kaj retrudis la astur-



Nº. 24.


ianojn laŭ rivero Cuera, ĝis post Onis. Kvazaŭ 90 tankoj ne sufiĉus, por doni al infanterio la liberan difiladon, antaŭeniris la nubo de pli ol kvindek flugmaŝinoj, bombardad- kaj ĉas- flugmaŝinoj, kiuj senpune kaj malpli ol cent metroj de alteco, laŭ kordeziro kaj laŭ maniero de ludo ĉasis kun mitrajleroj la registarjn soldatojn. Fine la faŝistoj prenis Onis'on, sed kio falis en iliaj manoj estis ruinoj.

La asturia ministro lernis intertempe manuzi la pafalon, sed li preferas la dinamiton, la lonton kaj la pecon de brulanta cigaredo. Dinamito apartenas al li, kun ĝi li estis edukata, tion li uzis tagon al tago en la minejkoridoroj, per ĝi li eksplodigis la montdeklivojn, tio sonis sendivene de liaj hardigitaj pugnoj. Per dinamito estis 21 el 90 tankoj senutiligitaj laŭlonge de Cuera rivero; ĉiuj tuneloj kaj pontoj, kiuj la retirantaj ministroj lasis malantaŭ si, estis eksplodigitaj.

La trupoj en Asturio deferdas sin ĝis la fino, ĝis la lasta kuglo; poste ili retiras sin. Nepovante plu returnen, tiam ili donas la preferon al la sammortigo, ol la martirmorto, kiu ilin atendas en malliberejoj. Ili ne forgesis la tragediajn lecionojn de Oktobro 1934, kiam ili mem, siaj virinoj kaj infanoj proskripcite estis elliveritaj al la bruta krualeco de "civilgardio" kaj arogantaj pasioj de maŭroj, siatempe metintaj la bruligantan semon kaj organizintaj sangobanojn kaj hombuĉadojn, nun denove ripetitaj. Sur la monto Pena Lanja kuŝis kompanio de 125 homoj. Depost la atakoj kaj kontraŭatakoj postrestis nur 25 viroj, sed la monto restis en la posedo de asturianoj. La sekvantan matenon ili rimarkis esti de ĉiuj flankoj ĉirkaŭitaj, sen ke ia savo estis ebla. Denove atakis la malamiko, ĝis la lasta sekundo kraketis la mitrajlero kaj kiam la malamiko okupis la pinton, li trovis nenion krom la mortoj. Ĉe la mitrajlero kuŝis juna virino. Tiel devas Asturio konduki la batalon.

Tute ne aspektas, ke la bataloj en Asturio antaŭ la fino de Oktobro estos finitaj. Kaj tiam venos la tempo de intensaj pluvoj kaj neĝo malebligas la militoperaciojn. La malamiko jam klopodis nun sekurigi sin, kaj okupi la plej altan montpasejon, kiel tiun de Parajes en la fronto de Leon, kie nebulo kaj neĝo jam

LA NOVA GULLIVERO



EN LA LANDO DE PICMEJOJ.

EN LA LANDO DE GIGANTOJ.



nun malebligas la batalon. Sed la tuta minejĉirkaŭaĵo estas grandega monttarsa lando, en vintro ege malfacile por kontraŭbatali, kaj semigita kun naturaj defendaĵoj. La rapidecon, kiun havis Franco por submeti la Nordon, antaŭ la komenco de la vintro, estas kompreneble logika, sed ŝajnas tamen esti iom antaŭcipa.

Persistos la ministroj ĝis la enfalo de la vintro? Kio koncernas la militistan forton kaj la moralon de la trupoj, tio certe. Sed sur la malgranda peco de tero, de cent ĝis centkvindek kilometrojn, loĝas nuntempe 350.000 enloĝantoj, de kio pli ol kvarono militistoj, kies nutraĵprizorgado unualoke regule devas okazi, dume la haveno Gijon per ribelulŝipoj estas blokita kaj la registarŝiparo konstante estas senforta por rompi tiun blokadon.

Tio estas la problemo de Asturio, kiu povas nur de unu maniero esti solvita, nome per evakuado, sub la gvido de francaj kaj anglaj militŝipoj. Sed ne nur, ke simila evakuado progresas tiel malrapide kaj nur tiel longe ĝis kiam Gijon ne falis, - sed krome la asturianaj virinoj kaj iliaj infanoj ne volas forlasi la landon. Ili volas resti ĉe la flanko de sia edzo kunbatali, kun pafilo aŭ dinamito aŭ mitrajlero - tiel, kiel fronto de Leon konstante okazas ĝis kiam ili falas.

La tuta asturia minejĉirkaŭaĵo, sin mem mobilizis. Viroj, virinoj, knaboj. Ĉe la frontoj oni batalas, la montoj ŝprucas fajron kaj la arbarojn manĝegas la flamoj. Asturio ne ploras, ne de timo kaj nek de indigno. Ĝi luktas kaj traversas sian sangon, sciante ke ĝi iras morti, kune kun la malamiko, kiun ĝi malmas kaj rajtas malami.....

#### LA FRANCO - ARMEO ESTAS NUR POR KONSERVI LA ANALFABETISMON.

Antaŭ kelka tempo aperis en unu el la faŝista parto aperinta gazeto "El Coreo de Andulusia" artikolo perfekte espriminta la mentalecon de hispana faŝismo. La aŭtoro de tiu artikolo kritikas la ĝeneralan edukadon en la skribado kaj legado, ĉe kio li atakas la mankon de publikaj bibliotekoj. Li skribas:

"Pro kio deklari la lecionoj obligitaj, se oni se oni ne donas al la popolo nenion por legi? Aŭ, kio pli terura, oni venenigas ĝin per eta kaj malbonmora literaturo? Pro kio donaci al ni la frakon, se ni ne havas la ŝemizon? Pro kio lernigi al iu ludi la violonon, se li povas vidi la violonon nur en la gazetanonciojn? Do, pro kio, kiel Hispanujo faras, pli ol 50.000 lernejojn prizorgi?"

Kun tio estis prezentita la kultura programo de Franco. Ne la plidivastigo de la popoledukado, sed la dekonstruo de ekzistantaj popollernejoj. Ne la batalo kontraŭ la analfabetismo, sed male ĝia divastigo. Ĉar la popolo ne posedas ŝemizojn, do, ĝi ankaŭ ne lernu legi.....

#### NOVAJ LERNEJOJ EN HISPANUJO.

Dum unu jaro, de Oktobro 1936 ĝis Oktobro 1937, la Registaro, la Registaro de la hispana Respubliko kreis 7.761 lernejojn. Ĝis jaro 1936 estis en tuta Hispanujo 32.359 lernejoj. Krom tio estis malfermitaj en Madrido, Valencio, Barcelono kaj Sabadell kvar novaj laborinstitutoj, en kiuj estas kondukataj tute novaj pedagogsistemoj.

Dum unu jaro de terura milito la Hispana Respubliko, ne nur heroe kontraŭstaris la faŝistan invadon, sed ankaŭ laboris kaj laboras por la edukado kaj



Nº. 24.

kulturo en la lando. Tion do, faŝistoj nomas "ruĝan inferon", pro tiu tiro al libereco kaj kulturo, faŝismo disvolvis barbaran militon sur la paco hispana tero.

---

KATALUNUJO VOLAS ENKONDUKI ESPERANTON KIEL DEVIGAN FAKON  
EN ĈIUJ LERNEJOJ.

La Kontraŭfaŝista Esperanto Komitato de Katalunujo sub la aŭspicioj de la Propaganda Komisarejo de Kataluna Registaro, kreis Komisionon por enkonduki Esperanton en la lernejoj, kiu komisiono, konsistanta el la plej eminentaj esperantistoj el Katalunujo, sin okupas je la prizorgado kaj esplorado de la problemo enkonduki Esperanton en la lernejoj, ĉar evedentiĝis, ke Esperanto, kiel lingvo internacia, okupas jam longe gravan lokon en la kultura internacia movado en la mondo.

Katalunujo, batalanta por sia libereco kaj sendependeco kontraŭ la internacia faŝismo, ricevis kaj ricevas apogon moralan kaj materialan de la tutmonda esperantista movado.

Pro la fakto, ke jam Esperanto estas enkondukita en diversaj lernejoj en diversaj landoj, la kataluna esperantistaro trovas necese nun, spite ke ni troviĝas en la milito, en tuta Katalunujo enkonduki Esperanton, kiel devigan fakon. Ili volas, ke Katalunujo estu unu el la unuaj landoj el la mondo, kiu enkondukis tiun internacian lingvon, la bazon de la estonteco kaj la bazon de la paco.

Ni estas fieraj, ke la Kataluna Registaro kaj la tuta Kataluna popolo apogas tiun altan entreprenon por efektiviĝi en Katalunujo por la unua fojo la idealon de milionoj da esperantistoj en la tuta mondo.

---

KATALUNUJO KAJ SIA PREZIDANTO.

Antaŭ kelka tempo, la Prezidanto de Generalitat de Catalunya, Lluís Companys, donis la deklaron al la preso, kiu esprimis la decidon pri lia ekziĝo kiel Prezidanto.

La motivoj, kiuj inklinis la Prezidanton de Katalunujo, malkaŝe deklari, ke lia mandato finiĝos la venontan Novenbron estas jenaj: Ili koncernas la demandon de rilata artikolo en la konstitucio, laŭ kiu Katalunujo estas regata. Se eĉ la mandato de la Prezidanto finiĝos kun la daŭrovalido de parlamento, ke pro la specialaj ĉirkonstancoj, li tamen restos daŭrigi sian funkcion, tial Prezidanto Companys faros tion opiniante tion konvene kaj konsilidinde, doni la plifaciligoj al la Parlamento, por ke ĝi povu kun absoluta libereco solvi la problemon de postsekvado de prezidanteco en Katalunujo.

La decido de Prezidanto kaŭzis en tuta Katalunujo grandan sensacion. Eĉ en komenco la petoj de liaj pluraj intimaj amikoj ne povis eviti, ke la Prezidanto retiru sian decidon pri la rekandidatiĝo. El tuta Katalunujo, respublikana Hispanujo, demoktataj landoj el Eŭropo kaj eĉ el Ameriko alvenis plurajn telegramoj, instigitajn la Prezidanton Companys resti sur sian postenon.

Kvankam la decidoj de la Prezidanto intertempe alprenis alian karakteron, la tuta preso dediĉis koncerne al tio multajn komentariojn kaj grandajn artikolo-



lojn nomitajn Prezidanton Companys la Prezidanton de Venko. Oni organizis diversajn demonstraciojn, por ŝanĝigi la decidon de Prezidanto, por ke li restu kiel unua magistratoro de Katalunujo.

Jen sekvas la opinioj de la Kataluna preso:

"Treboll" Organo de Unuiĝinta Socialista Partio.

Lluis Companys estas hodiaŭ la viro, kiu plej bone reprezentas la katalunan popolon en la batalon kontraŭ la faŝismo kaj samtempe la malvastan union de nia popolo kun aliaj hispanaj popoloj, tio estas Katalunujo kun la Respubliko. Ni kredas krom tio, ke estas necese, krei ĉiujn kondiĉojn, por ke Lluis Companys, la Prezidanto de ĉiuj Katalunoj, havu ĉiujn rimedojn por sia dispono, kiujebliĝos la efikan plenumon de lia alta funkcio.

"Mañana" sindikalista.

Lluis Companys povas lasi la prezidantecon de Katalunujo, se tio estas lia volo aŭ la statutoj de konstitucio tiel destinas, sed ne pro ia politika premo. La popolo elektis lin kaj nur la popolo povas repreni al li la konfidon.

"La Publicitat" liberala.

Ni ne scias, ĉu la decido de la Prezidanto pro kaŭzoj starantaj ekster la politiko kataluna estas seĝeblaj, kaj influataj. Sed ni scias, same kiel ni jam diris ĉe aliaj okazaĵoj, ke la sola ebla politiko en la rilatoj inter la Registaro de Respubliko kaj Generalitat estas de amika kaj aktiva kunlaborado. Kaj ni scias, ke la plej malgranda neestimo kaj malŝato kontraŭ la Registaro de Katalunujo, signifos la nekalkuleblan eraron kaj por la kontraŭfaŝista afero ĝenananta pozicio.

"El Dia Grafico" respublikana.

Ĝi estas la Popola Fronto de la tuta Hispanujo, tio estas la partioj kaj organizoj, kiuj formas la kontraŭfaŝistan blokon kaj ĝia tasko estas, ĝin daŭre teni kaj la malvastan solidarecon inter tiuj, kiuj en la fronto kaj ariergardo batalas por la triumfo de la Respubliko kaj libereco. Lluis Companys, la Prezidanto kaj la venkinto de 18<sup>a</sup> de Julio, devas ankaŭ esti la Prezidanto, kiam sonos la venko de la Popolarmeo.



"Catalunya" Organo de anarĥista sindikato; CNT.

Justeco en ĉio kaj por ĉiuj ni rekonas la altan moralan aŭtoritaton de Lluis Companys kaj deklaras, ke lia personeco estas la plej bona unuig membro de kontraŭfaŝistaj fortoj en Katalunujo. Neniu, kiu ajn li povas esti, tiel kiel li la centra punkto de ĉies rekono, kiuj hodiaŭ batalas kontraŭ la malamiko de Hispanujo. Tiu vero estas al ĉiu konata kaj multaj ripetis malkaŝe; tiu fakto devigas hodiaŭ tion, la decidon de Companys klopodi influigi, por ke li retiru siajn proprajn dezirojn kaj se eble la intencojn de triaj, ankaŭ rifuzi.

"La Humanitat" maldekstre respublikana.

Lluis Companys neniam devojiĝis antaŭ la malfacilaĵoj kaj neniam ŝparis la streĉon de ĉiuj fortoj kaj nek oferojn, kiam koncernis la patrujon la pacon kaj la liberecon. Ni estas certaj, ke Companys hodiaŭ kaj ĉiam restos fidela por siaj bazaj konvinkoj, kiujn li sekvis dum sia tuta vivo. Nia fido en li ne malfortigos kaj ankaŭ la kataluna popolo daŭre sincere tenos lian konfidon. La tuta Katalunujo estas kun konvinkaj, ke Companys, kiel hodiaŭ, hieraŭ aŭ morgaŭ, ĉiam pensas pri la libereco de Katalunujo kaj ĉiuj.







C  
143

"Dedico mi homenaje a un héroe desconocido :  
LA MADRE ESPAÑOLA".

Estas palabras pronunciadas por el Presidente Companys desde la Radio de Madrid habían de recibir esta confirmación unos días después. La aviación fascista, en efecto, bombardeaba la ciudad obrera de Lérida situada a 150 km. del frente. 243 muertos, entre los cuales hay 82 niños.

"Dedico el meu sentit homenatge a un heroi desconegut:  
LA MARE ESPAÑOLA".

Aquestes paraules pronunciades pel President Companys des de la Ràdio de Madrid havien de rebre aquesta confirmació uns dies després. L'aviació feixista, en efecte, bombardejava la ciutat obrera de Lleida situada a 150 km. del front. 243 morts, d'entre els quals 82 infants.

"Je dédie mon hommage ému a un héros inconnu:  
LA MERE ESPAGNOLE".

A dit le Président Companys, lors de l'allocution que, tout récemment, il adresse par radio, de Madrid, au peuple espagnol. La signification douloureuse de ces mots l'est davantage aujourd'hui. L'aviation fasciste vient de bombarder la ville ouverte de Lérida, située à 150 kilomètres du front, faisant 243 morts, parmi lesquels 82 enfants, ensevelis sous les ruines de l'école où ils étaient en classe, et plus 700 blessés.

"I wish to pay homage to an unknown heroine:  
THE SPANISH MOTHER

These words of President Companys, spoken over the radio from Madrid, were to take on full significance a few days later. The fascist aviation bombarded the open city of Lérida, situated 150 kilometers the front. 243 dead, among them 82 children.

"Es gibt einen unbekanntem Helden, dem ich meine höchste Achtung zolle den ich ehre:  
DIE SPANISCHE MUTTER".

Diese vom Präsidenten Companys vor dem Mikrophon in Madrid gesprochenen Worte sollten einige Tage später ihren besonderen Sinn erhalten. Faschistische Flugzeuge bombardierten die 150 Kilometer hinter der Front liegende Arbeiterstadt Lérida. 243 Tote, unter denen 82 Kilderleichen gezählt worden sind, sind die Bilanz dieser neuen Untat deutscher und italienischer Flugzeuge.

"Jag vill härmed framföra min djupt kända vördnad för en okänd hjälte:  
MODER SPANIEN".

Dessa ord, vilka president Companys uttalade inför radionutsändaren i Madrid, skulle några få dagar senare erhålla följande svar: Fascisterna bombarderade arbetarkvarteren i Lérida, vilken stad är belägen 15 mil fran fronten. Resultat: 240 dölade, bland vilka 82 barn.

"Mi dediĉas mian sentan honorigon al iu heroo nekonata:  
LA PATRINO HISPANA

Tiujn vortojn diris la Prezidanto Companys pere de la radio Madrid kaj kelkajn tagojn poste ili ricevis sian konfirmon. La faŝista aviado, efektive, bombardis la malfermitan urbon Lérida kuŝanta 150 km. malproksime de la fronto: 243 mortoj inter kiuj 82 infanoj.





# GENERALITAT DE CATALUNYA

PRESIDÈNCIA

COMISSARIAT DE PROPAGANDA

Avinguda 14 d'Abril, 442 bis : BARCELONA : Telèfon 82215

## COMUNICAT DE PREMSA

ESPERANTO ELDONO.

Nº. 25.

Barcelona, 31/X, 1937.

### LA TRANSLOĜIGO DE LA REGISTRARO AL BARCELONO .



D-ro JUAN NEGRIN,  
LA CEFO DE HISPANA  
REGISTARO.

Post multaj onidiroj en la eksterlanda gazetaro pri la transloĝigo de la Registaro el Valencio al Barcelono, estis per la oficiala komuniko, publikita la 31-an de Oktobro pasinta, komentariita la transloĝigo de la Registaro.

En ministrara deklaro estis montrita, ke jam la antaŭa Registaro havis la planon elekti la Katalunan ĉefurbon por siaj kunsidoj, la plano, kiu nun pro la praktikaj kazoj estas realigita. La ekonomiaj kaj praktikaj necesoj, pro kiuj estis konsilinde jam en la unuaj tagoj de ribelo transloĝigi al Barcelono, aperas nun kunligite kun la prestiĝo, kiun tiu urbo ricevas kiel koro de Mediteraneo. Oni ne povas forgesi, ke eble la plej grava momento en tiu milito estas la ekvilibra partiĝo je maro, pro kio turnitaj estas la rigardoj al la tuta respublikana Mediteranea marbordo. Barcelono estas krom tio, sendube la plej grava haveno kaj komercloko de tuta marbordo kaj ĉefe posedas la gravegan industrion, kiu povas multe pli esti elprofitita por la milito, ol ĝis nun, kaj estos.

Kiel la noto de la Registaro komentarias, la publika opinio de Hispanujo kaj de eksterlando trovas el tiuj motivoj la konsekventan agon: Katalunujo havos denove okazon montri sian fiksan volon kaj diligenton en tiu liberecbatalo kontraŭ la ribeluloj kaj la eksterlandaj enruduloj. La aktualaj ĉirkonstancoj, la postuloj de la milito por akiri la venkon instigas la Registaron, pli profundigi la amikajn sentojn kaj interrilatojn kun la Generalitat de Catalunya.

La Prezidanto de Kataluna Registaro, Lluís Companys, publikigis koncerne al tio la noton, en kiu unualoke estas montrate la bonvenon en la nomo de la tuta Katalunujo. Plue, ke la cititaj deklaroj ne nur pro la samaj interesoj rilate al la Registaro de la Respubliko, sed kiel esprimo de spirigita hispana solidareco kontraŭ la eksterlanda invado. Ĝi validas la idealon de libereco, defendi antaŭ la mondo la justecon kaj rajton, kiuj nin devigas, al ni altruditan militon prizorgi kaj por konservi la longdaŭran pacon, por morgaŭ, venki.

Koncerne al la oficiala komunikoratifikas Katalunujo sian senkondiĉan adheron por la Registaro de la Respubliko, por sia Prezidanto kaj Prezidanto de Respubliko kaj salutas per frataj sentoj ĉiujn frontojn de respublikana Hispanujo. La ĉesto de la Registaro en Katalunujo, estos nova instigo por la energio de nia popolo, kiu trovas sian plej grandan agadon en la disvolvo de siaj civitanaĵoj sur la nivelo de grandaj devoj de nunaj ĉirkonstancoj kaj en la rekono kaj observado de al ni donata direktlinio, kies unua kaj plej



Nº. 25.

grava problemo estas venki la militon.

### PAROLADO ELDIRITA DE PREZIDANTO COMPANYS.

Profitante la ĉirkonstancon de la politika parolado, kiun S-ro Negrin estis anoncinta, tre plaĉas al mi elparoli kelkajn vortojn de saluto al la Madrida popolo kaj al ĉiuj hispanoj por sendi al ili la puran, fratan kaj emocionan ĉirkaŭpremon de la kataluna popolo.

Via lojaleco, madridanoj kaj hispanoj ĉiuj, meritigas al vi speciale la sincerecon kaj klarecon en esprimo kaj en la konduto kaj se iun titolon havas la elmontroj de simpatio per kiuj vi min honoris, ĝi devas esti dank al tio, ĉar mi ne havas alian meriton -, ke mi neniam kasis mian penson kaj mi ĉiam parolis egalan lingvaĵon tie ĉi, kiel en Katalunujo, afero, kiu ne okazis antaŭ tempe kun aliaj eksponentoj de nia tero, reprezentantoj de la politikaj interesoj tie laŭ unu maniero, dum en la ĝenerala hispana politiko ili sin dediĉis al la kulturado de klientaroj de la plej, prostituita kondiĉo. Kaj kompreneble, ĉiun ĉi tiun sinjoron ni havas kontraŭ ni, dum ni havas apud ni la katalunujojn de la 14<sup>a</sup> de Aprilo - Hispanujo stare -, de la 6<sup>a</sup> de Oktobro - Asturio kaj Katalunujo, - kaj de la 18<sup>a</sup> de Julio, en horoj tre profundaj, kiel kulminacio de historia proceso - pordo kaj fenestro malfermitaj al nova estonteco - tiun tutan Hispanujon, la veran la aŭtentikan, la solan, tiun de la Konstitucio kaj de la Statuto, kiuj konsekvis la aŭtonomion envoĵigante la antikvajn diferencojn, kiuj trovis leĝan irejon kaj kristaliĝis kun fundamenta lego neatekebla.

Ni iras nun unuigintaj kaj miksitaĵoj en la gloro kaj doloro en ĉiujn frontojn kaj ni aspiras konkuri je abnegacio kaj kuraĝo kun la cetero el la Respubliko en la sankta kaŭzo de la sendependeco teretoria kaj spirita de Hispanujo.

Nun ni havas ĉiujn tiujn kontraŭ ni. Estas kontraŭ ni tiuj, kiuj pretendis monopoligi la patriotan senton per malŝatindaj topikoj tra la politiko senkvita de rampema monarĥio, kiu staris ĉe la abismorando de nia malapero kiel sendependa nacio kaj kiu kondukis nin al la honteruĝa kondiĉo antaŭ la civilizita mondo. Tio okazis tie ĉi; kaj tie, en nia popolo, ili uzis la senmakulan nomon de Katalunujo kaj la energion de ĝia personeco - jam historia - por ludi kun la idealoj je profito de siaj privilegioj de kasto kaj siaj politikaj reagaĉadoj. Tiuj estas unuigintaj kaj miksitaĵoj kun tiuj, kiuj diras "supren Hispanujo". "Supren Hispanujo". Sed ili ne ĝin sentas, nek konas, nek povas ĝin legi, ĉar ili metis sur sian teron la plumbanpezon de miloj kaj miloj da fremdaj soldatoj.

Tie ĉi, ĉiuj, katalunoj, kastiloj, asturoj, baskoj, anduluzianoj, galicianoj. Ĉiuj hispanoj batalantaj por la sankta kaŭzo de la sendependeco de la patrujo, por ĝin igi libera unue el la fremda invado, kaj poste libera en reĝimo de libereco de la homoj kaj de la popoloj ĝin formantaj kaj honorigantaj.

Niaj malamikoj portas sur la frunto la signon de la malvenko, kiel historian fatalon. Jen estas nia fido. Sed kun la fido ni devas havi la realecon plenegan de espero, ke nia antaŭenpuŝo ne nur nemalsukcesos, sed ke ĝi estos de alta efikeco sub inteligenta direktado. Ni disponas jam de potenca armeo dotita de la necesaj rimedoj kaj posedanta moralon, kiun nin kortuŝas kaj fierigas. Ni venkos ilin!

Saluton, soldatoj de la hispana armeo, karno de la popolo, armita brako de la Libereco! Saluton al ĉiuj je la nomo de la Katalunujo! Kaj tio, kio gravas ankaŭ, estas ke la vivo kaj la oferoj ne transiru tion, kio trudas al ni la ĉirkonstancoj kaj la devo. Kaj por ili ni devas ne malatenti la ariergardon, plifortigante ĝiajn virtojn kaj estingante la diskutojn kaj malkonsentojn, tiel



Nº. 25.

ke la paroloj eliranta el la lipoj estu havataj en la koro kaj traktataj en la konduto. Nur ekzistas unu vojo por atingi la pacon: Gajni la militon ! Nur ekzistas unu rimedo malaperigi kun digneco, kiel homoj sentantaj kun la plej alta spiritualeco la kaŭzon de ili defendata, la malkonsentojn, kiuj povis ekzisti, kaj ĝi estas la unuiĝo, kunfandiĝante laŭ la intenseco, laŭ kiu devas kunfandiĝi la homoj donantaj sian sangojn por la komuna kaŭzo de ili defendata. Ni venkos ! Kaj ni devas venki baldaŭ, por nin dediĉi al la tasko rekonstrui Hispanujon kun la tuta brileco de ĝiaj mirindaj nuancoj kaj levi grandan komunan idealon en la aspiroj kaj en la momentoj de la paco post la venko.

Kaj nun mia oferado de hodiaŭ, ne al Madrido, kiu tiom ĝi meritas pro sia nesuperebla heroeco; ne al Euzkadi, la martira; ne al la Asturio, kies nomon ni eldiras kun intensa emocio. Unu oferon al ĉiuj en la simbolo de sanktigita virino; la patrino de la heroo! Jes: La anonima virino, liu sciis doni sian filon; la nekonitan soldaton, kiu falis kaj mortis ĉe la batalfronto; la virino, kiu kiel frukton de sia amo, ĵetis sur la teron pecon de sia animo, kiu falis en la profundan sulkon de la tero, kiel semo de karno surverŝita per sango kaj larmoj, kiu devas fruktiĝi en la longa kaj konstanta penado de la homaro, por ke la suno lumigu ĉiujn en socio pli justa, en ekzistado pli bela. Tiu virino jam ne ploras. Sekiĝis al ŝi la larmoj kaj ŝia korpo rektiĝis fiera pro sia filo.

Hispanoj, al la venko! Kaj al la baldaŭa venko!  
Vivu la Libereco!

(La parolado eldirita de Prezidanto Companys pere la radio de Madrid, dum sia vizito en la Hispana ĉefurbo).

#### LA ROLO DE KATALUNUJO EN LA EŬROPA EKVILIBRO



PREZIDANTO DE KATALUNUJO, LLUIS COMPANYS - JOVER.

Katalunujo ludas gravegan rolon en tiu ĉi batalo, kiun Iberio subtenas kontraŭ la invadanta internacia faŝismo. Ne nur el la vidpunkto de ĝia alporto de homoj, materialoj kaj oferoj, al la kaŭzo, kiu estas al ni komuna kun la aliaj frataj popoloj, sed ankaŭ pro ĝia geografia kaj strategia pozicio, rilate al la disvastiĝo de la milito kaj al la sekureco de aliaj Eŭropaj landoj, speciale Francujo.

Unu el la ĉefaj punktoj de ĉi tiu sekureco de Francujo, estas la Pirinea landlimo. Oni bone scias, ke germanoj kaj italoj, krom la superrego super Hispanujo kaj la profitado de ĝiaj riĉaĵoj el la tero kaj subtero, ili volas krei en Francujo novan fronton, per kiu ili minacus ĝin el tri malsamaj lokoj samtempe. Oriente Germanujo, sudoriente Italujo, kaj sude la konglomerato itala - germana naskita sub la fikcio de unu eks - generalo Franko agante kiel malhonesta kaŝanto.

Nu, el la sescent sepdek sep kilometroj de landlimo hispana - franca, de Hendaya ĝis Port-Bou, kvarcet sepdek du kilometroj apartenas al la teritorio de la Kataluna Registaro entenante la konkeritan parton de Aragono, kaj nur ducent dek kvin kilometroj staras sub la regado de italoj kaj germanoj. Tio faras, ke la fronto, kiu devas defendi Francujo okaze de eŭropa streĉeco, en okazo de delikata situacio, estas multe pli malgranda, ol se Franco kun siaj germanoj, italoj, portugaloj kaj marokanoj disponas pri la tuta Pirinea montaro.

Se de la flanko de tero Katalunujo ludas gravan rolon en la sekureco de Francujo, ankaŭ en la mara aspekto havas grandan gravecon nia situacio. El la



1570 km. da marbordo, kiun en la Mediteraneo havas la duoninsulo, de Gibralta-ro ĝis la franca limo, nur ducent dek estas sub la regado de Franko kaj ĝia fa-ŝista konglomerato, kaj la ceteraj 1.360 km. troviĝas sub la direktado de la Respubliko. El ĉi tiuj, la kvindek procentoj, tio estas 780 km. apartenas al tero de kataluna lingvo; Katalunujo kaj Valencio. Krom tio oni devas ankaŭ kon-sideri, ke la Bolearaj insuloj - kiu estas unu el la plej gravaj por la inter-naciaj rilatoj kaj la eŭropa paco - estas ankaŭ teroj de kataluna lingvo. Dum tiuj marbordoĵ staras sub la povo de Katalunujo, tio estas, de la Respubliko, Francujo havos sekura la trafikon inter Metropolo kaj ĝiaj kolonioj, sed ĝi ĉe-sos havi ĝin en la momento- neverŝajne - se tiuj marbordoĵ estus regataj de la malamikoĵ de la paco kaj de la demokrateco, kiuj estas la malamikoĵ de Francu-jo.

Katalunujo, do, pro ĝia kondiĉo kaj situacio geografia kaj strategia for-mas la sudan antaŭgardon de la franca landlimo kaj Francujo aliflanke scias, ke nia popolo, amanto de la paco, kiu faras la militon por atingi la pacon, estis ĉiam kaj daŭre estos najbaro amika kaj fidela al la ideoj de demokrateco kaj progreso, kiuj formas la senton de Francujo.

Rilate al la situacio de Katalunujo ni memoru, ke je la fino de la milito Winston Churchill diris, ke la orienta landlimo de Anglujo estas la Rejno; oni devas pripensi, tamen, ke unu la Ebro povas estila suda Rejno kaj fariĝi unu el la landlimoj de Francujo kaj, sekve, de Granda Britujo.

#### PASIONARIA PRI ASTURIO.

##### ASTURIO POVAS ESTI DETRUITA SED NE VENKITA.

Doloraj estas nunaj tagoj, krutaj, malfacilaj, kiuj taŭgas por pruvi la spi-ritan forton de ĉiuj.

Asturio suferas hodiaŭ, tiel suferis hieraŭ aliaj urboj la brutajn premojn de invadantaj armeojn, kiuj volas sklavigi nian popolon. Niaj pugnoj leviĝas kun doloro, sed ni ne sentas malfortigita nian animon, ne ŝanceliĝis nia fido pri la definitiva venko.

Alten la animo, kameradoj! amikoj! Spite ĉiuj perdoj, ni venkos.

Ne estas ĉi tiu aserto la nepensita esprimo de senbaza konvinko, ĝi estas nur konfida je la rajto kaj justeco de nia celo, de la celo pri kiu la popolo laboras, luktas kaj kiun ĝi montras kun fervoro kaj spirito de admirinda ofero, sed la senkontraŭstara aserto de sekureco kaj konfido pri la triumfo, ĉar ekza-menante trankvile kaj profunde la negativajn kaj pozitivajn flankojn de la mili-to, ĉi tiuj superas al la aliaj favore al ni.

La hezitimuloj, la malkuraĝuloj, tiuj, kiuj ne havas sufiĉan kapablecon por sin oferi, tiuj, kiuj pensis ke en en iu ajn milito ĉio devas esti venkoj, dubas malesperas, dissendas malkuraĝigantaj onidirojn, reflektan de sia propra timo. Sed spite ĉio, ni venkos!...

Gijon estis detruita pro la neebleco de ĝia konkero, kiel estis Eibar, kiel estis Gurnika, kiel estis Cangas de Onis, en Asturio kies heroeco hieraŭa, kiel hodiaŭa plenigas paĝon de gloro en la historio de nia nevenkita kaj senmorta po-polo.

Sed la batalo ne finis en Asturio; oni detruis ĝiajn plej bonajn vilaĝojn, ĝian plej belan urbon; oni mitrajlis ĝiajn virinojn kaj infanojn; falis legioj de bravaj batalantoj kiuj konfirmis per sia sango kaj ofero sian fortan interkon-senton al la celo de la popolo.

En Asturio la batalo eterniĝos per tiaj karakteroj, ke eĉ la mortintoj le-viĝos de siaj tomboj por rigardi la agojn de heroeco de la ministroj, de la kam-paranoj de la laboristoj ĉiuj, de la herooj batalantoj, kiuj ne volis sin subme-ti, kiuj batalante direktas sin al la montaroj de la mineja distrikto kie ili





scias vendi siajn vivojn je tia kosto, ke la mondo ekstremos de teruro, kaj kio ebligos ke estu en Asturio, en tiu Asturio, kiu honorigas Hispanujon, kiu honorigas ĉiujn, kiuj en la mondo laboras kaj luktas por la rajtoj de la popolo, la loko, kie komencos la rekonkero de nia patrujo por la libereco kaj la justeco.

Asturio ne estis venkita, ĝia heroa rezistado, ĝia ega lukto estas la plej evidenta kaj glora elmontrado, ke la respublikana Hispanujo, tiu Hispanujo, kiu deziras por sia popola loĝantaro liberecon, laboron kaj bonstaton, ne estos subpremata, ne estos nuligata.....

Asturio! diras niaj soldatoj el oriento, mementante en la elparolo la tutan senton, kiu produktas la ofero de tiu mirinda popolo.

Asturio! Krias levigante la herooj de Madrid kaj en sia krio oni eksentas la promeson sigelitan kun sango daŭrigi la batalon ĝis la venko, helpi al siaj fratoj de heroeo kiu en Asturio tenas sur muloj da mortintoj la neatingeblan flagon de la Respubliko kaj de la Libereco.

Asturio! oni elparolas en la frontoj de la sudo. Kaj la ekzemplo de Asturio, gvidilo de niaj batalantoj, estos la instigilo, kiu puŝos al la viroj kaj virinoj de Hispanujo al la plej grandaj

oferoj por atingi la venkon, por detrui la faŝismon. Ni venkos! Ni venkos!  
Ni venkos! diras ankaŭ la ĉefo de la Registaro en sia bela parolado. Ni venkos! respondas je unu sola tono miliono da voĉoj el la tuta kontraŭfaŝista Hispanujo.

Sed, por atingi la venkon, por venki, estas necese vivi la militon, estas urĝa devigi novan militan ordon.

La ĉefo de Registaro petis, - direktante sian peton al la koro de la Respubliko, el Madrido- nevenkebla- disciplinon, oferon, ordon. Ni ankoraŭ unufoje plu, respondas: Ĉiam pretaj. Disciplino, jes, oferoj, jes, Ordo, jes. Unueco, jes.

Kontraŭ la reakciaj fortoj, la popolo kun instinkto de konservado, kiu ne ĝin trompis, kreis la organon de la venko, la Popolan Fronton. La Popola Fronto kiu en Februaro 1936, kiam la reakciaj fortoj sin kredis plej firmaj kaj sekuraj, povis kaŭzi al ili la unuan malvenkon. La Popola Fronto, kiu spite ĉiuj malfacilaĵoj permesis al ni daŭrigi la batalon ĝis ĉi tiuj momentoj.

Kaj hodiaŭ pli ol iam, kiam la militaj bezonoj devigas la kunigon en la fronto kaj ariergardo, ni redonas nian fidon al la efiko de la Popola Fronto kaj alvokas kun deziroj de koreco, de profunda fido, de plena sekureco je la venko de nia kaŭzo al ĉiuj kontraŭfaŝistoj por refortigi, por revivigi per sia helpo, por plifortigi la Popolan Fronton, en kiu la Registaro havas sian plej grandan helpon, la plej grandan apogon.

Por Asturio kaj por Hispanujo! Por la Libereco de nia popolo por la Sendependeco de nia patrujo, hodiaŭ pli ol iam Popola Fronto, sub kies flagoj ĉiuj kontraŭfaŝistaj fortoj unuigitaj per unu sola celo konscia kaj disciplinita marŝos deciditaj al konkero de la triumfo al la forpelado de la faŝismo.

#### EL LA RIBELULA KAMPO.

Pola ĵurnalisto, kiu faras informadon en la ribelula kampo, skribis en sia ĵurnalo: "Kion ni diros pri Kieĵpo de Liano, pri liaj lsercaj diroj, kiam la tero brulas, kiam la frato murdas la fraton? Mortabomena, deca al idioto, sed ne al soldato".

Tiel kvalifikas ilin iliaj amikoj kaj simpatiantoj.



MISTEROJ DE INTERNACIA POLITIKO.

OPINIO DE EMINENTA ESPERANTISTO, KOLONELO FERNANDO REDONDO .

Antaŭ dek kvin jaroj okazis en Italujo faŝista ribelo gvidata de Mussolini kaj, eble, kun la konsento de la reĝo tiea. Post malmultaj tagoj la ribelintoj triumfis sen fremda helpo. Tio pruvas, ke ja ekzistas en Italujo faŝista medio.

En 1926 en Portugalujo ankaŭ okazis faŝista ribelo, kiu ankaŭ triumfis sen fremda helpo kaj ankoraŭ daŭras.

Same okazas en Germanujo, respubliko kun la titolo "Reich" (imperio). Ili ne bezonis la fremdan helpon por triumfi. La balotado pruvis sufiĉe la faŝistan medion.

En 1923 triumfis en Hispanujo surprize militista ribelo kun la konsento de la reĝo. Iom post iom la diktatoro estis tiel kontraŭstarata, ke la reĝo demisiigis lin por sin savi, sed malgraŭ tio, la monarĥia reĝimo falis por ĉiam. Faŝista ribelo okazis en 1936, sed malgraŭ fremda helpo de maŭroj, italoj, portugaloj kaj germanoj (japonoj ankoraŭ ne venis) kaj post dekkvinmonata batalado, ili ne triumfas. Tio pruvas, ke ĉe ni ne estas faŝista medio.

Tamen la "demokrataj" Francujo kaj Anglujo plipreferas vendi siajn armilojn al Italujo, Germanujo, Portugalujo, maŭroj kaj ceteraj civilizitoj por ke ili ataku, ol al ni por ke ni defendu nin. Almenaŭ ne estas malpermesite tiuspeca komerco kun ŝtatoj kie la veraĵ demokratoj estas subpremataj kaj eĉ mortigataj.

Misteroj de la internacia politiko!

Ĉu la internaciuloj ne povas postuli sankciojn por tiuj politikistoj ?

KION DECIDIS LA NACIA KONFERENCO DE KONTRAŬFASISTAJ VIRINOJ EN BARCELONO .

- 1) Atentigi la Registaron kaj la Sindikatojn pri la neceseco, de fordecido de okhora labortago kaj la anglajn Sabatojn.
- 2) La peto al la Ministro de Defenso por atingi la envicigon de virinoj en la militindustrio kaj aliaj laboroj.
- 3) la aranĝado de kolektivaj manĝejoj kaj kreo de infanludlokoj kaj infangardenoj ĉe fabrikoj.
- 4) La tuja kreo de kapableclernejoj.
- 5) Egalaj salajroj por egalaj laboroj.
- 6) La kandidatigo de virinoj kiel urbkonsilantinoj.
- 7) Defendo por la laborantaj patrinoj.
- 8) La kreo de lernejoj kontraŭ la analfabetismo.
- 9) La aranĝo de agrikulturaj lernejoj.

COMPANYS RESTAS PREZIDANTO DE KATALUNUJO .

Lluís Companys, Prezidanto de Generalitat de Catalunya, kies mandato finigas en Novembro proksima, esprimis sian deziron ne plu kandidatiĝi al Prezidanto. Tamen la intertraktoj, kiuj Companys havis en Madrido kun D-ro Negrin, konvinkis lin, ke lia ĉeesto en la gvidado de Generalitat estas necesa por plifortigi la lojalecon inter Katalunujo kaj la Centra Registaro. En la lasta kunveno de Generalitat oni decidis, ke la Kataluna Parlamento kunvenos inter 15<sup>a</sup> kaj 20<sup>a</sup> de Novembro pro denova elekto de Companys. La politikaj rondoj en Katalunujo estas konvinkitaj, ke Companys estos unuanime reelektita.





# GENERALITAT DE CATALUNYA

PRESIDENCIA

COMISSARIAT DE PROPAGANDA

Avinguda 14 d'Abril, 442 bis : BARCELONA : Telèfon 82215

## COMUNICAT DE PREMSA

ESPERANTO - ELDONO.

Nº. 27.

Barcelona, 2/XII, 1937.

### LA MILITA SITUACIO KAJ LA VENONTA OFENSIVO.



Jam de kelkaj semajnoj oni povas legi en la eksterlanda gazetaro la alarmajn komunikojn pri la granda ofensivo, kiun preparas Franco. Tiuj komunikoj estas ofte akompanataj kun longa vico de mensogoj kaj propagando, kaj povas servi nur al la konkludo, ke spite la tutan ŝajnon, ne estas ankoraŭ certa, ĉu liaj militaj fortoj, kiujn li disponigas, sufiĉas atingi la deziratan venkon.

Laŭ nuna situacio, laŭ la milita vidpunkto, ne aspektas tiel, kiel diskonigas la faŝista radio-stacio kaj faŝista gazetaro. Estas sendube, ke Franco preparas de longa tempo avizitan ofensivon post la falo de Gijon. Unu monato pasis, de tempo kiam en Saragoso per elparolita parolado estis deklarita, ke la rekonkero de Aragono estas nur demando de kelkaj tagoj, kaj la detoniĝo de kanonoj, kiu estas bone aŭdebla en la Aragona ĉefurbo, estos por ĉiam silentigita.

Post tio jam pasis 4 semajnoj. Pasis jam Novembro, tempo en kiu la militaj operacioj je granda skalo povas esti farataj, sed nun jam estas Decembro kaj la malvarmo kaj la neĝo en la montoj nebligas jam tiuj operacioj. Se la faŝistoj vere estas tiel fortaj, kiel ili sin prezentas, kaj kiam estos tiel facile, ekvenki la finbatalon, kial do ili perdis post la falo de Gijon tiom da multekosta tempo? Sen komenci iun ajn operacion, la faŝistoj laŭ perfekta Goebbels'a sistemo jam ekfanfaronis kaj mensogis laŭ pove. Estas ankaŭ eble, ke Franco volis tiun tempon elprofiti atendente al nova helpe de Germanujo kaj Italujo?

En neniu fronto, nek en Orienta, nek Centra, nek en Suda la invaduloj kaj la ribeluloj havas la grandajn facilajojn, kiel ili havis en Nordo. En la proksimaj bataloj la kvanto de soldatoj povas esti en ambaŭ flankoj egalaj. Franco disponas pri gravaj kvantoj de militmaterialo, sed la respublikanoj ankaŭ ne preterlasis la tempon senprofite kaj posedas hodiaŭ ankaŭ ĉion necesan. La rebelula aviado povas laŭ kvanto esti pli granda, sed pro tio la respublikana morale kaj spirite multe superigas la faŝistan. Kaj cetero la respublikana artilerio scipovas ankaŭ dece respondi al la faŝistaj kanonoj.

Ankoraŭ la grava faktoro por prijuĝi la situacion: Konstante pli forta kontraŭstaro en la ariergardo de Franco, kvankam la faŝista preso prisilentas tion, sed tamen faktoro de grandioza valoro, kion atestas centoj da forkurintoj el ĉiuj sektoroj de la fronto.

- La respublikana armeo estas disciplinita kaj bone organizita, forta en



homoj kaj militmaterialo; krome la moralo de respublikanoj estas altvalora, ĉar ili scias, ke ili batalas por la libereco de Hispanujo, subtenataj de la propra ariergardo, kiu konas nur unu celon; venki la faŝismon. Tiel armita, la respublikana armeo atendas trankvile la ofensivon de Franco - kiu renkontos la kontraŭstaron, kaj spite la helpon de germano-itala faŝismo - devas malvenki.

#### LA KREO DE NOVAJ KURSOJ POR LA MILITA EDUKADO EN KATALUNUJO.

La ĝenerala sekretario de Komitato de Militista Edukado en Katalunujo, esprimis sian kontentecon pri la kunlaboro de Ministerjo de Defendo por kreado de milita edukado por la junularo.

En Katalunujo ekzistas nun 80 lokoj por la simila edukado. En Pins de Valles ekzistas kampo de 2000 kursanojkaj aliaj simila kampoj estas en konstruo. Tiuj kampoj ebligas al 40.000 junuloj doni la militan edukon kaj instruon. Tiuj aranĝoj elvokis grandan entuziasmon ĉa la Kataluna Junularo, ĉar rezultis, ke 99 % de rekrutoj konsistas el libervoluloj. Katalunujo, kiu havas nun du cent mil virojn en la fronto povas nun ankaŭ krei novan rezervon de junuloj inter 18 kaj 19 jaraĝaj.

#### FRANCO TROMPAS BASKAJN INFANOJN .

El 250 Baskaj rifuĝintaj infanoj, kiuj laŭ deziro de Franco kaj altrudita postulo de ĝiaj gepatroj, estis resenditaj el Anglujo al San Sebastian, estis nur 200 akceptitaj de siaj familianoj. Estis klare rimarkeble, ke multaj familioj deziris, ke la infanoj restu en Anglujo. Kvindek infanoj, kies reveno Al Baskolando, estis laŭ ŝajne postulate de iliaj familioj, estis metitaj en ia edukdomoj, ĉer iliaj gepatroj estis mortitaj aŭ rifuĝitaj en la respublika teritorio.

#### KATALUNA REGISTRARO OFICIALIGAS ESPERANTON.

La 28-an de Novembro pasinta, okazis en la Casal de la Cultura en Barcelono la ĝenerala kunveno de Kontraŭfaŝista Esperanto Komitato de Katalunujo. La ĵurnalkomunikoj kaj radioinformoj alvarbis la grandnombran ĉeestantaron de esperantistoj el tuta Katalunujo. Kunvenon prezidis K-do Domingo Masachs, kiu en sia alparolo klarigis la celon de tiu kunveno, sciigante ke la Kontraŭfaŝista Esperanto Komitato de Katalunujo ne estos plu Komitato, kiel ĝi estis ĝis nun konsistanta el reprezentantoj de diversaj katalunaj Esperanto societoj, sed memstara Asocio kun propra statuto, kun individuaj membroj kaj sekcioj en diversaj lokoj en Katalunujo. Kontraŭfaŝista Esperanto Komitato de Katalunujo (K.E.K.K.) estos kultursocia organizaĵo ekzistanta sub aŭspicioj de Comissariat de Propaganda de Generalitat de Katalunujo, krome ricevos la oficialan rekonon de Generalitat de Katalunujo, ricevos la Esperanto -Domon, kie esperantistoj povos kunveni, starigi bibliotekon, gvidi kursojn ktp. Ĉiu ano de K.E.K.K. ricevos membrokarton kaj senpage la presitan Esperanto gazeton, kiu baldaŭ aperos.

Posta parolis K-do Jozefo Anglada, pledante por la nova organizaĵo kaj dankante al la Kataluna Registaro por la granda utiligo de Esperanto. K-do Alberto Diaz el Bilbao transdonis la saluton de Baskaj esperantistoj kaj prezentis per elokventaj vortoj la faŝistan barbarecon en Baskolando instigante la



Nº. 27.

ĉeestantojn por unuigi kaj komune batali kontraŭ la kruela faŝismo. K-do O. Kupperman endikis la novan programon de Komitato por la insista kaj pli forta propagando de Esperanto kaj kontraŭ faŝismo kaj komentariis la statuton laŭ punktoj.-Esperanto envenis nun en nova periodo en la alia 50 jaroj. Ĝis nun, en la pasintaj 50 jaroj esperantistoj petis kaj petegis siajn registarojn por bonvole esprimi iun simpatian por Esperanto, ofte kun malsukceso. Nun unua fojo en la historio de Esperanto iu Registaro memvole oficialigas Esperanton kaj donas al ĝi ĉiujn facilajojn. Tiu tago estas historia tago ne nur por Esperanto movado en Hispanujo, sed por la tuta mondo. Hispana revolucio estas decida por la estonteco de Esperanto kaj ĝia disvolvo. Hispana Revolucio donis potencon pusion antaŭen al Esperanto kaj certe Katalunujo estos la unua lando en la mondo, kie Esperanto estos enkondukita kiel deviga fako. Tiuaj vortoj estis laŭte ap- laŭditaj.

Post malmultaj diskutoj, la kunveno unuanime akceptis la statuton kaj laŭ la propono de la lasta parolinto oni akceptis du rezoluciojn por sendi telegramon al Kataluna Prezidanto Lluís Companys kaj al la "Popola Fronto" en Valencio.

La ĉefestraro de Kontraŭfaŝista Esperanto Komitato de Katalunujo konsistas el Prezidanto Samuel Roca i Rodó, Viceprezidanto Domingo Masachs, Ĝenerala Sekretario Ovdaja Kupperman, Sekretario Alberto Díaz, Kasisto Jose M. Coll.

La teksto de telegramo sendita al Prezidanto Lluís Companys:

PREZIDANTO DE KATALUNUJO LLUIS COMPANYS, BARCELONA.

LA UNUA ĜENERALA KUNVENO DE KONTRAŬFASISTA ESPERANTO KOMITATO DE KATALUNUJO VOLAS PER ĈI TIO ESPRIMI AL LIA EKSCLENCO SIAN FIDELON KAJ KUNLIGECON AL KATALUNUJO KAJ KONTRAŬFASISTA AFERO, KATALUNAJ ESPERANTISTOJ ESTAS ĈIAM PRETAJ PLENUMI LA ORDONOJN DE SIA PREZIDANTO, PREZIDANTO DE ĈIUJ KATALUNOJ.

VIVU KATALUNUJO ! VIVU RESPUBLIKO !

.....  
Telegramo sendita al "Popola Fronto", Valencio:

POPOLA FRONTO, CALLE DEL MAR 25, VALENCIO.

LA UNUA ĜENERALA KUNVENO DE KONTRAŬFASISTA ESPERANTO KOMITATO DE KATALUNUJO VOLAS PER ĈI TIO ESPRIMI AL VI LA ĜRANDAN ADMIRON KAJ ESTIMON PRO LA ALTA ĈELO KIUN VI EFEKTEVIGAS POR LA RESPUBLIKO KAJ ESPERANTO. LA KUNVENO APROBAS ĈIAN SINTENON EN LA KONGRESOJ DE SAT KAJ IPE KAJ DANKAS PRO LA BONA REPRESENTADO.

VIVU POPOLA FRONTO ! VIVU ESPERANTO !  
.....

INTERVJUO KUN LEON NICOLLE.

Revene de sda vojaĝo al Madrido, Mr. Leon Nicolle restis kelkajn horojn en Barcelono kaj vizitis min. Mr. Nicolle estas bona amiko de Kontraŭfaŝista Hispanujo kaj granda admiranto de la Kataluna popolo.

Ni petis de li impreson pri la vojaĝo, kiun li ĵus faris, kaj li respondis al ni :

Mi portas el tiu ĉi vojaĝo la plej bonajn impresojn. Kiam mi venis tien ĉi mi faris tion kun la certeco, ke la venko estos por la Respubliko; certecon, kiu, pli bone dirite, estis antaŭsento; viva deziro. Nun tiu certeco, tiu konvinko estas pravigita kaj ĝi estas bazita sur tio, kion mi vidis la lastajn tagojn, antaŭ ĉio en Madrido. Madrido estas urbo, kiu donas la impreson de popolo sterce unuigita kun la Armeo, de popolo, kiu estas kvazaŭ daŭrigo de tiu ĉi armeo mem, kiel se armeo kaj popolo formas granitan blokon.

Mi vizitis la sektoron de la Casa de Campo kaj mi povis konstati la disciplinon, kiu regas inter la soldatoj kaj la oficiroj, ne fera disciplino, sed disciplino memtrudita de unuj kaj aliaj, ĉar ili scias, ke per tio ĉi ili kon-



tribuas al la atingo de la venko, disciplino, kiu estas nova afero, kiu certe ne estas vidata en iu Armeo pli bone, eĉ ne simile. Mi konstatis la kulturen klopodon, kiun oni faris por la Armeo. Tiuj lernejoj estis kreitaj apud la tranĉeoj, kie tiuj, kiuj ne havis okazon iri al la lernejo, lernas tion kion oni tie estus al ili instrinta. Mi vidis superajn kursojn de Belartoj, kaj mi vidis la soldatojn skulptantaj, pentrantaj kaj desegnantaj. Mi vidis ankaŭ la tranĉeojn tuŝantaj la loĝejojn de la batalantoj, kie oni ludas teatraĵojn kaj la soldatoj trovas distran angulon kaj kie oni donas al ili konsilojn, por ke ili ne malŝparu sian monon. Oni stimulas ilin por ke ili legu kaj por ke ili respektu siajn kamaradojn. Mi aŭdis kun plezuro la vortojn de la Brigada Komandanto, kiam li diris al mi, ke ili estas certaj pri sia venko kaj ke ili havas Armeon, kiun Franco neniam sukcesos havi.

- Ju pli da italoj kaj germanoj batalos kun Franco, des malpli ili estos por batali kontraŭ la kontraŭfaŝistoj de la aliaj landoj, diris al mi la majoro, malnova oficiro de la Armeo.

Mi vidis ankaŭ la grandan kulturen klopodon faratan de la Respubliko. Mi vizitis la Prado'n kaj mi vidis la grandajn laborojn realigitajn por por la savo de la tuta arta trezoro el Hispanujo, tiuj 16.000 pentraĵoj, kiujn oni savis, tiuj "Grekoj" pentraĵoj de la fama artisto nomata la "Greko", kiujn oni trovis difektitaj en privataj domoj kaj kiujn oni nun rebonigas; mi trovis ĉion ĉi admirinda en la momento, kiujn Hispanujo travivas, en ĉi tiuj momentoj de gravaj zorgoj, des pli post la maniero kiel la ĵurnalaro traktis la respublikanojn, kvazaŭ ili estus sovaĝuloj, homoj sen kulturo, kiam estas ĝuste tute kontraŭe.

En Madrido, kiam mi pretiĝis por foriri, mi havis la okazon paroli kelkajn momentojn kun protestanta pastro, kiu informis min pri la granda sentemo de via popolo kaj diris al mi, ke li konis multajn Marksistojn kaj komunistojn, kiuj montris, ke ili havas Dion en la koro. Tiu pastro diris al mi: "Kiu ajn laboristo, analfabeta proleto el Madrido, havas pli da homa kompreno, ol Eden aŭ Chamberlain."

Mi vizitis la detruitajn kvartalojn de Madrido, mi pasigis unu tutan posttagmezon kaj mi povis rimarki la mortan silenton, kiu regas en tiuj lokoj kaj lasas al vi profundan impreson. Mi povis indigni kaj mi emociigis. Ĉiel ne estas necese tiom da barbareco, ĉar ili ne povis pasi.

Revene de Madrido mi haltis en la vilaĝeto de la orienta marbordo kaj mi kunvivis tiujn horojn kun elementoj de la Internaciaj Brigadoj. Mi parolis kun kvar Svisaj civitanoj, kiuj estas tie kaj nur donis laŭdojn pro la maniero kiel ili estis traktitaj en ĉiu momento kaj pro la belega organizado de via sanigistaro. Mi trovis inter tiuj homoj belegan spiritstaton kaj gajecon. En ĉiuj lokoj oni rimarkas deziron por plialtigo de la homa nivelo, en lando, kiu estas en plena kreado kaj kiun oni vidas kapabla je io nova kaj neniam vidita. Mi rimarkis la senton de egaleco, ĉe la popolokian oni povas vidi nur en nia lando.

Kaj kion mi diros pri Barcelono? Barcelono donas la impreson de urbo ekstreme forta kaj de grandegaj rimedoj; oni vidas en ĝi firman volon batali kun la Respubliko kontraŭ la faŝismo. Oni vidas en via tero streĉan kunlaboradon kun la Registaro de la Respubliko, kio konfirmas ankoraŭ unu fojon la senton de la lojaleco, kiun vi, la katalunoj, havas.

Mi volus fine, ke vi prezentu mian dankecon al la kamaradoj el Madrido, kiuj donis al mi ĉiajn facilecojn por plenumi mian taskon kaj mi volas, ke miaj lastaj vortoj estu la sekvantaj:

La venko eble ne estos rapida, sed ĝi estas certa. Jen estas mia plej profunda konvinko.

#### MAJORO ATLEE EN HISPANUJO.

Nuntempe ĉeestas en Hispanujo la granda amiko de Hispana popolo Majoro Atlee, ĉefo de Labour Party en Anglujo. Majoro Atlee vizitis nian landon kiel gasto de la Registaro.



KAPITANO RUDOLFO ROBLES

UNU EL LA GLORA RESPUBLIKANA AVIADO.

La tutmonda preso raportis multfoje pri la heroeco de la respublikana aviado kaj ĝia supereco super la faŝista. Oftfoje oni dediĉis al tio grandajn artikolojn en la gazetaro kaj multajn atentojn de la publiko.

Estas konata fakto, ke la respublikana aviado, kvankam en la kvanto da aparatoj estas pli malgranda, sed tamen pli kuraĝa kaj pli supera en la aerbataloj.

La faŝistaj pilotoj neniam akceptas aerbatalon kun la respublikanoj, ĉiam ili forkuras malkuraĝege kaj dediĉas sin nur al la bombardado kaj detruo de pacaj sendefendaj vilaĝoj kaj urboj en la ariergardo.

Estas memkompreneble, ke Franco -pilotoj estas ĉiuj germanoj kaj italoj, kiuj ne venis Hispanujon propravole kaj pro tio preferas ne akcepti iun ajn batalon por eventuale ne esti kune kun siaj multekostaj maŝinoj dispecigitaj kaj transformitaj en bruliganta kaj senforma amaso.

Kontraŭe al respublikanaj pilotoj, tiuj estas ĉiuj hispanaj, krom kelkaj eksterlandaj volentuloj, ĉiuj junaj pilotoj, entuziasmaj kaj indiforentaj al sia vivo, ĉar ili konscias, ke ili defendas sian landon, siajn patrinon kaj sian popolon. La abnigacio de la hispana piloto estas karaktera eco de la forta volo kaj firma deziro de tuta hispana popolo por la venko super la faŝismo kaj eksterlanda invado.

Antaŭ ni staras unu el tiuj pilotoj, de la glora respublikana aviado, Kapitano Rudolfo Robles. Li estas el Sevilla, lia nomo estiĝis jam fama pro lia respublikaneco kaj lia heroeco kiel piloto de la Respubliko. Juna forta viro



KAPITANO RUDOLFO ROBLES, UNU EL LA GLORA RESPUBLIKANA AVIADO.



Nº. 27.

kun belaj profundaj okuloj kaj energioesprima vizaĝo. La nigraj kun iom grizaj haroj montras lian riĉan pasintecon. Rudolfo Robles, havas bonan memoron kaj scias flue rakonti siajn aventurojn. En jaro 1932 li pafis el pistolo al sia ĉefo majoro, Filipe Acedo, kiu klopodis instigi la soldatojn al la faŝista ribelo. Kvankam ĉiuj soldatoj estis favoraj al la sinteno de Robles, li tamen estis kondamnita per Milittribunalo al ses jaroj da malliberejo. Akuzis lin du faŝistaj oficiroj; generalo Julio Mena kaj kolonelo Fernandez Buriel, kiu estis fusiligita pasintan jaron. Kvar jarojn li estis en la malliberejo "Castillo de Santa Catarina" en Cadiz kaj poste trapasis diversajn aliajn malliberejojn ĝis kiam li estis liberigita pere amnestio dank al la Popolfronta Registaro.

En la malliberejo Rudolfo Robles konatiĝis pli profunde kun la liberecaj ideoj kaj el la malliberejo li scias publikigi flamaĵn artikolojn por la Respubliko kaj kontraŭ la subpremantojn de sia popolo.

Kiam en Julio 1936 eksplodis la faŝista ribelo, Rudolfo Robles troviĝis en Barcelono kaj de la eksplodo ĝis nun li partoprenis aktive en la batalon kontraŭ ribeluloj. Li estis la unua respublikana piloto, kiu en antikva flugmaŝino bombardis la faŝistajn poziciojn kaj atakis la modernajn "Heinkel" kaj "Caproni" - flugmaŝinojn. Kune kun la Kolonelo Alfredo Reyes li bombardis la ribelulajn kazernojn "Quartel de Icaris" kaj "De Tarrasanas" en Barcelono. Poste li partoprenis en la unuaj atakoj al Huesca kaj per sia antikva modela flugmaŝino multege apogis kaj instigis la milicianojn. Baldaŭ li estis sendita al Lerida kaj de Lerida al Alcaniz. En Aragona fronto li travivis gravan okcidenton kiam en unu aerbatalo la faŝista kuglo traboris lian benzinzervoaĵon kiam Robles troviĝis ĝuste sur la teritorio malamika. Nur lia kapableco kaj forta volo savis lin kaj lian maŝinon antaŭ la certa morto kaj detruo. Kun la naztuko li haltigis la forfluan de la benzino kaj per akrobataj manovroj atingis la respublikanan terenon.

En la duono de Septembro de pasinta jaro li ricevis la ordonon flugi al Bilbao kaj tien okazis io terura, diris Robles. Io simila povas okazi nur ĉiam la civilmilito, dum faŝistaj ribeloj - la frukto de faŝista ideologio. Rudolfo Robles ricevis ordonon bombardi la ribelulan militŝipon, kies unu el la oficiroj estis lia frato. Kontraŭaviadilbaterioj de la ŝipo pafis insiste supren, kiam Robles metis bombojn sur la ŝipon, kie troviĝis sia frato. Tiu abomena epizodo de la hispana milito estas la rezulto de la faŝista demoralizado - kiam unu frato devas murdi la alian pro la gloro al Hitler Mussolini kaj Franco.

La sciigo pri la morto de sia patrino kaj iom poste la morto de sia patro devigis Rudolfon reveni al Barcelona. Ankoraŭ li partoprenis en la ofensivo al Huesca en kiu mortis heroe generalo Lucas kaj nun li estas ĉefo de aviadkampo de Gerona kaj ĝojas pro la simpatio kaj estimo de siaj multaj amikoj kaj soldatoj el la glora respublikana aviado.

#### AL ĈIUJ ESPERANTISTOJ.

Comissariat de Propaganda de Generalitat de Catalunya volas donaci al la Kataluna Esperantistaro belan ilustritan gazeton ĉiu monate, dediĉita tute al la propagando de Esperanto. Sed evedentiĝis, ke mankas en Hispanujo la papero por efektevigi la belan permeson por esperantistoj de la Kataluna Registaro. Ankaŭ mankas la necesajn eksterlandajn diviziojn por aĉeti la necesan paperon en eksterlando.

Por ne preterlasi tiun okazon por propagandi Esperanton per la propra organo oficialigita de la Registaro, Katalunaj Esperantistoj turnas sin kun la peto al ĉiuj samideanoj, se estas eble ricevi de ili la necesan paperon. Kun la espero, ke ankaŭ ĉi tiun fojon la Esperantistaro esprimos al ni la samideanan solidarecon kaj ebligos al ni la eldonon de Esperanto gazeto.

Rilate tiun peton oni povas turni sin al la Comissariat de Propaganda de Generalitat de Catalunya, Esperanto - Fako, Avinguda 14 d'Abril 442, Barcelona.





# GENERALITAT DE CATALUNYA

PRESIDÈNCIA

COMISSARIAT DE PROPAGANDA

Avinguda 14 d'Abril, 442 bis : BARCELONA : Telèfon 82215

## COMUNICAT DE PREMSA

ESPERANTO ELDONO.

Nº. 28.

Barcelona, 22/XII, 1937.

### TERUEL REKONKERITA !

#### GLORA RESPUBLIKANA OFENSIVO.



INDALECIO PRIETO, GEN-  
ERA RESPUBLIKANA MI-  
NISTRO DE NACIA DEF-  
ENDO.



HERO GENERALO ROJO  
KONKERISTO DE TERUEL

Depost multaj semajnoj, dum kiuj preskaŭ ĉiuj ĵurnaloj en la mondo publikigis kruelajn profetaĵojn pri la granda ofensivo de Franco, okazis io tute kontraŭe, kio eĉ por la respublikanoj estis granda surprizo.

Antaŭ nelonge subite komencita ofensivo en la sektoro de Teruel, kaj nun la grava strategia punkto Teruel, kiu estis plej antaŭen elŝovita urbo en la tuta fronto kune kun 250 km kvadrataj falis en la manoj de la glora respublikana armeo.


Kun la rekonkero de Teruel, ĉesis la danĝero pri la subita ofensivo de Teruel al Castellion por detranĉi Valencion de Barcelono.

Teruel estas la ĉefurbode sufiĉe granda regiono, sed malforte enloĝata urbo kun pli ol 15.000 enloĝantoj. La konkero de tiu urbo, kiu de la komenco de milito estis en la manoj de ribeluloj, ne estus de grandioza valoro, se ne pro la strategia valoro, kiu povas eventuale esti decidvalora en tiu milito.

Spite la vintron, dum neĝfalo kaj malvarmo, la respublikanoj montris esti kapablaj konkeri la bone defenditan kaj fortetikitan urbon. Tiu glora venko de respublikana armeo estas de la tuta preso kaj militistaj fakuloj signita, kiel plej granda venko dum la tuta hispana milito. Pli granda ol okupo de la detranĉita Basklando, pli granda ol dispecigo de regula itala armeo de juna respublikana armeo ĉe Guadalajara. La venko de Teruel signifas, la granda morala altigo de respublikanoj, kiu samtempe montras al Franco-soldatoj kaj speciale la loĝantaron de lia zono, ke la milito ankoraŭ longe ne finis, kaj ke oni staras kontraŭ la malamiko, kies milita kapablo, organizo kaj ofero multe plialtigas ilin. Cetere, la loĝantaro kaj diversaj partioj de Franco-armeo estas ja malkontentaj kaj inter si batalantaj. La falo de Teruel povas eventuale instigi la loĝantaron fari la finon al tiu kruela kaj faŝista teroro. La perdo de urbo, kiun Franco de la komenco de milito havis, signifas por li fortan vangfrapo.

La subita atako de respublikanoj kaj la disfalo de faŝista defendlinio kaŭzis la rapidan ĉirkaŭon de Teruel. Kiam la ĉirkaŭo de Teruel estis diskonigita, la faŝistaj flugmaŝinoj de granda alteco ĵetis grandegajn pakaĵojn de





Supren: Geografia karto pri la situacio de fronto antaŭ la ofensivo. Sube: Geografia karto pri la ofensivo, ĉirkaŭo de Teruel kaj okupo de la tuta regiono.

de mangablaĵojn, kies plej granda parto falis en la respublikanaj linioj.

La respublikanaj flugmaŝinoj bombardis unue la urbon, kie per mitrajleroj estis detruitaj la malamikaj koncentrigoj. Dume la ringo ĉirkaŭ Teruel estiĝis konstante pli mallarĝa, la registaraj trupoj daŭrigis sian marŝon, sur la vojon al Albarracín. Pro la bombardado estis la radiotelegrafaj kontaktoj difektitaj kaj dum 48 horoj Teruel ne respondis al ĉagrenaj kaj pasiaj signaloj de radiostacio Saragossa.

Kiam la lasta defendlinio ĉirkaŭ Teruel falis, la respublikanaj flugmaŝinoj disjetis flugfoliojn sur Teruelon kun jena enhavo:

„La lojala Registaro de Respubliko, naskita el la popolbalotado de Februaro



1936, invitas vin, redoni sin kaj garantias vian liberecon, vian sendependecon kaj vian vivon. Ne kreu al la promesoj pri alveno de grandaj soldatplifortigoj ili ne alvenos, ĉar niaj armiloj ne permesos preni al vi la helpon. Forĵetu viajn armilojn, ĉiuj soldatoj, ĉefoj, oficiroj, per tio vi montros al Hispanujo grandan fervoron, al nia Hispanujo, libera de fremdaj entruduloj, sen italoj kaj sen germanoj, nek vasaloj de fremdaj landoj, kiuj volas de nia tero fari kolonion. Se vi tion ne faros, vi estos venkotaj kaj detruitaj. Por Hispanujo kaj Respubliko! Ne kunhelpu per la senrezulta kontraŭstaro la verŝadon de senkulpa sango. Vivu Hispanujo! Vivu Respubliko!"

Intertempela respublikanoj okupis la vojon kondukata al Sagunto. Ĉe Castell-er kaj Castralve estis kaptite multe da militmaterialo kaj soldatoj, kiuj transdonis sin.

Kiam la respublikanoj sukcesis ĉirkaŭi Teruel-on, evedentiĝis klare la nobla kaj humana sinteno de respublikanoj en la kontrasto al barbareco de la faŝistoj. Multaj atentigis pri la donita permeso al la civila loĝantaro forlasi la urbon kaj por translokiĝi en pli maldanĝeraj lokoj. La respublikanoj permesis ne nur al la virinoj kaj infanoj, sed ankaŭ al la viroj ne apartenantaj al la armeo forlasi la urbon kaj ne estas ilia kulpo, kiam la ribeluloj kontraŭe malpermesis al ili fari tion.

La retiro de virinoj kaj infanoj devis prezenti la tragedian bildon; grupoj de proksimume 25 personoj kun blankaj tukoj kondukis sin al la respublikanaj linioj, de kie ili estis per aŭtoĉaroj transportitaj alieloke.

Ne pasis multaj semajnoj, kiam Franco ankaŭ enŝlosis la urbojn kiel Gijon kaj Santander, kaj multaj rememorigas kun kia barbareco kaj bruteco la civiloĝantaro estis traktita. La neutralaj observantoj, kiel anglaj maroficiroj informis nin, ke ĉe Gijon ĉiuj malgrandaj ŝipoj surhavantaj refuĝintaj virinojn kaj infanojn estis dronigitaj. Oni neniam aŭdis pri la entreprenado de Franco por savi la vivojn de la senkulpaĵaj viktimoj de la milito. Kontraŭe Franco ĉiam rifuzis la transporton de civila loĝantaro. Tute alie agas la respublikanoj. Laŭ milita vidpunkto, ili faris eraron, pri kio Franco certe mokeme ridis, ĉar la urbo kun multaj enloĝantoj pli multe konsumadas, kio rezultas la rapidan finiĝon de manĝaĵojn, malsato kaj poste fordonado.... Sed la respublikanoj ne havas nur militan starpunkton, sen ankaŭ la humanan starpunkton, kiu ne permesas la elmalsatigon de senkulpaĵaj virinoj kaj infanoj de sia propra popolo.

Dum 17 monatoj de hispana milito, oni multe insultis la malbonajn "ruĝulojn", sed ila sinteno ĉe Teruel montris la kontraŭon de la "kulturportisto" Franco. Post la evokuado de virinoj kaj infanoj en Teruel povis disvolvi la milito inter viroj, tiel kiel okazis en pasintaj tempoj. Teruel jam falis kaj la Registaro, kiu tiel maniere traktas la civilan loĝantaron de malamika teritorio, montris ankaŭ plurfoje la noblecon kontraŭ siaj malamikoj, kiam ili kuraĝe kaj noble sin defendis.

La konkiro de Teruel montras, ke oni ne devas maltaksi la forton de Hispana Respubliko kaj samtempe ĝi povas servi kiel avizo al la tutmonda demokratio pri la epopea milito de hispana popolo kontraŭ la faŝismo kaj instigo por helpi al ĝi ĝis la fina venko.

#### GENERALO MIAJA PRI LA VENKO DE TERUEL.

Generalo Miaja deklaris, ke la konkiro de Teruel estas grava okazintaĵo, precipe por la eksterlando. Tie oni kredas, ke la perdo de nordaj provincoj kaŭzos la disfalon de la Respublikana Hispanujo. Ni montris, ke nia armeo estas unu el la plej bonaj de mondo, ĉar nia popolo ne havas egalan al si. Ni batalas kontraŭ tri landoj, el kiu du kredas posedi kapablajn gvidantojn, pli kapablajn ol niaj. Ni montris, ke la ĉarpentistoj, masonistoj kaj laboristoj, kiuj ne studadis en la lernejojn de Turuno kaj Berlino, venkas tiujn, kiuj venas el tiuj lernejoj.



OPINIO DE HISPANA PASTRO.

Pastro Pasiero Ruiz, kiu estis atestanto de bombardadoj al la civila loĝantaro en Asturio, esprimis sin jene pri la ribeluloj: "La ribeluloj ne estas kristanoj, se eĉ ili nomas sin tiel. Mi kiel hispana pastro, devas tion konfirmi, depost kiam mi per miaj propraj okuloj povis vidi ilian teruran kru-elecon. Kiam ili parolas en la nomo de Kristo, do signifas tio blasfemo, por trompi la bonkredulojn".

KREO DE NACIA KONCERTORKESTRO.

La Ministerio de Edukado publikigis la noton, kiu informas pri la kreo de Nacia Koncertorkestro, eklaboronta la 25-an de Decembro. Tiu decido montras la kulturalan penon de la respublikana Registaro.

RICARDO CORAL MORTIS.

En la fronto de Casal del Campo en Madrido mortis la konata hispana opero-komponisto Ricardo Coral. Li havis 52 jarojn. De la komenco de milito li partoprenis aktive en la fronto kaj atingis la gradon de serĝento.

EKSPOZICIO PRI MADRIDO EN BARCELONO.

En Barcelono estis inaŭgurita ekspozicio pri "Unu Jaro de Rezistado de Madrido". La ekspozicio troviĝas en "Casal de la Cultura" kaj tiras la atenton de ĉiuj barcelonanoj. La inaŭguracion ĉeestis Kataluna Prezidanto Lluís Companys kaj aliaj aŭtoritatoj. La ekspozicio estis aranĝita per kunlaboro de Subsekretario de Ministerio de Propagando kaj Comissariat de Propaganda de Generalitat de Catalunya. Ekspozicio entenas grandegajn afiŝojn, multajn fotografaĵojn,omboj, kanonojn de germana kaj itala deveno, dokumentoj pri la eksterlanda interveno, planoj de Madrido kaj la detruoj kaŭzita per la bombardadoj. Tio ĉio prezentas la bildon de heroo rezistado de Madrido kontraŭ la eksterlandaj en-truduloj.

NOVA HISPANA JUSTICMINISTRO.

La nova hispana Ministro de Justico Mariano Anso Zunzarren naskiĝis 21-an de Decembro 1889 en Pomplona. Kiel advokato kaj respublikana gvidanto en Navarra dum la monarĥio, li partoprenis aktive en la politika vivo, ĉefe en la batalo kontraŭ la diktaturo de Primo de Rivera. Li aĝado por la Respubliko kondukis al lia arestado en Decembro 1930. En jaro 1931 li estis elektita en la balotado por la urbestro de Pomplona kaj de tiu tempo li estis la unua respublikana urbestro de tiu urbo. En tiatempa parlamento li apartenis al la Respublikana frakcio kaj plenumis 2 jarojn la taskon kiel sekretario de parlamento. En jaro 1936 li estis de provinco Guizpuzcoa reelektita kiel maldekstra respublikano al parlamento kaj en la Registaro de Negrin li okupis la postenon de subsekretario de Ministerio de Justico, kies taskon li plenumis ĝis la ekŝigo de Ministro Irujo, kies postenon li nun transprenis.



IMPRESOJ PRI LA RESPUBLIKANA OFENSIVO.

La komunikoj pri la respublikana ofensivo ĉe la Teruela Fronto faris sur la ribeluloj la grandan impreson. Du altaj ribelulaj oficiroj dezertis kaj forkuris al Gibraltaro. Krome dezertis ankaŭ alta doganooficiro de La Linea kaj la poliestro de la sama urbo.

El Sevilla alvenintaj personoj deklaras, ke la respublikana sukceso ĉe Teruel estis por Franco granda surprizo kaj malbonŝanco kaj por tio la granda faŝista ofensivo pri kiu fantazias la faŝista preso estis prokrastata al ne difinita tempo.

LA OLEOPRODUKTADO EN HISPANUJO.

La statistika sekcio de Ministrejo de Agrikulturo sciigas, ke la rikolto de olivoj en la jaro 1936 en la teritorio de la lojala Hispanujo atingis la kvanton de 2.520.680 centnarojn. Tiu kvanto signifas la plialtigo de produktado je 23.42 % super la ordinara produktado dum la jaroj 1931 - 36 proksimume en la sama teritorio kaj 13.08 % super la jaro 1936.

La jara konsumado de la respublikana Hispanujo estas 1.387 centnarojn, tiel ke la kvanto de 1.133.000 centnarojn da oleo de la plej bona speco restas por la eksporto. Tiu altigo de la produktado, kiu estas preskaŭ egala sur la tuta lojala teritorio, montras la normalajn ĉirkonstancojn, inter tiuj kiuj perlaboras la teron, dank al la Ministrejo de Agrikulturo kaj lojaleco de kamparanoj.

HISPANAJ KAMPARANOJ ESTAS POR LA VENKO.

La ĝenerala kunsido de la Nacia Komitato de Kamparanoj en Valencio sendis la telegramon al la Ministro de la Nacia Defendo en kiu estis esprimita la kontenteco pri la sukceso de la Popolarmeo. Plue la Komitato sendis la telegramon al la Ministroprezidanto D-ro Negrin, en kiu ĝi garantias al la Registaro, ke kamparanoj volas porti ĉiun necesan oferon por la venko de la milito.

LA SITUACIO DE KAMPARANOJ EN FRANCO - ZONO .

Oni raportis el Boltana: Hodiaŭ la patrolo de Horna de Callego renkontis du malamikajn soldatojn, kiuj propravole kaj sen kontraŭstaro kuniris kun la patrolo. Ambaŭ estas el Andaluzio kaj estis devigitaj eniri la fremdlegion kaj troviĝas nur de nelonge en Aragono. Laŭ ilia rakonto regas en la sudaj provincoj granda malsato. Spite la minacojn de civilgubernatoroj de Sevilla kaj Cordoba la kamparanoj ne estas en stato pro la manko de mono kaj laborfortoj rikolti la grenon kaj nek fari la novan semon.

HISPANA RESPUBLIKO PAGAS SIAJN ŜULDOJN .

La Hispana Registaro disponigis al la bankoj en Anglujo 73.100 funtoj ŝterlingoj, destinitaj al pago por diversaj kreditoj komercaj, ne enkalkulitaj en la "clearing".



